# ESPERANTO EN BELGIO

Monata bulteno (Bulletin mensuel - Maandelijks blad)

de la BELGA ESPERANTO-FEDERACIO

Montoyerstrato 37 b.24
B-1040 BRUSELO
Tel.(02)5135995

Postĉekkonto 000/0163434.86

Respondecas (Editeur responsable - Verantwoordelijke uitgever) :
La ĝenerala sekretario : André MERTENS GOOSSENS
Priorijstr. 4 B-1720 DILBEEK

Redakcio : La estraro de B.E.F. prizorgu la materialon por tiu bulteno. Krome, ĝi atendas kunlaboraĵojn el la tuta lando. Ju pli da kunlaboraĵoj, des pli varia kaj interesa revuo !
La artikoloj estu prefere klare tajpitaj!

## BEF - ESTRARO

| | |
|---|---|
| Prezidanto | : Marc DEMONTY (Bruselo) |
| Vicprezidantoj | : Lambertine DREZE (Liego)<br>Edward SYMOENS (Kalmthout) |
| Sekretarioj | : André MERTENS GOOSSENS (Bruselo)<br>Clément THOLET (Liego)<br>Jan BOVENDEERD (Mortsel) |
| Kasisto | : Jules VERSTRAETEN (Antverpeno) |

**La eldonado de la nuna bulteno**
estis preparita per mikrokomputilo.

Informadikistoj asertas ke tiu teĥniko garantias pli bonan kaj certe rapidegan laboron. Ĉu tio klarigas la malfruiĝon de tiu unua bulteno de la jaro 1983? Tamen jes por niaj inteligentaj legantoj, kiuj facile komprenas ke la sekretario ne estas profesia informadikisto kaj devis eklerni la komputadon. Tiun novan povoscion li dankas al sia funkcio en la E-movado kaj li volas dediĉi al la servo de la internacia lingvo.

**Multajn afablajn bondezirojn**

la sekretariato de BEF ricevis por la komencinta jaro, el la tuta lando kaj eĉ el pluraj aliaj landoj kaj kontinentoj. La estraro de la Federacio ĉiujn dankas kaj tutkore reciprokas!

**Ĝenerala kunsido de la Belga Esperanto-Federacio, 06-11-1982**

La kunsido okazis en la gastigema Esperanto-Domo de Antverpeno.

**A. Estrarkunsido.**

La estraro kunvenas en la salono de la 1a etaĝo je la 10a horo.
Ĉeestas: Marc DEMONTY, Lambertine DREZE, Edward SYMOENS, André MERTENS GOOSSENS, Jan BOVENDEERD, Jules VERSTRAETEN, Andrée ORSOLINI, Simonne FICHEFET kaj Robert BURNAY.
Sin senkulpigis: Clément THOLET.

La kasisto donas al la estraranoj ekzempleron de la stato de aktivecoj de la pasinta jaro; li klarigas la financan situacion de la landa asocio.
Laŭ demandoj de pluraj estraranoj, MD, LD, AMG, JB, AO... li aldonas iujn precizojn pri la publikaj subvencioj kaj la detaloj de aliaj en- kaj elspezoj.
Pri la eldonkostoj de la bulteno de A.P.E. "Espéranto en Marche", okazas diskuto inter MD, LD, AMG, JB, JV kaj AO. La respondeculino daŭrigos la esploradon pri pli avantaĝaj kondiĉoj.
Ankaŭ pri la kotizoj kaj ilia impostebleco okazas kontraŭdira diskuto inter pluraj ĉeestantoj i.a. LD, AMG, JB, JV, AO... JB vigle konsilas sufiĉan plialtigon de la kotizoj ĉe APE.
De interŝanĝo de ideoj inter AMG, JB, LD, ES ..., ekestas interesa konkludo por la subvencio-peto: eĉe utilas ke la grupoj sendos ĉiufoje dokumenton aŭ raporton, eĉ mallongan, pri ĉiu sia kunveno aŭ aranĝo, iom ajn estus la nombro de ĉeestantoj; partopreno de membroj al en- aŭ eksterlanda aranĝo aŭ vojaĝo estas ankaŭ menciinda. Tiaj dokumentoj konsistigas konkretajn provaĵojn en la dosiero por obteni subvenciojn de la Ŝtato.
Dum la fina parto de la estrarkunveno, okazas ĝenerala interparolado pri la reala rolo de BEF. La Belga Esperanto-Federacio estas la oficiala landa asocio rekte aliĝinta al la Universala Esperanto-Asocio. Ĝi estas la kupola organizo kiu, en naciaj kaj internaciaj aferoj, subtenas kaj kompletigas la agadon de Asocio por Esperanto kaj Flandra Esperanto-Ligo... LD, ES, AMG, JB, AO... esprimas pli precizajn aspektojn de tiu rolo.
MD dankas la estraranojn por ilia bona kunlaboro, kaj liberigas ilin por la tagmanĝo.



**B. Ĝenerala jarkunsido de BEF.**

Ĉeestas: Marc DEMONTY, Lambertine DREZE, Edward SYMOENS, André MERTENS GOOSSENS, Jan BOVENDEERD, Jules VERSTRAETEN, Andrée ORSOLINI, Monique VEREECKEN, Wim DE SMET, Roger DE SCHEPPER, Ivo DURWAEL, Leo DEBRUYNE, Robert BURNAY, Lucien DE SUTTER, Marie GRELA, Gerd JACQUES, Germain PIRLOT, Gaston RABOSEE, Yolande STEYAERT.
Sin senkulpigis: Pol DENOEL, Emile VAN DAMME, Erhard BOEHME.

1. Aprobo de la protokolo pri la ĝenerala kunsido de 03.10.81.
AMG disdonas ekzemplerojn de tiu protokolo.
MD submetas la enhavon al la aprobo de la ĉeestantaro.
Neniu rimarko nek demando!

2.1. Raportado pri la financa situacio de BEF.
MD transdonas la parolon al la kasisto.
JV prezentas la kasraporton pri la periodo de 01.07.81 ĝis 30.06.82. La kasisto deziras ke la sufiĉe granda deficito estu kompensota per ministeriaj subvencioj; li ankaŭ akceptos sugestojn por plibonigi la financan situacion.
Poste li prezentas la buĝeton por la periodo de 01.07.82 ĝis 30.06.83.

2.2. Raportado pri la fondaĵoj J.-L. kaj J.-D.
JV klarigas ke la fondaĵon Jaumotte-Loquet kreis So Jaumotte okaze de sia 50-jara geedziĝa jubileo: li tiam disponigis al la E.-movado kapitalon de 50.000 BF., kiu nuntempe fariĝis ĉirkaŭ 250 .000 BF. La rentumo de tiu kapitalo devas esti dediĉata al propagando. MD proponas, nome de la estraro, ke BEF renovigu la decidon de la antaŭa jarkunsido: dediĉi la ĉijaran rentumon al Europa Esperanto-Centro. Post demando de WD kaj klarigo de JV, la prezidanto konstatas la konsenton de la kunsidantaro.
JV klarigas ankaŭ ke la fondaĵon Jennen-Debrouwere kreis Sino Jennen: la komenca kapitalo estis 10 000 BF. kaj la rentumon la fondinto destinis ĉiujare al la plej bona belga Esperantisto!
Sekve de propono de ID kaj pluraj intervenoj, i.a. de MD, ES, WD, RD... la ĉeestantaro aprobas la oferton de tiu premio al Germain PIRLOT, kiel rekompenco por sia persona kaj sindediĉa agado por la defendo de la internacia lingvo per la Gazetara Servo.

2.3. Raportado pri la eldonejo-librejo "Sonorilo".
MD donas la parolon al la direktorino MV kiu prezentas la jarbilancon de tiu asocio; kaj ŝi klarigas la decidon de ĝia administrantaro pri la divido de la profito inter Sonorilo mem, FEL, APE kaj BEF. Post demandoj de MD, JB, JV, ID..., kaj precizigoj de MV, ŝi ankaŭ sciigas ke la asocio bezonas reprezentanton de BEF ĉe sia administrantaro kaj proponas AMG por tiu funkcio; AMG akceptas.

2.4. Raportado pri la aktivecoj de ILEI.
MD mem prezentas mallongan raporton, kaj ES aldonas klarigojn pri la agado en edukaj medioj kaj ĉefe pri sia nederlandlingva broŝuro "Kultura kaj pedagogia Valoro de Esperanto".

2.5. Raportado pri la aktivecoj de BEFA.
LDS prezentas la raporton de la fervojista asocio kaj anoncas la preparadon de la 35a IFEF-Kongreso kiu okazos en junio 1983 en Oostende.

3. Jarraportoj de BEF, FEL kaj APE.

3.1. Raporto de BEF.
AMG klarigas ke BEF estas la landa asocio aliĝinta al UEA kaj la kupola organizo kiu subtenas la agadon de FEL kaj APE. Ĝi kompletas tiun agadon sur tutnacia kaj internacia kampoj.
Li mencias la organizon de la antaŭa BEF-kongreso en Bruselo, la reprezentadon de BEF ĉe la UK en Brazilo, ĉe la inaŭguro de la E-Laborejo en Aŭbel, ĉe la Trilanda renkontiĝo ankaŭ en Aŭbel, ĉe internaciaj renkontiĝoj kiel la akcepto de ĉirkaŭ 50 Polaj samideanoj en Bruselo, ĉe la internacia Foiro de Lingvoj en Bruselo, ĉe la jubilea festo de la Verda Stelo en Antverpeno. Li mencias ankaŭ la partoprenadon de BEF al la preparado de la 67a UK en Antverpeno kaj de la kongresaj ekskursoj en la tuta lando. La estraro de BEF prizorgas la dumonatan eldonadon de sia bulteno "Esperanto en Belgio".

3.2. Raportoj de FEL kaj APE.
JB kaj LD prezentas respektive la raportojn de la regionaj organizoj. La aktivecoj estis multnombraj kaj fruktodonaj.
Ankaŭ multaj membroj de FEL kaj pluraj aktivuloj de APE amike kunlaboris por la preparado de la UK kaj de ekskursoj en siaj urboj kaj regionoj.
La resumaj tekstoj de la raportoj de FEL kaj APE aperos aparte en "Esperanto en Belgio".
JB kaj LD komunikos al AMG la lastajn ŝanĝojn en la estraroj de FEL, APE kaj iliaj lokaj grupoj. AMG kompilos la BEF-organigramon kaj aperigos novan en estonta bulteno.

4. Elekto de Administrantaro-Estraro.
Post rimarkoj de WD kaj komentoj de JB kaj AMG pri la statuta difino de "administrantaro" kaj "estraro", MD konstatas ke neniu kandidatis por la estraraj funkcioj. Do la komitato restos senŝanĝa.

5. Destino de la rentumo de la fondaĵoj J.-L. kaj J.-D.
Tiu punkto jam estis pritraktata dum la raportado pri la financoj.

6. Preparo de la jubilea jaro 1987.
MD demandas ĉu ne estas tro frue por lanĉi alvokon tiurilate.
ES proponas atendi la laborplanon de UEA.
JB tamen opinias ke la bazo jam devus kuŝi en sektoroj ekz. de la fakaj asocioj.

7. Diversaĵoj.

WD anoncas ke UMEA havos novan reprezentanton en Belgio ekde la 1a de januaro: aktiva Esperantistino Doktorino TD.
JB proponas ke la lokaj grupoj preparus listojn de siaj membroj kun indikoj pri iliaj studoj kaj profesio; la celo estus konfidence komuniki tiujn informojn al la samideanoj kiuj havas samajn interesojn.

LDS anoncas ke la 35a IFEF-Kongreso okazos en la Festa kaj Kultura Palaco en Oostende; kaj li invitos la prezidanton de la landa asocio BEF ĉeesti la malfermon je la 5a de junio 1983.
LDS petos ankaŭ la librovendejon Sonorilo ĉeesti la kongreson dum la tuta semajno.



AMG priparolas kun LDS la prizorgadon de materialo por tiu kongreso per donacado de la Genrala Spar- kaj Rentkaso.
LDS kaj WD pridiskutas la uzadon de la ejo de BEF en Bruselo; MD klarigas ke tiu ejo ne taŭgas por kunvenoj. Li antaŭvidas ke BEF povus lupreni pli taŭgan ejon kun la Brusela Grupo.

MD dankas ĉiujn por ilia ĉeesto kaj atento kaj fermas la kunsidon.

A.MG.

**BEF-Kadrokursoj**

Jen rememorigo de la ĉiujara programo:
- 12-03: Parolteknikoj (publikaj paroladoj) -gv. PAUL PEERAERTS.
- 30-04: Kunven- kaj debatteknikoj - ,, PAUL PEERAERTS.
- 28-05: Movadhistorio - ,, Dro POL DENOEL.
- 18.06: Komunik. inform- k. propagandtekn. - ,, ANNE TILMONT.

La kurso daŭras de la 10a ĝis la 16a horo; dum la tagmeza ripozo, eblas favorpreze manĝi en la ĉirkaŭaĵo de la kursejo.

Jam aliĝis deko da personoj.

Pliaj informoj pri la venontaj kursoj, i.a. pri la situo de la ejo, ĉe la Prezidanto de BEF, Marc Demonty, av. des Missionnaires, aŭ Missionarissenl., 39 B5, B.1080, Bruselo (tel.02/5201944).

A.MG.

**Anonceto.**

Kiu volas iri AVIADILE al Budapeŝto (U.K. kaj/aŭ I.J.K.) ekde Bruselo?
Se ni povas trovi 6 "flugantojn", ni povas ĝui jam de rabata prezo (proks. 12 500BF.) ĉe la flugkompanio MALEV de Hungario.
Interesatoj skribu noton al Anne Tilmont ĉe Esperanto-Domo, por rezervi lokojn.

A.T.

**En la pasinta jaro, ni funebris**

pro la morto de Prof.Dro Georges R. BOULANGER, Vicprezidanto de la Eŭropa Klubo kaj estro de la valonia sekcio de tiu societo.
Li estis doktoro de la Universitato de Paris (matematikaj sciencoj), profesoro por maŝinkonstruado de la Politeknika Fakultato en Mons, kaj honora profesoro de diversaj aliaj universitatoj, membro de multaj sciencaj asocioj kaj precipe la fondinto kaj prezidanto de la "Association Internationale de Cybernétique".
Li lernis la Internacian Lingvon kaj energie subtenis la enkondukon de tiu lingvo kiel oficiala tria laborlingvo de la IXa Internacia Kongreso de Kibernetiko en Namur 1980.
Dum la solena inaŭguro de la UK en Antverpeno, li estis publike bonvenigita kiel reprezentanto de neesperantista organizaĵo.
Li neatendite mortis la 23an de aŭgusto 1982. Lia forpaso estas granda perdo por la Eŭropa Klubo, kaj ankaŭ por la E-movado.

# flandra esperanto-ligo
## vlaamse esperantobond

Frankrijklei 140
B-2000 Antwerpen
Ø (03) 234.34.00

Kantooruren
Oficaj horoj
9.00-12.30 - 13.15-17.30 h

Postrekening
Ĝirkonto
000-0265338-43


ĜENERALA KUNSIDO DE BEF JE 06 11 1982

Resuma superrigardo de niaj aktivecoj - 01 07 81 - 30 06 82

Plej grandan atenton ricevis la strukturo de nia movado kaj ĝia evoluo, samkiel ankaŭ ĝia financado.

Nemalkonataj estas la sekvoj de la ĝenerala ekonomia krizo, kiu tuŝas nin ĝis en niaj elementaj enspezoj kaj rimedoj.

Diversaj klopodoj rimedi al tio ne aŭ nesufiĉe efikis. Tamen la afero pludaŭras.

Jen superrigardo de niaj klopodoj :

- por malpliigi la afrankajnkostojn rilate al la dissendado de protokoloj kaj komunikoj, ni kreis - kiel vi cetere jam sciis - INFORMILON.
- por plifortigi la movadan agadon, ni serĉis kaj trovis pli firman kunlaboradon kun la junularo.
- ni ankaŭ centraligis la ĝeneralan administradon por plicertigi kontinuecon en la farotaj laboroj, sed tio elmontriĝis pli elspeziga kaj, do, ekonomie ne eltenebla.
- kreiĝis eldono-konton por kolekti la monon necesan por eldoni proprajn publikigaĵojn, kiel ĝis nun :
  - LA AVENTURAJ DE ŜPAR- KAJ ALIA PORKETOJ" de Rik de Roover.
  - ESPERANTO KION MI POVAS FARI PER TIO por esti enstrukturita en la kursoj
  - ESPERANTO WAT KAN IK DAARMEE DOEN ?
- stariĝis komisiono pri traduk- kaj eldon-aferoj.
- okazis kadrokursoj sufiĉe sukcesaj por formi kurs- kaj kunven/debatgvidantojn, propagandistojn k.s.
- organiziĝis oficiala koresponda kurso
- ekestis kunlaborkonsento kun la Laborista Esperanto-grupo "Antaŭen" el Jeurne, kvankam la "kunlaboro" estas nur unu-direkta alsendo de protokoloj kaj komunikoj de ni al ili, sed ne returne !
- aliĝis al FEL F A B E (Flandra Asocio de Blindaj Esperantistoj)
- ekestis agado en Oostende

Menciinda eble ankaŭ estas, ke nia prezidanto Edward Symoens ellaboris informbroŝuron pri la sociala kaj pedagogia valoro de Esperanto, dum li ankaŭ ellaboris la ĝeneralan agadplanon de UEA por la venontaj kvin jaroj kadre de la preparperiodo de la jubileiĝo de Esperanto en 1987.

Kaj, por fini, multege da laboro alportis al ni la organizon de la 67-a Univesala Kongreso de Esperanto en Antverpeno.

04 11 1982
JB




ASSOCIATION POUR L'ESPERANTO
APE
ASOCIO POR ESPERANTO

SECTION DE
BELGA ESPERANTO FEDERACIO
AFFILIÉE A
UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO
(relations consultatives avec l'UNESCO)
Rue Montoyer 37/B 24
1040 BRUXELLES


ĜENERALA KUNSIDO DE B.E.F. - 6/11/82.

RAPORTO PRI LA AGADO DE A.P.E.

Periodo : 1/7/81-30/6/82.

Ĝis nun, mi ne povas paroli pri la strukturo de A.P.E., ĉar niaj komfortoj estas ne sufiĉaj. Do, ni ne kapablis plenumi grandajn projektojn, kaj povas prezenti nur sumon de simplaj agadoj.

Je la komenco de la priparolata periodo, okazis pikniko en Ham-sur-Heure, en kiuj partoprenis geanoj de kelkaj niaj grupoj kaj gefrancoj el Lille.

Je la sama dato, malfermiĝis la Someraj Universitataj kursoj, kiujn ni helpis :
2 membroj gvidis kurson,
3 " helpis alimaniere,
2 " sekvis kurson,
pluraj ĉeestis ekskurson kaj vesperajn aranĝojn.

Dum julio, 3 membroj partoprenis la Universalan Kongreson de Brasilia - 2 el ili vizitis la grupojn de Rio-de-Janeiro kaj Sao Paùlo - 1 partoprenis seminarion en Salvador de Bahia.
2 membroj partoprenis kongreson en Dalfsen, Nederlando.

La 19an de septembro 1981, okazis la oficiala inaŭguro de la Ateliero de Esperanto en Aubel, malfermata de S-ro Remouchamps, Direktoro de la Kulturaj Aferoj de la Provinco Liège. Krome, parolis S-ro G. Maertens, Prezidanto de UEA, S-ro M. Demonty, Prezidanto de BEF, D-ro P. Denoël, Honora Prezidanto de BEF kaj respondeculo pri la Ateliero. El Belgio, Germanio kaj Nederlando, 175 personoj partoprenis tiun okazaĵon, kies feliĉiga sekvo estis televida elsendo en Antenne-Soir.

20/2/82 - Partopreno de deko da niaj geanoj al la malfermo de la S.I.A. en Loveno.

De la 22/2/82 ĝis la 4/4/82, ni ekspoziciis (kunlaborante kun la japana Eldon-Komitato por Hiroŝimo-Nagasako) panelojn kiuj montras la teruran rezulton de la atombomboj. Ni klopodis venigi la materialon en Belgion. Post du tagoj en Loveno, okaze de la malfermo de la SIA, ĝi estis montrita en la regiono de Liège : en 3 Kulturaj Centroj - Soumagne, Chênée kaj Seraing - kaj en 2 lernejoj - Supera Instituto pri Pedagogio de la Urbo Liège kaj Katolika elementa lernejo de Vcroux-Liers. En tiu lasta, oni petis prelegon pri la internacia lingvo dum septembro aŭ oktobro.
Ni kalkulis ke proksimume 2500-3000 personoj vizitis ilin; plej interese estas ke multaj gejunuloj el pluraj lernejoj vizitis ilin en ĉiuj lokoj.

Pasintjare, ni vane klopodis ĉe la Turisma Oficejo por ricevi esperantlingvajn propagandilojn. Ĉi-jare, mi senespere vizitis denove la Oficejon, kaj rikoltis etan rezulton : mi ricevis 300 fotokopiojn de nia esperantlingva teksto, por enŝovi ilin en franclingvajn propagandilojn.



../..

RAPORTO PRI LA AGADO DE A.P.E. - Periodo : 1/7/81-30/6/82.

- Eldono de kvinlingva leksikono de Jean Bovy -(Laboro de G. Vanbreuse)
Dro Denoël pretigis novan eldonon de "L'Esperanto dans l'Enseignement";
Sonorilo eldonis ĝin.
Eldono de 20.000 malgrandaj franclingvaj flugfolioj.

- Nia gazetara servo bone funkciadis dum la tuta jaro. Ĝi funkcias ankaŭ en la germanlingva regiono.

- La perkoresponda kurso estas sufiĉe kontentiga. Ĝis la fino de junio, dek personoj enskribiĝis.

- La kadrokursojn de FEL, 3 membroj sekvis kaj 2 aliaj partoprenis la lecionon de Sro Maertens pri la librotenado.

- Niaj grupoj malfermis plurajn kursojn. En Charleroi kaj Liège, funkciis vesperkursojn por plenkreskuloj.
En 3 lokoj, geinstruistoj gvidas kursojn en la lernejoj por infanoj kaj geadoleskoj : Eupen (34), Namur (ĉ. 30), Verviers (40), Welkenraedt (nombro nekonata).
La poŝtista amikaro el Verviers malfermis kurson kiun sekvis 6 gelernantoj.
Mi emfaze mencias la kurson kiun gvidas la prezidanto : de la grupo el Verviers, en la Supera Instituto pri Pedagogio de la Provinco Liège, en kiu li estas profesoro.
Alia interesa afero estiĝis en Verviers : ili aranĝis programitan kurson en "Basic", kiun povas uzi pli ol 200 posedantoj de mikro-komputiloj; laŭdezire la ekipitaj lernejoj rajtas disponi ĝin.
La nombro de la membroj pligrandiĝis en ĉiuj grupoj, ĉefe en Charleroi kaj Liège.

- La grupoj de Charleroi kaj Liège eldonas monatan bultenon, kaj Namur projektas fari la samon.

- La liega grupo organizis la trilandan renkontiĝon en Aubel (tuj post la ĉi-supre priparolita inaŭguro), kaj la membroj de APE partoprenas tian renkontiĝon dufoje ĉiu jare (pri la Liège-provincanoj, mi povas diri ekde 51 jaroj).

- Kiel ĉiujare, pluraj membroj de APE restadis 2 semajnojn en Grésillon - 2 vojaĝis al renkontiĝo en Ĉeĥoslovakio - 2 veturis al Tunizio pere de pasporta servo. En Liège, oni akceptis 3 fremdulojn.

- La Zamenhof-festo okazas en Liège, kaj estas partoprenita de membroj de la aliaj grupoj kaj de pluraj germanaj geanoj el Akeno.

- Pluraj membroj el ĉiuj grupoj profitis la elsendojn de la tiel nomataj "liberaj radioelsendoj" por informi la publikon pri la Internacia Lingvo.

- Per dusemajna laboro, helpo al la preparado de la Kongreso Universala : du membroj laboris al la preparado de la ekskursoj en Valonio.

- <u>Projektitaj agadoj por venonta jaro</u> : Kiel kutime, malfermo de elementaj kursoj, fare de niaj grupoj - Liège projektas perfektigan kurson.
Prelego de Dro H. FRANK el Paderborn, en la Pedagogia Instituto de la Urbo Liège.
En Verviers kaj Eupen, dissendo de E-Kurso per "libera radioelsendo".
La grupo el Verviers festos sian 75jaran ekzistadon.
Aranĝo de kadrokursoj kun la germanaj esperantistoj de la limregiono.

L.D.

**********************



Karavanoj kaj vojaĝeblecoj al la 68-a U.K.

Laŭ la nuna stato de niaj informoj, ekzistas pluraj proponoj por organizi kara_vanojn aŭ vojaĝojn el Belgio aŭ ĉirkaŭaj landoj :

I) UEA anoncas organizadon de peraviadila vojaĝo ekde AMSTERDAM. (620 gld.)

2) <u>Busvojaĝo al UK kaj IJK</u>
Rosette Van Herck ( Gebr.Van Raemdoncklaan 88, 2520 Edegem ) intencas organizi grupvojaĝon kaj kolektas informojn. Plej favora estus la prezo por 40 personoj. Ĉar la Junulara Kongreso okazos ankaŭ en Hungario dum la semajno antaŭ la UK, ŝi planas restadon de la 23/07 ĝis la 06/08. Ir- kaj revendaŭro : 2 tagoj kun I tranoktado. La plenkreskuloj povus ekskursi dum la IJK kaj la junuloj inverse. Ekskursoj preskaŭ senpagaj, buso kaj ŝoforo surloke.

3) <u>MONDA TURISMO : karavano al UK kun restadoj en Pollando kaj Vieno</u>
La vojaĝo okazos de la 22-a de julio ĝis la 9-a de aŭgusto.
Ĝi okazos per minibuso, en kiu povas sidi 9 personoj, restas eventuale ankoraŭ iu(j) loko(j).
Programo : Bruselo-Krakovo-Budapeŝto-Vieno-Bruselo.
Dumvoje eblos dum 4 tagoj partopreni la 2I-an Polan Esperanto-Kongreson kaj viziti Vienon dum unu tago.
Temas pri ± 4000 km ( kun lokaj ekskursoj ), do la kostprezo de la vojaĝo estus 8000 fr., al kiu aldoniĝus la dumvojaj loĝadoj kaj kongreskotizoj.
Informiĝu ĉe Monda Turismo Bruselo, Montoyerstr. 37,24 - I040 Bruselo
, private 02/5387I66.
N.B. Monda Turismo organizas krome regulajn karuselvojaĝojn Belgio - Pollando, karuseletojn al Zeeland, Eifel kaj Suffolk, kaj internaciajn renkontojn ( Bruselo-Antverpeno-Gento-Brugo ) ĉiumonate.
Informpetoj ĉe la sama adreso.

4) <u>Esperanto-trajno al UK ( Kolonjo - Budapeŝto )</u>
Esperanto-Centro Paderborn ( Grunigerstr.5, D 4790 Paderborn ) proponas specialan trajnon Kolonjo - Budapeŝto kaj reen.
Irvojaĝo : Kolonjo 29/07 ĉ. 22 h.
Budapeŝt 30/07 ĉ. I5 h.
Revenvojago : Budapeŝt 06/08 ĉ. I6 h.
Kolonjo 07/08 ĉ. II h.
La trajno konsistos supozeble el 9 kuŝvagonoj kun po 54-60 kuŝejoj, kaj I sidvagono kun 66-72 sidlokoj. La prezo estos 255 DM en sidvagonoj kaj 299 DM en kuŝvagonoj .

5) Flugoj ekde Zaventem por UK- kaj I.J.K. Prezo 10.500 BF: vidu p.5

<u>Fontoj de informoj</u>
Interclubs febr.83
Programo de Monda Turismo
Informilo de Esperanto-Centro Paderborn (5/2/83)

## Esperanto sukcesas en Belga elementa lernejo

Unuafoje en la Elementa Lernejo N.-D. de la Paco (Namuro), dank'al la nova juna direktoro, So DELEUZE, la 98 gelernantoj de la 5a jaro povis elekti la studon de Esperanto. La instruisto, unuan kurson, la 29an de Septembro 1982, estis mirigita, ĉar li nombris sur la benkoj 40 geknabojn (10-jarajn) tre entuziasmajn. Tio estas nova en Valonio, kaj ebligas esperi!

---

**68a Universala Kongreso de Esperanto**
**de la 30a de julio ĝis la 6a de aŭgusto 1983**
**en Budapeŝto, Hungario.**

---

Ni rememorigas ke
1. vi povas ricevi aliĝilon ĉe via landa peranto,
2. vi prefere resendu la aliĝilon kaj faru la pagon al via landa peranto.

Por Belgio, la landa peranto estas BEF, kies adreso kaj kontnumero estas indikitaj ĉe la unua paĝo de tiu-ĉi bulteno.
Laŭ la hodiaŭa kurzo de la Guldeno en Belgio (19 BF.), ni indikas ĉisube la kongreskotizojn en nia nacia mono:

| Kotizoj validaj ĝis la dato: | 31.03.83 | 18.06.83 |
|---|---|---|
| 1. Kongresano ne membro individua de UEA | 3933 BF | 4294 BF |
| 2. Kongresano individua membro de UEA kun Jarlibro........................ | 3458 BF | 3819 BF |
| 3. Kongresano individua membro de UEA kun Jarlibro kaj revuo .............. | 2736 BF | 3097 BF |
| 4. Edz(in)o de kongresano en kategorio 1. | 2755 BF | 3002 BF |
| 5. Edz(in)o de kongresano kategorioj 2/3. | 2432 BF | 2679 BF |
| 6. Junulo ĝis inkluzive 20-jara ......... | 1178 BF | 1292 BF |
| 7. Plentempa studento ĝis inkl. 30-jara.. | 1976 BF | 2147 BF |
| 8. Blindulo ........................... | 1577 BF | 1729 BF |

Kvankam la sekretario estas profesie bankisto (kompreneble tre bona ĉe la plej bona banko!), li ne povas publike antaŭdiri la morgaŭajn kurzojn. Do la eblaj diferencoj fariĝos gajnoj aŭ malgajnoj por la peranto (se ili ne tro altiĝos).
Tamen por eviti malgajnojn por la peranto, <u>la aliĝontoj povas pagi rondan sumon aŭ aldoni donacon por BEF.</u> Anticipan dankon!

Vi trovos ankaŭ kopion de aliĝilo en la sekvontaj paĝoj.



Via uea-kodo (se vi konas) : ..........

# ALIĜILO BUDAPEŜTO

KONGRESO de ESPERANTO
1983
BUDAPEŜTO

**68a UNIVERSALA KONGRESO de ESPERANTO de la 30a de julio ĝis la 6a de aŭgusto 1983 en Budapeŝto, Hungario**

| Kongresonumero |
|---|
| Dato de ricevo |

Konstanta adreso: Universala Kongreso de Esperanto, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando
Poŝtĉekkonto de la Kongreso: n-ro 627 337 (nederlanda), aŭ
Banko de la Kongreso: Amsterdam-Rotterdam Bank, Rotterdam, n-ro 42. 69. 01. 444.
LKK: Budapest, Pf. 193, H–1368, Hungario.
Bankkonto: OTP VIII. ker. 516-10005

☐ Mi aliĝas al la Kongreso laŭ la kondiĉoj presitaj sur la dorsa flanko. Mi sendas la pagon laŭ la apuda specifo al:

..................................

per poŝtmandato /poŝta ĝiro/ banka ĝiro/ banka ĉeko *

☐ Mi ne povas jam aliĝi pro pasportaj aŭ transpagaj problemoj. Mi promesas pagi tuj post alveno en la kongresejo.

| | |
|---|---|
| Kotizo (en kategorio. . . ) | .......... |
| Adopta Kaso . . . (Libervolaj donacoj) | .......... |
| Blindula Kaso . . . (Libervolaj donacoj) | .......... |
| Literatura Kaso (Libervolaj donacoj) | .......... |
| Adoptaj Gepatroj . . . (Libervolaj donacoj) | .......... |
| Bankkostoj ........ | ---------- |
| Entute ...... | .......... |

Viro/Virino* Profesio-fako (nedevige, por aperigi en Kongresa Libro) ..................
Nomo (familia aŭ ĉefa, por alfabeta ordigo) ....................................
Nomo (kompleta) ...............................................................
Kompleta poŝta adreso: nacilingve en latinaj literoj kun poŝtkodo ĝuste lokita
.................................................................................
.................................................................................
Lando (en Esperanto) ...........................................................
Naskiĝdato (nur por studentoj, junuloj kaj infanoj) ..............................
Nomo de edz(in)o, kiu jam aliĝis aŭ aliĝas samtempe (aparta aliĝilo) ..................
Dato de tiu ĉi aliĝilo ......./...... Subskribo ......................................
Por uzo de la administracio

| UEA-membreco: kotizo de . . . . . | ricevita por la jaro . . . . . . . . . . . . . . . . . |
|---|---|
| Konfirmo de la C. O.: | Konfirmo de peranto: . . . . . . . . . . . . . . . |

| Pago ricevita | Konfirmilo sendita | Statistikita | 2a Bulteno sendita | Kongreslibro sendita |
|---|---|---|---|---|
| | | | | |

* Forstreku la nevalidajn. Pagante internacie per banko aŭ ĉeko, bv. aldoni 6 gld. pro la bankkostoj.

| Kongreskotizoj validaj ĝis la dato: | 1982. 12. 31. | | 1983. 03. 31. | | 1983. 06 18. | |
|---|---|---|---|---|---|---|
| | gld | for-oj | gld | for-oj | gld | for-oj |
| 1. Kongresano ne membro individua de UEA . . . . . | 188 | *2474* | 207 | *2724* | 226 | *2974* |
| 2. Kongresano individua membro de UEA kun Jarlibro . . . . | 163 | *2145* | 182 | *2395* | 201 | *2645* |
| 3. Kongresano individua membro de UEA kun Jarlibro kaj revuo | 125 | *1645* | 144 | *1895* | 163 | *2145* |
| 4. Edz(in)o de kongresano en kategorio 1 . . . . . . . . | 131 | *1724* | 145 | *1908* | 158 | *2079* |
| 5. Edz(in)o de kongresano en kategorio 2 aŭ 3. . . . . . | 114 | *1500* | 128 | *1684* | 141 | *1856* |
| 6. Junulo ĝis inkluzive 20-jara . . | 56 | *737* | 62 | *816* | 68 | *895* |
| 7. Plentempa studento ĝis inkluzive 30-jara . . . . . . . . . | 94 | *1237* | 104 | *1370* | 113 | *1487* |
| 8. Blindulo . . . . . . . . . | 75 | *987* | 83 | *1092* | 91 | *1198* |

Post la 18a de junio 1983 aliĝoj ne plu estos akceptataj, se tamen, la aliĝontoj devos pagi surloke en la kongresejo, laŭ la koncerna tarifo de la lasta periodo plus krompago 40 gld.

* **La kongreskotizo ne inkluzivas** loĝadon, ekskursojn aŭ bankedon. Pri tiaj aferoj aperos informoj kaj mendiloj en la Dua Oficiala Bulteno aperonta en februaro. Frua aliĝo helpas la aliĝanton ĝustatempe fari siajn mendojn ĉe la Kongreso.
* **Por la limdatoj** kaj aliaj kondiĉoj validas la dato de la pago. Aliĝilo estos traktita nur post ricevo de la kompleta pago.
* **La kongreskotizo ne estas repagebla,** eĉ se la aliĝinto poste ne partoprenas la Kongreson. Pagante kongreskotizon por alia persono, oni tion antaŭvidu.
* **Kongresaliĝo ne estas transdonebla** al alia persono.
* **Kongresano en kategorio 1** (nemembro de UEA) ricevas la revuon „Esperanto" dum la tuta kalendara jaro, en kiu okazas la Kongreso.
* **Kongresano en kategorio 2 aŭ 3** devas pagi la membrokotizon de UEA **antaŭ aŭ samtempe kun** la kongreskotizo. Sen tio la aliĝilo ne estos traktita.
* **Kongresano en kategorio 6** devas indiki sian naskiĝdaton.
* **Kongresano en kategorio** 7 devas indiki sian naskiĝdaton kaj sendi kun sia aliĝilo oficialan ateston pri sia studenteco.
* **Kongresano en kategorio** 8 devas sendi kun la aliĝilo oficialan ateston pri blindeco de blindula organizaĵo aŭ kuracisto. Gvidanto de aliĝinta kaj samtempe aliĝanta blindulo rajtas aliĝi senpage, sed ne ricevas la Kongresan Libron.
* **Infano malpli ol 13-jara** rajtas aliĝi senpage, se samtempe aliĝas almenaŭ unu el la gepatroj, sed ne ricevas la Kongresan Libron.
* **Ĉiu aliĝanto devas plenigi apartan aliĝilon.** Se oni ne havas aliĝilon, oni uzu fotokopion aŭ **samformatan** paperon. **Skribu klare – tajpe aŭ preslitere.**
* **Sendu la aliĝilon kaj faru la pagon al la sama instanco** – prefere al via landa kongresa peranto, se tia mankas – al Rotterdamo.
  Aliĝantoj el Bulgario, Ĉeĥoslovakio, GDR, Hungario, Pollando kaj Sovetio kontaktu sian landan asocion, el Rumanio turnu sin al LKK.
* **Personoj kun transpagaj aŭ pasportaj problemoj** povas sendi la aliĝilon, sen samtempa pago, al la konstanta adreso en Rotterdam. Tiuj personoj ne estos rigardataj kiel jam aliĝintaj, sed ili havos la rajton aliĝi tuj post la alveno en la kongresejo, pagante tie la kotizon laŭ la tarifo de la unua periodo.

# ESPERANTO EN BELGIO

Monata bulteno (Bulletin mensuel - Maandelijks blad)

de la BELGA ESPERANTO-FEDERACIO Montoyerstrato 37 b.24
B-1040 BRUSELO
Postĉekkonto 000/0163434.86 Tel.(02)5135995

Respondecas (Editeur responsable - Verantwoordelijke uitgever) :
La ĝenerala sekretario : André MERTENS GOOSSENS
Priorijstr. 4 B-1720 DILBEEK

Redakcio
La estraro de B.E.F. prizorgu la materialon por tiu bulteno.
Krome, ĝi atendas kunlaboraĵojn el la tuta lando.
La artikoloj estu prefere klare tajpitaj!

BEF - ESTRARO

| | |
|---|---|
| Prezidanto | : Marc DEMONTY (Bruselo) |
| Vicprezidantoj | : Lambertine DREZE (Liego)<br>Edward SYMOENS (Kalmthout) |
| Sekretarioj | : André MERTENS GOOSSENS (Bruselo)<br>Clément THOLET (Liego)<br>Jan BOVENDEERD (Mortsel) |
| Kasisto | : Jules VERSTRAETEN (Antverpeno) |

BEF-Kadrokursoj

Jen rememorigo de la venontaj kursoj en la ĉijara programo:
- 30-04: Kunven- kaj debatteknikoj -gvid. PAUL PEERAERTS.
- 28-05: Movadhistorio - ,, Dro POL DENOEL.
- 18.06: Komunik. inform- k. propagandtekn.- ,, ANNE TILMONT.

La kurso daŭras de la 10a ĝis la 16a horo; dum la tagmeza ripozo, eblas favorpreze manĝi en la cirkaŭaĵo de la kursejo.
Pliaj informoj pri la venontaj kursoj, i.a. pri la situo de la ejo, ĉe la Prezidanto de BEF, Marc Demonty, av. des Missionnaires/Missionarissenl., 39 b5, B.1080, Bruselo (tel.02/5201344).

## LA INFORMOJ DE "ESPERANTO EN BELGIO"

devenas de multaj en- kaj eksterlandaj fontoj. Inter ili estas dekoj da periodaĵoj: tutmondaj, internaciaj, fremdlandaj, hejmlandaj, regionaj, lokaj, fakaj, k.t.p. . Dudekon da revuoj la sekretario mem abonas, ĉefe mondaj eldonaĵoj aù tiuj de eùropaj kaj samlandanaj organizoj; tamen li ne kapablas aboni pliajn esperantajn revuojn: interesaj revuoj estas tro multnombraj...!
Feliĉe la Belga Esperanto-Federacio, regule (aù neregule) ricevas kelkdek klubajn, sed precipe eksterlandajn informilojn aù magazinojn. Por tio la sekretariato kore dankas la sendantojn: kompreneble ĝi ĉiam aperigos en sian bultenon aù kunvenojn la plej interesajn komunikaĵojn.
Ankaù BEF regule sendas ĉitiun (modestan) bultenon al pluraj dekoj da internaciaj, fakaj aù landaj organizoj - aù al ĝiaj respondeculoj - ; sed kelkaj, malmultaj, ne sendas reciproke ilian informilon al la Belga Federacio. La sekretario tion multe bedaùras. Ne miskomprenu tiun rimarkon, mi petas! Li neniel volus kritiki, ĉar li ja scias ke por iuj asocioj aù komitatoj, pro konkretaj malhelpoj, ne eblas periode sendi informilojn al nia landa asocio; sed ĉu estas ĉie la kazo? (Ekz. ĉe vi?)
La Belga Federacio nur ŝatus ricevi - kaj transdoni - informojn pri amikoj el la tuta Esperantio; do ĝi afable petas: bonvolu helpi ĝin sendante viajn interesajn informilojn! La multaj legantoj de "Esperanto en Belgio" feliĉus ricevi pliajn samideanajn novaĵojn el apudaj lokoj aù foraj landoj.

A.MG.

## KOMUNA ĜENERALA JARKUNVENO DE BEFA KAJ FERN

"TAMEN", organo de la BELGA ESPERANTO FERVOJISTA ASOCIO, en sia januara numero anoncas ke ĉijare la komuna jarkunveno de BEFA kaj FERN (NL) okazos je la semajnfino 23a/24a de aprilo en Oudleusen apud Dalfsen en la provinco Overijssel-Nederlando. En la grandaj konstruaĵoj de la konferencejo povas kunveni, manĝi kaj tranokti eĉ 600 partoprenantoj. La aranĝo entenos belan ekskurson, kunvenojn, distran vesperon, kaj la manĝojn. Prezo= ±1675 BF.
Aliĝo ĉe S-ro R. Steenhout, O/Chst. Denderleeuw.

A.MG.

## 35A IFEF-KONGRESO OOSTENDE - 4a ĝis 10a de junio 1983 -

La sama Belga Asocio havas la taskon organizi la 35an Kongreson de la INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-ASOCIO, kiu okazos en junio en la Festa kaj Kultura Palaco en Ostendo. La varia programo entenos kunsidojn, prelegojn, distrajn vesperojn, tri ekskursojn, k.t.p..
Rezervitaj hoteloj situas proksime de la kongresejo.
Aliĝo:
LKK-Prezidanto: L. De Sutter, Staciestro, Etterbeek.
LKK-Sekretario: R. Steenhout, Substaciestro, Denderleeuw

A.MG.

**Por plenigi la paĝon...**
kaj ne malŝpari paperon, la redaktoro aperigos sub tiu titolo (ekde la 1a de aprilo) eltiraĵojn de nekonata verko de nova esperantlingva aùtoro A.MeGo:...Mendu tiun verkon per antaùpago de 100 BF al la konto de BEF, por kuraĝigi la verkanton, kaj subteni eldononton.



## ESPERANTO EN EÙROPO

Eùropa parlamentano, la 22an de novembro 1982, proponis al la Ministra Konsilio rezolucion pridiskuti la oportunon de la enkonduko de Esperanto kiel elektebla fako en la unuan-gradan kaj superan instruadon en ĉiuj membrolandoj de la Eùropo Komunumo.
Ni multaj subtenu tiun agon kaj gratulu la proponinton! Skribu prefere en la franca aù en via gepatra lingvo al:
Monsieur ERNEST GLINNE, député européen,
3, boulevard de l'Empereur, B-1000, Bruxelles.

A.MG.

## ESPERANTO-RAPIDKURSO POR EÙROPAJ OFICISTOJ

Rapidkurson pri la Internacia Lingvo, en aùstria vilaĝeto de la 28a de majo ĝis la 11a de junio, planas kunlaborantoj de la eùropaj komisionoj en Bruselo. Ĝi estas destinita al la oficistoj de la diversaj eùropaj asembleoj. Kontaktadresoj:
S-ino Els BUYSSE, Genevestr. 113 b.20, B-1140, Brussel.
S-ro Michel CWIK, av. de Tervuren 175, B-1040, Bruxelles.

A.MG.

## EÙROPA KLUBO

Societo pri lingvolimtranspaŝa eùropa interkompreniĝo

Dum la lastjara ĉefkunveno de la Eùropa Klubo, elektiĝis por la funkcio de prezidanto la belga zoologo D-ro Wim DE SMET. Krome estraraniĝis Prof. D-ro Pennacchietti, Prof. D-ro Neergaard, la franca lingvisto Simonnet, la fama magiisto Kindler-Trixini, D-ro von Petzinger el la Paderborna Universitato, kaj la hamburga matematikisto D-ro Bink.
Ekde 01.01.1983, la Centra Oficejo de EK havas novan adreson:
EÙROPA KLUBO, Poŝtkesto 3, B-1040 Bruselo.

A.MG.

## LA NOVA PREZIDANTO DE LA EÙROPA KLUBO

estas konata aktivulo de la Esperanto-movado en Belgio kaj en la mondo. Doktoro en zoologio el la Katolika Universitato de Loveno, li estas ankaù konata sciencisto en universitataj medioj en pluraj eùropaj landoj. Li estas la aùtoro de nova nederlandlingva Esperanto-lernolibro por plurilingvanoj: ESPERANTO SNEL ASSIMILEREN, lastjare eldonita de neesperanta eldonejo "De Nederlanden" el Antverpeno.

A.MG.

## SEMINARIO PRI NOVA BIOLOGIA NOMENKLATURO

W.M.A. DE SMET estas ankaù la ĉefgvidanto de la Asocio por la Enkonduko de Nova Biologia Nomenklaturo, kiu organizos Seminarion pri NBN en Nieuwpoort (Belgio) de 12a ĝis la 15a de majo 1983.
Informoj: Asocio NBN, Hertendreef, 12, B-2180 Kalmthout, Belgio.

## ESPERANTO ĈE LA PARLAMENTANOJ

La 27an de oktobro 1982 fondiĝis en Strasburgo la Interparlamenta Esperanto-Grupo (IPEG). S-ro Brian M. KEY organizas la novan institucion, kun S-roj Brian BARKER kaj Graham LEON-SMITH. La Eùropa Esperanto-Centro en Bruselo kunlaboras. IPEG estas tutmonda asocio de membroj de naciaj parlamentoj kaj ankaù de superŝtataj organizoj.

ESPERANTO EN VALONIO.

Ek de la komenco de nia jarperiodo (tio estas la 1an/7/82), A.P.E. vivis sufiĉe diligente.

Multaj geanoj partoprenis la 67an UK-on en Antverpeno, pluraj ne aperinte en la kongreslistoj, ĉar ili ĉeestis nur de unu ĝis kvar tagojn. Deko helpis la LKK-on (giĉetoj, kongreseto, gvidado de ekskursoj aŭ de fremda grupo).

La perkoresponda kurso tute bone sukcesas. Jam ek de aŭgusto, ĝi reviviĝis, kaj de tiam ĝis la fino de decembro, ni enskribis 12 novulojn. Krome, grupoj havas ankaŭ kelkajn regionajn demandojn.

En septembro kaj oktobro, ĉiuj grupoj denove malfermis kursojn. Jen, kelkaj bonaj ekzemploj :

- en Eupen, kurso en la liceo kaj per la radio-elsendoj;
- en Liège, elementa vesperkurso, perfektiga rondo kaj (post informa prelego en la universitata aŭlo) kurso por la 3a-aĝa Universitato;
- en Namur, kiel pasintanjaron, kursoj en elementaj lernejoj kaj liceo (ĉ. 60 gelernantoj) kaj vesperkurso;
- en Verviers, kurso en elementa lernejo, liceo, pedagogia instituto, kaj cetere per radio-elsendoj.

Tria grupo (t.e. Namur) eldonas monatan bultenon. Ĝi aspektas bele kaj bone verkita.

A.P.E. invitis D-ron Helmar FRANK el Paderborn por prelegi en la Supera Pedagogia Instituto de la urbo Liège. Ĉirkaŭ 80 gestudentoj kaj tri profesoroj aŭskultis lin kun ega atento. Tio okazis la 29an de novembro.

Meze de decembro, la Zamenhof-festo en Liège tre bone sukcesis; geĉeestantoj el Hasselt kaj Aachen akompanis la Lieĝanojn en la ludoj, kantado kaj manĝado; tre gaje pasigis la vesperon entute 60 personoj, ĉar - ho ve! - la malvasteco de nia salono ne obligas pli multnombran partoprenadon.

La 9an de oktobro, geanoj de ĉiuj niaj grupoj partoprenis la trilandan renkontiĝon en Düren (Germanio), dum kiu oni pritraktis la eventualan organizadon de la kadrokursoj far de BEF-APE kaj Germanoj.

En la estonteco, ni antaŭvidas la venontan trilandan renkontiĝon en Verviers, kie la loka grupo samokaze festos sian 75an ekzistadon; krome, ni esperas la organizon de la kadrokursoj.

Dume, niuj kluboj laŭre kunsidas kaj okazigas interesplenajn prelegojn kaj perfektigajn aranĝojn.

L.D.



# Internaciaj Vesperoj

*Por krei internacian lingvon ne sufiĉas nomi ĝin tia...*
(L.L. Zamenhof)

En la klubejo de 'La Verda Stelo' (Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen), ni strebas krei pli internacian etoson dum la tuta jaro, i.a. per la

Ĉiun duan vendredon de la monato (escepte de julio kaj aŭgusto), je la 20-a horo, vi povos aŭskulti al kaj paroli kun eksterlanda gastparolanto.

Sed jam pli frue vi povos ĝui agrablan restadon inter gesamideanoj: ekde la 18-a horo ni malfermas la klubejon kaj ofertas vespermanĝon je tre modera prezo.

La nomoj de la parolontoj aperos en 'Esperanto-Panorama'.

# LEA-INFORMO

## POR ĈIUJ AMIKOJ DE LA INTERNACIA LINGVO



UNUAFOJE: komuna renkontiĝo: Luksemburga Kultura Semajnfino kaj Kongreso de Esperanto-Federacio de Orienta Francio. La kunveno okazos en Eŭropa Domo, en Luksemburgo, de la 22 ĝis la 24-a de aprilo.

Riĉa kultura kaj distra programo, kun juneca etoso: vizitoj tra la urbo, luksemburga vespero, internacia vespero kun partopreno de luksemburgaj artistoj kaj de Feri Floro, la nova floro de la esperanta kulturo, gustumado de luksemburgaj vinoj, ktp.

Prezoj aparte modestaj por gejunuloj!

Por aliĝo kaj pluaj detaloj, sin turni al C. Nourmont, 3 rue Kleppchen, L-5682 Dalheim.

## MARKOLA KONGRESO
## FOLKESTONE, BRITUJO

vendredo, la 29a de aprilo vespere, ĝis lundo la 2a de majo 1983

Loĝado  Mendebla rekte de:-
Southcliff Hotel, 25 The Lees, Folkestone, Britujo CT20 2DY
(Telefono: Folkestone (0303) 56075)  Situanta sur la klifo fronte al la maro, 1½ km okcidente de la haveno.

Prezoj  Po £15,50 tage por lito, matenmanĝo, bufeda lunĉo kaj vespermanĝo. Ĉiuj prezoj inkluzivas aldonvaloran imposton. *** *** Kontraŭa informo kiu aperis pli frue estis erara.
Tiuj, kiuj ne loĝas en la hotelo rajtas antaŭmendi individuajn manĝojn. (Lunĉo £1,25; Vespermanĝo £3,45)

Antaŭpago  £5 (kvin pundoj) pagenda kun antaŭmendo.

por Loĝado  Alilandanoj bonvolu skribi sur ĉekoj:-

Southcliff Hotel (Folkestone) Ltd.
Five English Pounds (£5)

La banko de la hotelo akceptus tiajn ĉekojn el aliaj landoj.

Specialaj Bezonoj  Oni bonvolu mencii ĉi tiujn kun antaŭmendo, ekzemple, se oni estas vegeterano.
Estas konsilinde, ke oni frue mendu unupersonan ĉambron.

Tendumado  Estos eblecoj. Pri ĉi tiuj, bonvolu peti informojn de S-ino Randall frue en 1983.

Kongresaliĝoj  Kotizo de £2 (du pundoj) estos pagenda je alveno. Se vi venos al la Kongreso sed ne loĝos en la hotelo, bonvolu antaŭinformi S-inon Randall. · Ne necesos fari tion se vi antaŭmendos ĉambron de la hotelo.

Korespondado  Bonvolu skribi pri ĉio rilate al la hotelo rekte al la hotelo. Pri ĉiuj aliaj aferoj bonvolu peti informojn de:-
S-ino P.Randall, 5 Wiltie Gardens, Folkestone, Britujo CT19 5AX

## PROGRAMAJ NOTOJ

Vendredo.  Ek de 16h00 oni disdonos dokumentojn kaj akceptos kotizojn kaj pagojn por ekskursbiletoj.
La vespermanĝo estos je 18h30.

Sabato.  Estos ekskurso al la kastelo en Dovro.
Vespere la Prezidanto de la Regiona Konsilantaro de Shepway oficiale bonvenigos la kongreson.

Dimanĉo. S-ino Jelly Koopmans-Schotanus kondukos Ekumenan Diservon.

Lundo. Estos eblecoj partopreni organizitajn esplorojn en Folkestone. Oni aranĝos amuzaĵojn en la hotelo se la vetero ne permesos promenadon.

Oni antaŭvidas, ke inter la ĉeestantoj estos Ges-roj Markarian kaj S-ro Brownlee, kiuj aranĝos muzikon, dancadon kaj elmontradon de japanaj lertaĵoj.

Detalan programon oni disdonos je la alveno.



Kultura Centro Esperantista
Centre culturel espérantiste
Esperanto-Kulturzentrum
Centro culturale esperantista
Center culturel esperantist
Esperanto Cultural Centre

Postiers 27
Poŝtfako 771
CH-2301 La Chaux-de-Fonds
Svislando
Telefono 039 26 74 07
Poŝtkonto 23-2921

KCE KULTURA CENTRO ESPERANTISTA

IFA Internacia Feria Altlernejo
GEP Gastejo Edmond Privat
KEL Komisiono «Esperanto Lernejen»
Pro Esperanto

Kultura Centro Esperantista, Pf. 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds

## ESPERANTO-STAĜOJ POR PROGRESANTOJ
## KULTURA CENTRO ESPERANTISTA
## LA CHAUX-DE-FONDS (SVISLANDO)

1983 februaro 22/27 - marto 22/27 - aprilo 19/24 - junio 21/26
julio 24/29 - julio 31/aŭgusto 5 - aŭgusto 14/19 - aŭgusto 21/26
septembro 4/9 - septembro 11/16 - septembro 25/30 - oktobro 2/7
oktobro 25/30 - novembro 22/27 - 1984 januaro 24/29

Vi deziras lertiĝi en la praktikado de la internacia lingvo, do niaj esperanto-staĝoj por progresantoj tutcerte kontentigos vin.

Bonvenaj estas ĉiuj, kiuj komprenas esperanton, kapablas sin esprimi en ĝi parole kaj skribe, eĉ se kun multaj gramatikaj eraroj. (Kiuj ĵus eklernis la lingvon kaj ankoraŭ ne kapablas paroli ĝin, tiuj petu la informilon pri la "esperanto-staĝoj por komencantoj").

Vi ekzerciĝos parole, lege kaj skribe helpe de instruado taŭge programita, distra kaj humurplena. La gvidanto de la staĝoj, Stefano Keller, esperanto-instruisto kaj psikopedagogo, efike helpos ĉiujn per metodoj aŭd-vida, perbilda, pergesta kaj strukturŝanga. Vi intimiĝos kun karakterizaj pensoj, tekstoj kaj personecoj de la esperanto-movado. Vi tutcerte ricevos respondon al viaj lingvaj demandoj.

Tia plurtaga kunestado de studemaj esperantistoj en heterogena grupo estas ĉiam ege riĉiga lingve kaj kulture. Do nepre partoprenu staĝon!

.......................................................................................

ALIĜILO (fortranĉu kaj sendu al: KCE, PF 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando)

Substreku, kio vin koncernas kaj skribu tre legeble!

Mi aliĝas al la esperanto-staĝo por progresantoj de (dato):
Nomo familia:  Nomo individua:
Sekso: ino / viro  Naskiĝjaro:  Profesio:
Adreso: Strato:  Domnumero:
Poŝtkodo:  Loko:  Lando:

Tranoktado: Mi preferus tranokti en ĉambro 1-, 2-, 4-lita.

Mi konfirmas mian aliĝon per la sendo de 50.- svisaj frankoj, kiel antaŭpago, al la poŝtĉekkonto 23-2921, de Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds (la PĈK-a centro estas la urbo La Chaux-de-Fonds mem).

Dato:  Subskribo:

Eventualaj rimarkoj:

ESPERANTO - DOMO
Grésillon, 49150 BAUGE (Francio)
Tel: (41) 89 10 34
ekster la aranĝoj prefere skribu

## K U L T U R A J   A R A N Ĝ O J   1 9 8 3

PRINTEMPO

Internacia Renkonto de Infanoj

alveno Dimanĉon 3-an de Aprilo posttagmeze
foriro Sabaton 9-an de Aprilo posttagmeze

- kursoj, distraĵoj, diskutrondoj pri lingvo-instruado

SOMERO

**PRELEGOJ kaj KURSOJ**

alveno Sabaton 2-an de Julio - foriro Vendredon 22-an de Julio

- prelegoj diverstemaj
- kursoj diversnivelaj por internacia ĉeestantaro
- konversacioj
- malkovro de la regiono

**DUA LOJRA ESPERANTO-RENDEVUO (23/24 JULIO)**
organizita de L.F. Koop

alveno Vendredon 22-an de Julio - foriro Lundon 25-an de Julio

- studgrupoj por progresantoj, perfektiĝantoj kaj fluaj parolantoj

**KURSOJ**

alveno Lundon 25-an de Julio - foriro Dimanĉon 7-an de Aŭgusto

- kursoj trinivelaj por internacia ĉeestantaro
- konversacioj - artlaboroj
- malkovro de la regiono

**ARTMETIOJ kaj ESPERANTO**

alveno Lundon 8-an de Aŭgusto - foriro Dimanĉon 21-an de Aŭgusto

- fotoarto, ceramiko, ŝtofmozaiko, kartonlaborado...
  gvidataj nur en Esperanto
- kurso direktita al manlaborado kaj artmetioj
- vizito de la regiono kaj de artmetiistoj

**RENKONTO de BLINDULOJ (organizita de FUBE)**
ankaŭ malfermita al vidpovaj gesamideanoj

alveno Lundon 22-an de Aŭgusto - foriro Sabaton 3-an de Septembro

- prelegoj, kursoj, distraĵoj

La revuo "Kulturaj kajeroj" alportas agrablajn legaĵojn kaj novaĵojn el la Esperanto-Domo.



## KONKURSOJ POR LA VENONTA U.K. EN BUDAPEŜTO ORGANIZITAJ DE ILEF

Okaze de la venonta Universala Kongreso de Esperanto en Budapeŝto, la INTERNACIA LIGO DE ESPERANTISTOJ FOTO-KINO-MAGNETOFON-AMATOROJ (I.L.E.F.), faka organizaĵo aliĝinta al UEA, kadre de siaj aktivaĵoj organizas la jenajn konkursojn:

### FOTO-KONKURSO

Tipo: Kolora aŭ nigra/blanka
Bildformato: inter 24x30 cmj (min.) kaj 30x40 cmj. (maks.)
Kvanto: 3 diversaj fotografaĵoj maksimume.
Sendo-maniero: Titolo, pseŭdonimo kaj mezuroj skribita dorse de la konkursaĵoj. Ene de fermita koverto akompanante ilin, en kiu aperos la pseŭdonimo de la partoprenanto, estos paperfolio kun la nomo kaj adreso de la konkursanto kune kun lia pseŭdonimo, titoloj kaj mezuroj de la sendita; fotoj.
Limdato: la 30-a aprilo 1983, laŭ la poŝtstampilo.
Sendadreso: al S-ro HANS R. SCHMIDT, Schweriner Allee, 35, DDR-2800 - Ludwigslust - D.R. Germanio.
Temo: "LA POPOLA ARTO - PONTO INTER LA POPOLOJ".

### FILMO-KONKURSO

Filmtipo: Super 8/mm, sonigita (magneta bendo), kolora kaj ne pli ol 30 minutojn longdaŭra.
Kvanto: 2 filmoj maksimume.
Sendoformo: Filmoj titolitaj kaj signitaj per pseŭdonimo ekstere de pakaĵo, akompanataj de fermita koverto en kiu aperos la psŭdonimo, titoloj kaj longdaŭro kaj - interne de ĝi - paperfolio kun la psŭdonimo kaj vera nomo kaj adreso de la konkursanto.
Limdato: la 30-a aprilo 1983, laŭ la poŝtstampilo.
Sendadreso: Al S-ro José F. Arroyo, Avda. Llano Castellano, nº 11, 7ºD, Madrid-34 - Hispanio
Temo: "LA POPOLA ARTO - PONTO INTER LA POPOLOJ"

### SONBENDO-KONKURSO

Sonbendtipo: Normala kasedo, 1 hora daŭro (2x30 min.) mono aŭ stereo.
Kvanto: 2 kasedoj maksimume
Sendo-maniero: Kasedoj titolitaj kaj signitaj per pseŭdonimo, akompanataj de fermita koverto en kiu aperos ekstere la pseŭdonimo kaj titoloj kaj, interne, paperfolio kun pseŭdonimo kaj vera nomo/adreso de la konkursanto.
Limdato: la 30-a aprilo 1983, laŭ poŝtstampilo.
Sendadreso: al S-ro PETKO ARNAUDOV, str. N. Popkonstantinov, 40, 4400 PAZARĜIK, Bulgario.
Temo: "LA POPOLA ARTO - PONTO INTER LA POPOLOJ"

PREMIOJ.- La premioj por tiuj ĉi konkursoj ne estas ankoraŭ definitive fiksitaj kaj ĝis nun ni povas nur certigi pri la Unua Premio por la filmamatora konkurso, konsistanta je originala skulptaĵo/trofeo signita de la aŭtoro (eble akompanata de monsumo), kiu jam estis oferita de la Madrida Esperanto-Liceo. Tamen, almenaŭ unu monaton antaŭ la UK en Budapeŝto, ILEF publikigos pliajn detalojn kaj premiojn asignitajn al la diversaj konkursoj.
La fotografaĵoj selektitaj estos ekspoziciitaj dum la UK en la kongresejo. La premiitaj filmoj kaj eble la plej interesaj el ĉiuj partoprenantoj, estos projekciitaj kadre de la kongresaj aktivaĵoj kaj oni aranĝos adekvatan horaron kaj lokon por aŭskulti la premiitajn sonbendojn. La premioj estos disdonitaj dum la anonco de la premioj por la Belartaj Konkursoj.
NOTO.- Por la returno de la konkursaĵoj, la konkursantoj devus sendi respondkuponojn, kiuj egalvaloros la poŝtkoston.
Iu ajn premio aŭ trofeo oferita de loka grupo aŭ landa asocio, estos bonvena.

## SUBTENU LA OAZON!

Post niaj prelegoj kaj poresperantaj klopodoj en 42 landoj, multaj el la legantoj konas nin tiom bone, ke ili kredas, ke ni ĉiam helpas la disvastigon de Esperanto. Nun ni ŝatus voki vian atenton al la "Esperanto-Oazo".

Kampadejo kun spaco por 30 tendoj, kun ruldomoj kaj ĉambroj por lui. Ĝi situas 10 km for de la strando ĉe Gandia kaj 70 km de Valencia (Hispanio). Oni ne aŭdas aŭtomobilojn, vi povas dormi profunde kaj pace. La tereno estas en ebena valo kaj ĉirkaŭita per belaj oranĝarbaroj kaj krudaj montoj.

La temperaturo estas ĉiam bona. La tero, ne tre malmola por tendostiftoj. Sunenergio provizas sufiĉe da varma akvo; necesejoj kaj lavejoj estas tre modernaj kaj puraj. La naĝejo estas kahelita kaj 6x12 m granda.

Samideano Akiles Sanz intencas enlasi nur esperantistojn kaj iliajn familiojn. Li komencis ĝin antaŭ du jaroj, sed ĝis nun nur malmultaj vizitantoj venis. Sen pli da gastoj, li devos fermi tiun laŭdindan "Esperantio".

Plej korsincere mi rekomendas ĝin al ĉiuj esperantistoj, iam ajn dum la jaro. Vi povas eĉ decidi resti tie por ĉiam aŭ dum monatoj aŭ jaroj, aŭ aliĝi al Sanz-kooperativo.

Skribu al li por pliaj informoj kaj vizitu la Oazon, ĉar sen via subteno tiu belega kaj inda feriejo ne plu estos Esperanto-Oazo sed senesperantista dezerto.

(Jim Dimo / Aŭstralio)

Jim Dimo



Borgerhout, 20/10/82

Karaj Gesamideanoj,

Jam plurfoje, – kaj ĉiam kun sukceso, – mi prelegis en mia grupo, "La Verda Stelo". Antverpen, el mia propra verkaro. La preparo de tia prelego havigas al mi multe da laboro, kaj pro tio mi bedaŭras ke poste la tekstoj definitive malaperas en tirkesto.

Pro tio mi estas preta fari la samajn prelegojn ankaŭ por aliaj grupoj, kondiĉe ke ĉeestu almenaŭ deko da personoj.

Se, en tiu senco, vi opinias ke mi povas esti utila al via grupo, bonvolu kontakti kun mi.

Altestime kaj samideane,

Rik de Roover
Luchtvaartstr. 28
2200 - Borgerhout
Tel. 03/321.23.06

nova telefono ekde 1983:
03/667.57.70

TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
via Trento, 1
I 34132 Trieste, Italia

Poezia Konkurso
"INTERNACIA AMIKECO" - 1983
Regularo
^^^^^^^^

1. Estas organizita de Triesta Esperanto-Asocio, okaze de la semajno de internacia amikeco 1983, poezia konkurso, por poemoj verkitaj rekte esperantlingve.
La temo estas libera.

2. Ĉiu autoro povos prezenti unu poemon, sendante ĝin al TEA-sidejo, ĝis la 31.5.1983, en kvar kopioj, unu havanta la nomon kaj la adreson de la verkinto, ĉiuj tajpitaj klare kaj legeble.

3. Adreso de la konkurso estas la TEA-sidejo, en via Trento 1, I 34132 Trieste, Italia, kaj sekretariino de la konkurso estas d-rino Ariella Colombin.

4. La poemoj estos juĝataj de tri kritikistoj: poeto Aldo de Giorgi, p-rino Clelia Conterno Guglielminetti, d-ro Piergiorgio Soranzo.

5. La plej belaj poemoj, stile kaj enhave, estos legataj dum festpremiado, okazonta en Triesto, oktobron 1983, de geaktoroj.
Al tiu manifestado estos invitataj ĉiuj partoprenontoj al la konkurso kaj la kritikistoj.

6. Unu poemo venkos premion, kiu konsistos el esperant-lingva libro, sufiĉe grava, eldonata dum la jaro.

7. Anoncoj pri la rezultoj de la konkurso kaj de la sekvaj manifestadoj aperos revue kaj radie.

8. La poemoj sendotaj ne estos redonataj.

LA SEKRETARIINO


(d-rino Ariella Colombin)

P.S. Ni sendas ĉi-regularon, kun peto de disvastigo.
Trieste, 20.1.1983



# TANEF

## Antaŭkongresa Internacia Ferio-Semajno 1983



en M A R I A  A L M

de la 23-a ĝis la 30-a de julio 1983

Arangxanto:
Turista Asocio "la Naturamikoj"
Organizanto:
Max Finkenzeller, Troststr. 27/10/2
A-1100 Vieno, Aŭstrio (PĈK 7126.956)

M A R I A  A L M, feria paradizo en la aŭstria federacia lando Salzburg, feria lando de vivĝojo, ripozo kaj trankvilo. Multspecaj pejzaĝoj de majesta beleco, de la alta montaro ĝis mildaj montetoj kaj lagregionoj bonvenigas la gastojn.

M A R I A  A L M, pitoreska monta vilaĝo ĉe la piedoj de Steinernes Meer kaj Hochkönig (Ŝtona maro kaj Alta Reĝo 1941 m s.m.) La malnova pilgrima loko en unika, bela regiono fariĝis dum la lastaj jaroj ŝatata feria restadejo. Pro la favora alteco (800 m) kaj alpa klimato de la vilaĝo, ĝi fariĝis rekomendinda aerkuracloko kaj akiris internacian famon. La loko konservis la montvilaĝan karakteron kaj ofertas mondernan komforton kaj trankvilecon. Oni povas migradi sur facile ireblaj vojoj, meze en suna valo, tra arbaroj, laŭlonge de riveretoj kaj lagoj, aŭ pli streĉi la fortojn, grimpante sur montojn. Bonkvalitaj hoteloj, restoracioj, kafejoj, memservaj magazenoj, koncertoj kaj flokloraj distradoj agrabligas la ferian restadon.

MARIA A L M estas atingebla per fervoja linio Salzburg - Saalfelden - Innsbruck. De Saalfelden estas ankoraŭ 5 km ĝis Maria Alm.

KOSTOJ: 2500 ŝilingoj. La prezo inkludas loĝadon en "Gasthof Niederreiter" en dulitaj ĉambroj kun duŝo kaj WC, du manĝojn ĉiutage, kulturajn aranĝojn, kursojn, ekskursojn, priservadon kaj gvidadojn. Antaŭpago de 500 ŝilingoj estas necesa.
Monĝiro al: Max Finkenzeller, Troststr. 27/10/2, A-1100 Wien, Aŭstrio. Poŝtĉekkonta numero: 7126.956. Restpago: 4 semajnojn antaŭ komenco de la ferio-semajno. Vi ankaŭ tuj povas pagi la tutan sumon. Aliĝo ĝis la 31-a de marto 1983. Post tiu dato plialtiĝo je 10 %. Pri asekuro vi mem devas zorgi. Ebla inflacio estos alkalkulata (okt.1982).

# ESPERANTO-SERVO

de la Aŭstria Esperantista Federacio

## Centro: A-1150 Wien, Fünfhausgasse 16, Austrio

Postkongresa Esperantista Renkonto en Vieno
16a - 13a de Aŭgusto 1983

Feria semajno por ekkon. Vienon, ties kulturon kaj ĉirkaŭaĵon. MONDA TURISMO ellaboris specialan favoran restadon kaj programon por Esperantistoj. Vieno urbo de muziko, historio kaj arto. Jen songo de multaj homoj, ĝin vidi.

Kostoj: Aŭstr. ŝilingoj --3.200,- inkluzivas: loĝadon en la hotelo " PANORAMA" en unu - kaj du-litaj ĉambroj kun duŝo, kaj matenmanĝo. (en la hotelo estas restoracio) ekskursojn, enirbiletojn, trambiletojn, priservado kaj gvidadojn. Antaŭpago ŝ-500,- (necesa)
Oni povas ankaŭ tuj pagi la tutan sumon.
Aliĝo kaj mon-ĝiro al Max Finkezeller, (Monda Turismo) Troststrasse 27/10/2, A-1100 Wien, PSK. 7126.956. Austrio

Aliĝo ĝis 30a de marto 1983 petata. Post tiu dato altiĝo je 10%. La aliĝilo estas traktata post antaŭpago de ŝ-500,-

---

Varsovio, 15.01.1983

KOMITET DO SPRAW RADIA I TELEWIZJI „POLSKIE RADIO I TELEWIZJA"
RADIO POLONIA

Belga Esperanto-Federacio
Bruselo, Belgio

Estimataj Gesamideanoj,

Ni danke konfirmas la ricevon de la monata bulteno informanta pri la jara kunsido de BEF, okazinta en la E-Domo en Antverpeno. Ni diskonigis la sciigon la 19-an, 20-an kaj 21-an de novembro 1982 en nia "Esperanto-ekspreso".

Samtempe ni esperas daŭre ricevadi ĉiujn interesajn por la esperantistoj informoj pri la E-movado en Belgio.

Kun esperantistaj salutoj -

Estro de la Redakcio
/Jan Kimek/

00-950 Warszawa, Al. Niepodległości 77/85
telefon: 44-41-23 telex: 814825



INTERNACIA JUNULARA KONGRESO DE TEJO DEBRECEN 1983
1983

# ALIĜILO

Kongresa numero:

Via uea-kodo: (se konata)

39a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO
23 – 30 JULIO 1983
DEBRECEN – HUNGARIO

ADRESO de LKK: Budapest, Pf. 193., H-1368, Telefonoj: (36-1-)141-078, (36-1-)334-194.
ADRESO de TEJO: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, Telefono: 010/36.15.39.
POR PAGOJ:
a/ El okcidentaj landoj: pagu al la Nederlanda poŝtĉekkonto n-ro 1572 712, menciu „39a Internacia Junulara Kongreso" kaj vian nomon, aŭ al la bankkonto ĉe AmRo Bank, Rotterdam, n-ro 42.69.01.444 en la nomo de „Universala Kongreso de Esperanto." Menciu "39a IJK" kaj vian nomon. Pagante per banko nepre aldonu la bankkostojn (6 gld)!
b/ El socialismaj landoj: aliĝu ĉe via landa Junulara Sekcio, kaj pagu al ĝi!
c/ El Hungario: aliĝu ĉe LKK, petu enpagilon. Bankkonto: OTP VIII. ker. 516-10005
ĉ/ El Rumanio: Kontaktu LKK!

Mi aliĝas al la 39a IJK (23-30 de julio 1983) laŭ kondiĉoj kaj prezoj presitaj sur la dorsa flanko:
Viro/virino*. Profesio-fako-interesiĝo (nedevige, por aperigi en Kongresa Libro);
. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .
Nomo (familia aŭ ĉefa, por alfabeta ordigo): . . . . . . . . . . . . . .
Kompleta nomo: . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .
Kompleta poŝta adreso, (nacilingve per latinaj literoj kun poŝta kodo ĝuste lokita): . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .
Lando (Esperante): . . . . . . . . . . . Naskiĝdato: . . . . . . . . . . . . .
Vegetarano: jes/ne*. Mi volas lui biciklon: jes/ne*.
Dato de alveno: . . . . . . . . . . . . . Dato de foriro: . . . . . . . . . . . .
Dato de aliĝo: . . . . . . . . . . . . . . . Dato de pago: . . . . . . . . . . . .
Pagmaniero: . . . . . . . . . . . . . . . Subskribo: . . . . . . . . . . . . . .
*Forstreku la nevalidan!

Ne skribu ĉi tie (por administracio)!

| TEJO-membreco pagita | Pago ricevita | Konfirmilo sendita | 2a Bulteno sendita | Ankoraŭ pagenda |
|---|---|---|---|---|
| | | | | |

Kongreskotizoj laŭ la dato de la PAGO, en Nederlandaj guldenoj kaj hungaraj forintoj:

| Aĝo de la kongresano je pagdato | ĝis 83-03-31 gld | ĝis 83-03-31 Ft | ĝis 83-06-10 gld | ĝis 83-06-10 Ft | surloke gld | surloke Ft |
|---|---|---|---|---|---|---|
| ĝis inkl. 21 jaroj | 210 | 2520 | 250 | 3000 | 290 | 3480 |
| 22 - 26 jaroj | 235 | 2820 | 280 | 3360 | 330 | 3960 |
| 27 - 33 jaroj | 275 | 3300 | 330 | 3960 | 380 | 4560 |
| 34 jaroj aŭ pli | 310 | 3720 | 360 | 4320 | 410 | 4920 |

Kiuj pli frue aliĝas, ricevos la pli bonkvalitajn tranoktejojn.

— Mi pagas laŭ la ĉi-supra tabelo: +
— Mi estas malpli ol 26-jara individua membro de UEA-TEJO, mi rajtas rabaton de 30 gld/360 Ft -
— Mi loĝos kaj manĝos en hotelo (2-litaj ĉambroj), tial mi krompagas 70 gld/840 Ft +
— Mi volas loĝi kun: . . . . . . . . . . . . . . . . . .
— Mi volas partopreni nur la programojn, tial mi rajtas al rabato de 150 gld/1800 Ft -
— Mi estas malpli ol 26-jara kaj mi aliĝas al Budapeŝta UK favorpreze de 42 gld/500 Ft +
— Mi sendis aliĝilon de UK/mi petas aliĝilon de UK*
— Mi volas subteni la partoprenon de gejunuloj el la Tria Mondo per aparta kontribuo +

Mi pagas sume gld/Ft*

Mi aĝas pli ol 34 jarojn kaj devas do esti patrono de TEJO (dato de pago: . . . . .) aŭ pagos plej laste la unuan tagon de la kongreso.

Mi volas prezenti programon dum la internacia vespero kiel solisto/en grupo*
(Bonvolu iomete priskribi): . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

Aliaj rimarkoj: . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

* Forstreku la nevalidan!

La plena kongreskotizo rajtigas loĝadon, manĝadon, ekskurson kaj partoprenon en ĉiuj kongresaj aranĝoj. Por la limdato de la aliĝilo validas la dato de ricevo de la pago. Kongreskotizoj estas neniel repageblaj. En kazo de transpagaj obstakloj konsultu la Landan Sekcion de TEJO aŭ la landan kotizperanton de UEA, aŭ LKK. Nur la kompleta kotizpago plene legitimas la aliĝon. Pagante por alia persono, indiku klare la celon de la pago kaj skribu detalan adreson de la persono, por kiu vi pagas.

# ESPERANTO EN BELGIO

Monata bulteno (Bulletin mensuel - Maandelijks blad)

de la BELGA ESPERANTO-FEDERACIO

Montoyerstrato 37 b.24
B-1040 BRUSELO
Tel. (02)5135995

Poŝtĉekkonto 000/0163434.86

Respondecas (Editeur responsable - Verantwoordelijke uitgever) :
La ĝenerala sekretario : André MERTENS GOOSSENS
Priorijstr. 4 B-1720 DILBEEK

Redakcio :
La estraro de B.E.F. prizorgu la materialon por la bulteno.
Krome, ĝi atendas kunlaboraĵojn el la tuta lando.
La artikoloj estu prefere esperantlingvaj kaj klare tajpitaj'

Informiloj povas tute aŭ parte reprodukti la tekstojn de ĉi tiu bulteno (escepte se precize malpermesas la aŭtoro).

BEF - ESTRARO

| | |
|---|---|
| Prezidanto | : Marc DEMONTY (Bruselo) |
| Vicprezidantoj | : Lambertine DREZE (Lieĝo)<br>Edward SYMOENS (Kalmthout) |
| Sekretarioj | : André MERTENS GOOSSENS (Bruselo)<br>Clément THOLET (Lieĝo)<br>Jan BOVENDEERD (Mortsel) |
| Kasisto | : Jules VERSTRAETEN (Antverpeno) |

Tiu ĉi bulteno enhavas interesan liston de lastjaraj Esperanto-eldonaĵoj.

BEF-KADROKURSOJ EN LA TRILANDA REGIONO

Jen rememorigo de la sekvaj kursoj en la ĉijara programo:
- 28-05: Movadhistorio - ,, Dro POL DENGEL.
- 18.06: Komunik. inform- k. propagandtekn.- ,, ANNE TILMONT.

La kursoj daŭros de la 10a ĝis la 16a horo; atentu ke ili okazos en facile atingebla loko: la kursejo estas aparta salono de la kafejo "Le But" place Cockerill 12, 4000 Lieĝo. De la stacidomo Liège-Guillemins, eblas atingi tiun lokon per buso:
-ĉu n-ro 48, ĝis place du 20 Août,
-ĉu n-ro 1, 4 aŭ 20, ĝis Pont d'Avroy,
kaj de tiuj bushaltejoj, per piedirado de kelkaj minutoj.
Dum la tagmeza ripozo, eblas favorpreze manĝi en la ĉirkaŭaĵo de la kursejo.
Pliaj informoj pri la venontaj kursoj, ĉe la Prezidanto de B[illegible] Marc Demonty, av. des Missionnaires/Missionarissenl., 39 b[illegible], B.1080, Bruselo (tel.02/5201944).

A.MG.

---

"Ligue Française PRO UNESCO"

dissendis lastjare ekzemplerojn de kvar siaj eldonaĵoj:
"POR MULTOBLE PLI-VASTIGI NIAN MOVADON, ni ĉiam uzu nur Esperanton tre facile kompreneblan" de Albert Liennardt, aktuala serio de lingvaj kaj didaktikaj artikoloj; prezo: 22 FF.
"FACILAJ DIALOGOJ" de Albert Lienhardt, verkaĵo en Esperanto kun traduko al la franca lingvo; prezo: 29 FF.
"MODERNIGO OPTIMALA DE LA ESPERANTO-ORTOGRAFIO", de Yves Guéguéniat kaj Albert Lienhardt, informilo pri la neceseco kaj la ebleco forigi la ortografiajn apartaĵojn de Esperanto, "kiuj malakcelis kaj daŭre malakcelas ĝian tutmondan disvastiĝon".
"VERA RAKONTO PRI ADMIRINDA SIN-OFERO", de Marie Thérèse Cuny, Jean Pierre Cuny kaj Jean Paul Rouland, traduko de Albert Lienhardt, broŝuro "optimal-ortografie skribita".
Prezo de ambaŭ lastaj broŝuretoj: 15 FF.
Oni povas mendi ĉe la libroservo kaj la eldonisto, "Ligue Française PRO UNESCO", 24 av.de Riedisheim F-68100 Mulhouse, per antaŭpago al la poŝta konto n-ro 16.233.37 C PARIS.

A.MG.

ESPERANTO PRESS

el Kanado, sendis al BEF binditan ekzempleron de nova eldono, "ESPERANTO en la moderna Mondo": studoj kaj artikoloj pri lingvaj problemoj, la Rajto je Komunikado kaj la Internacia Lingvo. La libro aperis en dua reviziita pli ampleksa eldono kun indeksoj.
La verkon kompilis Rüdiger kaj Vilma Sindona Eicholz. Enestas kontribuaĵoj de multaj konataj aktivuloj, ekz. de Claude Piron,... kaj de niaj samlandanoj Germain Pirlot, W.M.A. De Smet... La libro entenas 600 paĝojn kaj 110 ilustraĵojn.
Ekzistas multaj eblecoj por utiligi la libron en informa laboro.
La aŭtoroj celas "vendi la verkon ĉefe al bibliotekoj kiuj posedas anglajn librojn. Imponan libron kiel ĉi tiun oni facile rimarkos inter la referencaj libroj!"
Je la prezo de 66 GLD. (+ sendokostoj), oni povas mendi ĝin ĉe la E.-libroservoj.

A.MG.



RONDO GEN

el Japanio, donacis al BEF ekzempleron de la bildstria romano: "NUDPIEDA GEN". La aŭtoro, Nakazawa Keizi, travivis, pridesegnis kaj rakontas fatalan periodon de familia vivo en Hiroŝima ĝis la Tago de la unua atombombado.
La verko fariĝis ŝoka manifesto de faktoj, kaj celas aktivan reagon de la legontoj. Tradukis en Esperanto: Yukio Izumi.
La ampleksa libro (preskaŭ 300 paĝoj) estas mendebla, je prezo de 30 GLD. (+ sendokostoj), ĉe la E.-libroservoj.

A.MG.

PLANLINGVISTIKO

jam estas unujara; la entreprenema Kooperativo de Literatura Foiro, el La Chaux-de-Fonds, Svislando, eldonas - kaj Jouko Lindstedt el Finlando redaktas - tiun interesan trimonatan revuon por la studo de planlingvoj. La abono kostas 260 BF. La peranto por Belgio estas Barbara Poterucha. Verbiststr. 44 - 1040 Bruselo.

A.MG.

---

LA PATRO DE TINCJO FORPASIS

Hergé (pron. erĵe, pseŭd. de Georges Rémi, pron. ĵorĵ remi) forpasis en marto. Tiu belga desegnisto, mondfama majstro de la bildstria literaturo, verkis kelkdekon da libroj eldonitaj en kelkdeko da lingvoj tra la tuta mondo. En 1981 esperantiĝis la unua aventuro de Tinĉjo, "La Krabo kun Oraj Pinĉiloj".
La eldono de tiu verko de Hergé estis grava evento por Esperanto; ne estis surprize kiam, dum la lasta Universala Kongreso, oni anoncis ke ĝi dividis la premion de la Belartaj Konkursoj kiel "Infanlibro de la Jaro".

A.MG.

---

BALDAŬ APEROS

la nova Katalogo 1983/84 de la Libroservo de UEA.
La librolisto entenos multajn novajn verkojn eldonitajn el Belgio
Eble vi trovos inter ili la sekvontajn titolojn de libroj, kiuj antaŭnelonge aperis!

ELDONEJO TK/STAFETO

el Brasschaat (apud Antverpeno) eldonis, krom la internacian magazinon MONATO, multajn librojn de eksterlandaj konataj verkistoj: menciindaj estas inter la plej novaj verkoj:

"Ĉu ni kunvenis vane?", spionromano de Johan Valano,
iom pli pruda ol la priseksa kaj prikrima fantiazaĵo titolita:
"Ĉu ŝi mortis tra-fike?", de Johan Balano.

"Misio sen Alveno", sciencfikcia romano de John Francis.

"Fabeloj de la Verda Pigo", sukcesa ilustrita rakontaro de L. Beaucaire.

"Saluton! Esperanto aŭtodidakte.", nova lernolibro por komencantoj, verkita de Audrey Childs-Mee.

NEESPERANTAJ ELDONEJOJ

"GUIDO GEZELLE": tiun belan libron kun poemkolekto de la granda flandra poeto redaktis Bert Peleman; ĝi enhavas originalojn kaj tradukojn en 12 lingvojn. La Esperanto-tradukoj estas de Hector Vermuylen. La luksa libro kostas 890 BF. (+ sendokostoj) kaj estas mendebla ĉe la E.-libroservoj.

"ESPERANTO SNEL ASSIMILEREN" de W.M.A. De Smet: tiun libron lanĉis la eldonejo De Nederlanden. Rapida kurso por memlernantaj nederlandlingvanoj, ĝi dividiĝas en 15 "paŝojn". La 160-paĝa libro, je prezo de 395 BF. (+ sendokostoj), estas mendebla ĉe la E.-libroservoj.

SONORILO

la belga Esperanto-librejo reeldonis la informbroŝuron 24-paĝan "L'ESPERANTO DANS L'ENSEIGNEMENT", de D-ro Pol Denoël, kaj vendas ĝin je la prezo de 100 BF. (+ sendokostoj).

La librejo vendas alian verkon, 96-paĝan, de D-ro Pol Denoël: "INITIATION THEORIQUE ET PRATIQUE"; tio estas Esperanta gramatika lernolibro kiu taŭgas por publikaj kursoj. La prezo estas 180 BF. (+ sendokostoj).

FLANDRA ESPERANTO-LIGO

eldonis mem plurajn interesajn verketojn: unue estas menciinda: "LA AVENTUROJ DE SPAR- KAJ ALIAJ PORKETOJ", 80-paĝa rakonto por geknaboj, de Rik De Roover. La libro kostas 225 BF. (+ sendo-kostojn) ĉe FEL kaj la E.-libroservoj.

"abunde manĝi en..., etosplene amuziĝi (kaj trinki) en..." kaj "agrable butikumi en..., trankvile promeni kaj praktikaj informoj pri ANTVERPENO" estas (universale) konataj libretoj.
La subskribinto, Anne..., konas kaj revelaciis al 2000 parto-prenintoj de la 67a U.K. la bonajn adresojn de la havenurbo!
Se restas ankoraŭ tiaj ovidlibretoj, oni povas mendi ilin ĉe FEL.
La paro de tiuj UK-broŝuroj kostas 100 BF. (+ 20 BF. por sendo).

"F.E.L.-KADROKURSOJ"
estas interesa resumo de la sukcesaj pioniraj kursoj de Marc Demonty, Fernand Roose, Paul Peeraerts kaj Anne Tilmont; iliaj bazaj tekstoj estis kunmetitaj, en 24 paĝojn, de la sekretariato de FEL: ĉe kiu ili estas haveblaj por 60 BF. (+ sendokostoj).

"ESPERANTO, kion mi povas fari per tio"
Resuma trarigardo tra la historio, la movado kaj la praktikaj eblecoj de la Internacia Lingvo Esperanto..., 20-paĝa broŝuro ankaŭ kunmetita de FEL, (aŭ nederlandlingva traduko) estas havebla tie kaj ĉe la E-libroservoj je la prezo de 60 BF. (+sendokostoj).



ASOCIO POR ESPERANTO

eldonis vortaron de la oficialaj E.-radikoj (pli ol 4500): "LEKSIKONO" de Jean P. Bovy, en kvin lingvoj: Esperanto, franca, angla, nederlanda kaj germana; la Leksikono multe helpos al la legado de iu ajn ordinara teksto, kaj al la lernado de la internacia sed samtempe de aliaj lingvoj! Tiu tre utila libro de 116 paĝoj estas mendebla je la prezo de 240 BF. (+ sendokostoj) ĉe la E-libroservoj.

FEL kaj APE

" LA SOCI-POLITIKA, PEDAGOGIA KAJ KULTURA VALORO DE ESPERANTO" estas eseo de Edward Symoens, per kiu li disponigas al informaktivuloj tre konkretajn ĝisdatigitajn donitaĵojn kaj argumentojn pri la lerneja valoro de la Internacia Lingvo. La celo estas ke la verketo estu tradukota en multajn naciajn lingvojn kaj servu por amasa informagado en instrumedioj.
Informoj pri la esperant- kaj la nederlandlingvaj dokumentoj ĉe S-ro E. Symoens, Putsesteenweg 131A B-2180 Kalmthout;
pri la franclingva broŝuro ĉe S-ro G. Vanbreuse, Ma Campagne 319 B-4800 Verviers.

ESPERANTO-DOKUMENTOJ

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO aperigis la n-ron 16 de tiu serio: "LA OFICIALA SITUACIO DE LA ESPERANTO-INSTRUADO EN LA MONDO"
Germain Pirlot kompilis fidindajn kaj freŝdatajn informojn pri la universitatoj kaj samrangaj institutoj, en kiuj Esperanto estas oficiale instruata, kaj pri ŝtataj leĝoj ebligantaj la instruadon de Esperanto en la lernejoj; temas pri ege serioza kaj utila informilo! - kiu estas havebla ĉe la E-libroservoj je la prezo de 3 GLD. (+ sendokostoj).
La aŭtoro kompilis ĝisdatigitan suplementon je la fino de 1982.
Franclingvaj broŝuretoj, uzeblaj kiel propagandiloj, ankaŭ estas haveblaj ĉe S-ro G. Pirlot, Kemmelbergstr. 5 b3 B-8400 Oostende.

"GENERACIAJ ASPEKTOJ DE LA ESPERANTO-MOVADO"
estas la n-ro 17 de Esperanto-Dokumentoj, eldonitaj de UEA.
Raporto pri la 67a Universala Kongreso de Esperanto, Antverpeno: Humphrey Tonkin enkondukas kaj pristudas la temon de la U.K., Ingvar Schoultz resumas la debatojn, kaj UEA registras la kongresajn rezoluciojn. La prezo de unuopa dokumento estas 3 GLD. ĉe la E-libroservoj

A.MG.

---

ELDONEJO-LIBREJO SONORILO
Doornstr. 22 B-2610 Wilrijk
pĉk n-ro 000-0152140-44
estas la oficiala Esperanto-librejo en Belgio.

---

UNIVERSITATO DE LIEĜO

F-ino Huguette Tholet lastjare diplomiĝis en Romanika Filologio. En sia tezo ŝi pritraktis la temon: "Evoluproblemoj de la konstruitaj lingvoj. Esperanto". La plej granda parto de la 150-paĝa verko estas dediĉita al la Internacia Lingvo mem, kaj al la evoluo de sia scienca terminologio.

A. MG.

# AILA BRUSSELS 84

# 7th WORLD CONGRESS OF APPLIED LINGUISTICS

## BRUSSELS, BELGIUM, AUGUST 5-10, 1984

(First Announcement)

The 7th World Congress of Applied Linguistics will be hosted by the Free University of Brussels (V.U.B.) and organized by the Belgian Association of Applied Linguistics (ABLA-BVTL) under the auspices of the International Association of Applied Linguistics (AILA).

The main theme of the congress will be

## THE CONTRIBUTION OF APPLIED LINGUISTICS TO INTERNATIONAL UNDERSTANDING

In addition to the special lectures and round tables centered on the main theme, there will be symposia, workshops or sessions on the following topics :

### LANGUAGE PROBLEMS IN DEVELOPING NATIONS

- Linguistic Consequences of Colonialism
- Communicativity in a Multicultural Setting
- National Language Problems
- Pidgins and Creoles
- Mother Tongue Education
- Literacy Programs

### LANGUAGE TEACHING AND LEARNING

- Methodology
- Technology
- Adult Language Teaching
- Evaluation and Testing
- Contrastive Analysis
- Error Analysis

### SOCIOLINGUISTICS

- Multilingualism
- Multiculturalism
- Language Planning
- Communication Problems in Society
- Minority Languages
- Immigrant and Migrant Education
- Language and Sex

### COMMUNICATION AND INTERACTION

- Interpretation
- Translation
- Stylistics
- Discourse Analysis
- Terminology
- Lexicography
- Language for Specific Purposes

### PSYCHOLINGUISTICS

- Child Language
- First Language Acquisition
- Memory and Perception
- Neurolinguistics

### LOGICO-LINGUISTICS

- Mathematical Linguistic Models
- Linguistic Engineering
- Quantitative Linguistics
- Logic and Language

A second announcement with information about registration and practical matters will be distributed by September 1982. The deadline for papers will be January 1, 1984.

Organizing Committee :

Jos Nivette, President
Leopold Engels, Vice-President
Paul Godaert, Vice-President
Max Wajskop, Vice-President
Didier Goyvaerts, Secretary-General
Pete Van de Craen, Programme
Dirk Geens, Treasurer
Annelene Hoogzand, Local Organization

Mailing address :

AILA World Congress 1984
ITO VUB
University of Brussels
Pleinlaan 2
B - 1050 Brussels
Belgium






UNUIĜO FRANCA POR ESPERANTO ★

DE LA 25A DE JUNIO ĜIS LA 2A DE JULIO 1983

# INTERNACIA ESPERANTO SEMAJNO

# C A N N E S

## ĈE LA LAZURA MARBORDO

**VIZITU.....** CANNES kun fama " CROISETTE"
NICE kun PROMENADO de la ANGLOJ, Malnova urbo, Panoramo.
MONAKO kun PRINCA PALACO, EKZOTA GARDENO
MENTON kun pitoreskaj stratetoj.
VALAURIS kun PICASSO-MUZEO.
SAINT-PAUL-de-VENCE kun MAEGHT-EKSPOZICIO.
VENCE kun MATISSE-KAPELO.
GRASSE kun parfumfabriko .
FREJUS kun ROMANAJ ARENOJ.
GOURDON kaj EZE kun manlaboraj artistoj.
GORGOJ de la LUPO kun AKVOFALO.
La ORA KORNICO
LAGO de SAINT-CASSIEN.
La INSULOJ LERINS.
kaj la ITALA URBO VINTIMIGLIO
kun PENTRITA MERKATO........

Semajno turisma
en region'bela,
Vetero junia
agrabla sunplena,
Sen varmeco troa
pro venteto mara,
Pejsaĵo diversa:
arbaro mimoza,
Pinastro kaj palmo,
kreskaĵo ekzota.
KANNO urbo ĉarma
kun strando sabla.
Ekskurso ĉiutaga
aŭtobuso komforta.
Al insuloj LERINS
vojaĝo perŝipa.
En HOTELO IBIS
ĉambro dupersona,
Banĉambro agrabla
tualet' privata,
Kie ĉiutage
tri manĝoj bonegaj,
Ankaŭ dum ekskurso
tagmanĝo survoja.
Bankedo dimanĉa
kun amikoj lokaj.
Kosto popersona
por restado tuta
Nur mil naŭ-cent kvin-dek
frankoj francaj.

oooooooooo

| PREZO 1950 F.F. | ENKALKULANTE :<br>★ 7 NOKTOJ en DUPERSONA ĈAMBRO kun privataj banĉambro kaj necesejo.<br>★ Matenmanĝo, Tagmanĝo, Vespermanĝo de SABATE VESPERE ĝis SABATE TAGMEZE inkluzive<br>★ 4 EKSKURSOJ en komforta aŭtobuso, 600 KM :<br>★ I EKSKURSO per ŜIPETO. |
|---|---|

Kiuj deziras loĝi kaj manĝi en kampadejo, por 5 ekskursoj, tagmanĝoj dum tuttagaj ekskursoj, dimanĉa bankedo : PREZO/ 795 F.F.

ooooooooooo

FINE de DECEMBRO jam venis ALIĜOJ el 5 LANDOJ.
En HOTELO estas LOKO nur por 50 PERSONOJ.

DO, ALIĜU BALDAŬ.

★

KORESPONDA ADRESO

INTERNACIA ESPERANTO SEMAJNO
"LES HORTENSIAS 2". DOMAINE DES FLEURS.
121 bis BOULEVARD NAPOLEON III
F.06200. NICE.

БЪЛГАРСКИ ЕСПЕРАНТСКИ СЪЮЗ
1303 — СОФИЯ
бул. „Хр. Ботев" 97 Тел. 31-00-29

BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO
1303 — SOFIO
Bul. „Hr. Botev" 97 Tel. 31-00-29

София, 12.X. 1982 г.
№ 1138

Al Redakcio de Esperanto
en Belgio
Montoyrestato 37 B.24
B-1040 Brusel
Belgio

Karaj Samideanoj,

Ni havis eblecon tralegi je maja numero de "E.B" interesan artikolon "La somero de la migrado". La tuŝita problemo pri piedmigrado en la naturo estas grava, ĉar multaj turistoj-esperantistoj estas bonaj naturprotektantoj kaj ofte ekskursas tra la montaro. Kaj oni elekti interesan intenirero ne estas tiel facile, kiel iuj pensas.

En tiu direkto nia Sekcio por Turismo ĉe Bulgara Esperantista Asocio helpas la turistoj-esperantistojn pri elekto de lokoj, kiujn povas viziti. Krom ordinaraj promenoj en la naturo, oni ankaŭ organizas pli longajn piedmigradojn. Jam du fojoj en Pirin-montaro estis organizita 2-semajna piedmigrado. Dum la restado en la naturo la partoprenantoj konversacias kaj praktikas la lingvon. Ankaŭ printempe kaj aŭtune (septembro) en u. Velingrad estas organizitaj Seminario-Feriadoj en kies programoj estas antaŭvidata "mikroturismon". Matene la tago komencas per promeno al la proksima altaĵo tra arbaro. Vere, la freŝiga aero saturita per adoro sanigas la korpon. La restado tie-ĉi daŭras unu semajnon.

Se ĉi-nia letero trovas lokon en via revuo, ni pretas doni informojn al ĉiuj, kiuj interesiĝas piedmigri tra niaj montaroj. Ili devas skribi al ni konkrete kiaj estas iliaj interesoj kaj kian bezonon ili havas.

Sukcesajn piedmigradojn dum la venonta 1983 somero!

Kore salutas vin,

Sekretario: /El. Nenova/ Prezidanto de Turista Sekcio: /D. Mutuŝev/



**54. ITALA KONGRESO DE ESPERANTO**
**ALGHERO (Sardinio) 14 - 20 Oktobro 1983**

01/02/1983.*

<u>Kongresa Temo:</u> ** ESPERANTO KAJ MINORITATAJ LINGVOJ**

Amikoj de Esperanto !!

Inviti vin al partopreno de nacia kongreso, estas por la prezidanto de Itala Esperanto-Federacio granda plezuro, ĉar estas invito al renkontiĝo de samideanoj kiuj laboras por la bono de la homaro.

La lando kie okazos la 54-a Itala Esperanto-Kongreso estas mirinda kaj kun ĝojo ni povos denove viziti ĝin, post la kongreso kiu okazis en Sassari antaŭ multaj jaroj (1954).

Estu multnombraj kaj invitu ankaŭ observantojn, kiuj povos koni nian etoson kaj alproksimiĝi al nia lingvo kaj ideo. Ĝis revido en Alghero, kataluna urbo en Sardio !

Mario Dazzini
Prezidanto de I.E.F.

68a Universala Kongreso de Esperanto
de la 30a de julio ĝis la 6a de aŭgusto 1983
en Budapeŝto, Hungario.

Ni lastfoje rememorigas ke
1. vi povas ricevi aliĝilon ĉe via landa peranto,
2. vi prefere resendu la aliĝilon kaj faru la pagon al via landa peranto.

Por Belgio, la landa peranto estas la Belga Esperanto-Federacio, Montoyerstrato 37 b.24 B-1040 Bruselo, pĉk 000/0163434.86.
Laŭ la nuna kurzo de la Guldeno en Belgio (18 BF.), ni indikas ĉisube la kongreskotizojn en nia nacia mono:

| Kotizoj validaj ĝis la dato: | 18.06.83 |
|---|---|
| 1. Kongresano ne membro individua de UEA | 4068 BF |
| 2. Kongresano individua membro de UEA kun Jarlibro........................ | 3618 BF |
| 3. Kongresano individua membro de UEA kun Jarlibro kaj revuo ............... | 2934 BF |
| 4. Edz(in)o de kongresano en kategorio 1. | 2844 BF |
| 5. Edz(in)o de kongresano kategorioj 2/3 | 2538 BF |
| 6. Junulo ĝis inkluzive 20-jara ......... | 1224 BF |
| 7. Plentempa studento ĝis inkl. 30-jara.. | 2034 BF |
| 8. Blindulo ................................ | 1638 BF |

Kvankam la sekretario estas profesie bankisto (ĉe bona banko! ĉar ĝi jam subtenis Esperanton...), li ne povas publike antaŭdiri la morgaŭajn kurzojn. Do la eblaj diferencoj fariĝos gajnoj aŭ malgajnoj por la peranto (se ili ne tro altiĝos).
Tamen por eviti malgajnojn por la peranto, la aliĝontoj povas pagi rondan sumon aŭ aldoni donacon por BEF. Anticipan dankon!

Vi trovos ankaŭ kopion de aliĝilo en la sekvontaj paĝoj



Via uea-kodo
(se vi konas) :

# ALIĜILO —— BUDAPEŜTO

KONGRESO de ESPERANTO
68a UNIVERSALA
1983
BUDAPEŜTO

**68a UNIVERSALA KONGRESO de ESPERANTO**
**de la 30a de julio ĝis la 6a de aŭgusto 1983 en Budapeŝto, Hungario**

Kongresonumero
Dato de ricevo

Konstanta adreso: Universala Kongreso de Esperanto, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando
Poŝtĉekkonto de la Kongreso: n-ro 627 337 (nederlanda), aŭ
Banko de la Kongreso: Amsterdam-Rotterdam Bank, Rotterdam, n-ro 42. 69. 01. 444.
LKK: Budapest, Pf. 193. H–1368. Hungario.
Bankkonto: OTP VIII. ker. 516-10005

¤ Mi aliĝas al la Kongreso laŭ la kondiĉoj presitaj sur la dorsa flanko. Mi sendas la pagon laŭ la apuda specifo al:

..............................

per poŝtmandato /poŝta ĝiro/ banka ĝiro/ banka ĉeko *

¤ Mi ne povas jam aliĝi pro pasportaj aŭ transpagaj problemoj. Mi promesas pagi tuj post alveno en la kongresejo.

| | |
|---|---|
| Kotizo (en kategorio. . . ) | ........... |
| Adopta Kaso . . . (Libervolaj donacoj) | ........... |
| Blindula Kaso . . . (Libervolaj donacoj) | ........... |
| Literatura Kaso (Libervolaj donacoj) | ........... |
| Adoptaj Gepatroj . . . (Libervolaj donacoj) | ........... |
| Bankkostoj ........ | -------- |
| Entute ...... | ........... |

Viro/Virino* Profesio-fako (nedevige, por aperigi en Kongresa Libro) ..................
Nomo (familia aŭ ĉefa, por alfabeta ordigo) ..................
Nomo (kompleta) ..................
Kompleta poŝta adreso: nacilingve en latinaj literoj kun poŝtkodo ĝuste lokita
..................
..................
Lando (en Esperanto) ..................
Naskiĝdato (nur por studentoj, junuloj kaj infanoj) ..................
Nomo de edz(in)o, kiu jam aliĝis aŭ aliĝas samtempe (aparta aliĝilo) ..................
Dato de tiu ĉi aliĝilo ....... / ...... Subskribo ..................
Por uzo de la administracio

| | |
|---|---|
| UEA-membreco: kotizo de . . . . . | ricevita por la jaro . . . . . . . . . . |
| Konfirmo de la C. O.: | Konfirmo de peranto: . . . . . . . . . . |

| Pago ricevita | Konfirmilo sendita | Statistikita | 2a Bulteno sendita | Kongreslibro sendita |
|---|---|---|---|---|
| | | | | |

* Forstreku la nevalidajn. Pagante internacie per banko aŭ ĉeko, bv. aldoni 6 gld. pro la bankkostoj.

| Kongreskotizoj validaj ĝis la dato: | 1982. 12. 31. | | 1983. 03. 31. | | 1983. 06 18. | |
|---|---|---|---|---|---|---|
| | gld | for-oj | gld | for-oj | gld | for-oj |
| 1. Kongresano ne membro individua de UEA . . . . . | 188 | *2474* | 207 | *2724* | 226 | *2974* |
| 2. Kongresano individua membro de UEA kun Jarlibro . . . . | 163 | *2145* | 182 | *2395* | 201 | *2645* |
| 3. Kongresano individua membro de UEA kun Jarlibro kaj revuo | 125 | *1645* | 144 | *1895* | 163 | *2145* |
| 4. Edz(in)o de kongresano en kategorio 1 . . . . . . . . | 131 | *1724* | 145 | *1908* | 158 | *2079* |
| 5. Edz(in)o de kongresano en kategorio 2 aŭ 3. . . . . . | 114 | *1500* | 128 | *1684* | 141 | *1856* |
| 6. Junulo ĝis inkluzive 20-jara . . | 56 | *737* | 62 | *816* | 68 | *895* |
| 7. Plentempa studento ĝis inkluzive 30-jara . . . . . . . . . . | 94 | *1237* | 104 | *1370* | 113 | *1487* |
| 8. Blindulo . . . . . . . . . | 75 | *987* | 83 | *1092* | 91 | *1198* |

Post la 18a de junio 1983 aliĝoj ne plu estos akceptataj, se tamen, la aliĝontoj devos pagi surloke en la kongresejo, laŭ la koncerna tarifo de la lasta periodo plus krompago 40 gld.

* **La kongreskotizo ne inkluzivas** loĝadon, ekskursojn aŭ bankedon. Pri tiaj aferoj aperos informoj kaj mendiloj en la Dua Oficiala Bulteno aperonta en februaro. Frua aliĝo helpas la aliĝanton ĝustatempe fari siajn mendojn ĉe la Kongreso.
* **Por la limdatoj** kaj aliaj kondiĉoj validas la dato de la pago. Aliĝilo estos traktita nur post ricevo de la kompleta pago.
* **La kongreskotizo ne estas repagebla,** eĉ se la aliĝinto poste ne partoprenas la Kongreson. Pagante kongreskotizon por alia persono, oni tion antaŭvidu.
* **Kongresaliĝo ne estas transdonebla** al alia persono.
* **Kongresano en kategorio 1** (nemembro de UEA) ricevas la revuon „Esperanto" dum la tuta kalendara jaro, en kiu okazas la Kongreso.
* **Kongresano en kategorio 2 aŭ 3** devas pagi la membrokotizon de UEA **antaŭ** aŭ **samtempe kun** la kongreskotizo. Sen tio la aliĝilo ne estos traktita.
* **Kongresano en kategorio 6** devas indiki sian naskiĝdaton.
* **Kongresano en kategorio 7** devas indiki sian naskiĝdaton kaj sendi kun sia aliĝilo oficialan ateston pri sia studenteco.
* **Kongresano en kategorio 8** devas sendi kun la aliĝilo oficialan ateston pri blindeco de blindula organizaĵo aŭ kuracisto. Gvidanto de aliĝinta aŭ samtempe aliĝanta blindulo rajtas aliĝi senpage, sed ne ricevas la Kongresan Libron.
* **Infano malpli ol 13-jara** rajtas aliĝi senpage, se samtempe aliĝas almenaŭ unu el la gepatroj, sed ne ricevas la Kongresan Libron.
* **Ĉiu aliĝanto devas plenigi apartan aliĝilon.** Se oni ne havas aliĝilon, oni uzu fotokopion aŭ **samformatan** paperon. **Skribu klare – tajpe aŭ preslitere.**
* **Sendu la aliĝilon kaj faru la pagon al la sama instanco** – prefere al via landa kongresa peranto, se tia mankas – al Rotterdamo.
  Aliĝantoj el Bulgario, Ĉeĥoslovakio, GDR, Hungario, Pollando kaj Sovetio kontaktu sian landan asocion, el Rumanio turnu sin al LKK.
* **Personoj kun transpagaj aŭ pasportaj problemoj** povas sendi la aliĝilon, sen samtempa pago, al la konstanta adreso en Rotterdam. Tiuj personoj ne estos rigardataj kiel jam aliĝintaj, sed ili havos la rajton aliĝi tuj post la alveno en la kongresejo, pagante tie la kotizon laŭ la tarifo de la unua periodo.

# ESPERANTO EN BELGIO

Jarkolekto 3 Majo-Junio 1983.

Monata bulteno (Bulletin mensuel - Maandelijks blad)

de la BELGA ESPERANTO-FEDERACIO

Montoyerstrato 37 b.24
B-1040 BRUSELO
Tel.(02)5135995

Postĉekkonto 000/0163434.86

Respondecas (Editeur responsable - Verantwoordelijke uitgever) :
La ĝenerala sekretario : André MERTENS GOOSSENS
Priorijstr. 4 B-1720 DILBEEK

Redakcio :
La estraro de B.E.F. prizorgu la materialon por la bulteno.
Krome, ĝi atendas kunlaboraĵojn el la tuta lando.
La artikoloj estu prefere esperantlingvaj kaj klare tajpitaj!

Informiloj povas tute aŭ parte reprodukti la tekstojn de ĉi tiu bulteno (escepte se precize malpermesas la aŭtoro).

La Belga Esperanto-Federacio funebras

KARLO POUPEYE

mortis la 10-an de junio 1983.

Li estis 81-jara, emerita juĝeja ĉefregistristo, aktiva Prezidanto de la Reĝa Bruĝa Esperantista Societo, delegito de Universala Esperanto-Asocio; dum longaj jaroj li estis ankaŭ Honora Vicprezidanto de la Belga Esperanto-Federacio. Nome de la Federacio, estrarano J. Verstraeten ĉeestis la funebran ceremonion. La Belga Esperanto-Federacio ankoraŭ sincere kondolencas la edzinon, familion kaj la Bruĝan Grupon

## EN BRUSELA TRINKEJO

Daŭre okazas ĉiun ĵaŭdon, inter 12.30 h. kaj 14 h., neformalaj renkontoj de esperanton-parolantoj, en la trinkejo "Le Passage", place du Champ de Mars, Marsveldplein, apud la Namura Pordo. Dum tiuj kunvenetoj eblas agrable konversacii en nia kara lingvo.

A. MG.

## PREPARE AL LA KONGRESOJ

Dum la monato julio, la junulara grupo de Brugge organizas progresigan kurs(et)on, du- aŭ trifoje je semajno. Ciuj personoj estas bonvenaj, ankaŭ se ili ne kongresos, ne loĝas en Brugge aŭ ne plu sentas sin tute junaj.
Pliaj informoj haveblaj ĉe Roland Rotsaert, tel. 050/33.00.04.

## BUSKARAVANO AL BUDAPEŜTO

La vojaĝo okazos de la 22a de julio ĝis la 9a de aŭgusto, laŭ jena vojo: Bruselo - Krakovo - Budapeŝto -Vieno - Bruselo. Dumvoje la vojaĝontoj povos partopreni al la 21-a Pola Esperanto-Kongreso kaj al tuttaga vizito al Vieno.
Surbaze de 2 BF. po kilometro, la kostprezo estus de 8000 BF., inkluzive lokaj ekskursoj.
Informiĝu ĉe Monda Turismo, sama adreso kiel la Belga Esperanto-Federacio.

A. MG.

## FERVOJA KARAVANO AL BUDAPEŜTO

Belgaj partoprenontoj povos eniri la trajnon "Oostende-Wien Express" en Ostendo, Bruselo aŭ Lieĝo. Speciala grupvojaĝo, je rabatita prezo, okazos en apartaj kuŝvagonoj tien vendredon la 22-an kaj la 29-an de julio, reen sabaton la 6-an kaj la 13-an de aŭgusto.
Pliaj informoj estas haveblaj ĉe Esperanto-Centro, poŝtfako 1450, D-4790 Paderborn, tel. 49 5251.27612.

A. MG.

## AVIADILA VOJAĜO AL BUDAPEŜTO

Grupflugoj okazos iren je vendredo (I) la 22a kaj (II) la 29a de julio, reen je lundo la 8a de aŭgusto. Speciala rabatita prezo de 10 500 BF., inkluzive la havenkostoj, devas esti pagita antaŭ la 1a de julio al la bankkonto (ASLK-CGER) 001-0786724-33 de Anne Tilmont, Antverpeno, kun mencio: "flugo Budapeŝto I"aŭ "...II" kun la nomo de la partoprenonto(j).
Kontaktu eble plej frue A.T. Eŭropa Esperanto-Centro, ĉe la adreso de la Belga Esperanto-Federacio.

A. MG.

## BULGARIO - TURISMAJ INFORMOJ

Tiu monata esperantlingva publikaĵo ĉiam informas la landan asocion pri la multaj turismaj eblecoj de Bulgario.
Ĝi anoncas ankaŭ internaciajn turismajn eventojn dum la tuta jaro.
La belgaj legantoj de EB, kiuj deziras ricevi ekzempleron de tiu revueto, povas peti ĝin ĉe la redakcio; ili povas akiri pliajn informojn ĉe la Centro por Turismaj Eldonoj, str. "Trijadica" 4, Sofia, Bulgario.



## ESPERANTO-KONGRESO EN BELGIO

En la sekvaj paĝoj troviĝos ekzemplero de la bulteno eldonita pri la Esperanto-Kongreso pri Internacia Komunikado.
Malgraŭ kelkaj malfacilaĵetoj de "interna-nacia komunikado", tamen dank'al bonaj homaj rilatoj (t.e. rilatoj inter bonaj homoj), eblas anonci ke en tiu Kongreso "estos okazo por FEL, APE kaj BEF organizi ĝeneralan kunsidon".
Tiun grandan kongreson organizas la asocio "ESPERANTO 2000" el Leuven; kvankam ege aktiva, ĝi sola estus relative malgranda bazo por apud taŭga ĝenerala organizado ankaŭ prizorgi multajn aldonaĵojn utilegajn, kiel gazetaraj informoj, ampleksa programo, ekskursoj ...La kuraĝa sekretario Marc Vanden Bempt petas helpon de volontuloj kiuj havus multan aŭ malmultan liberan tempon.
Por pliaj informoj vidu lian adreson en la ĉi-kuna aliĝilo.

A. MG.

## EŬROPA KLUBO

De la 27-a ĝis la 31-a de aŭgusto, Eŭropa Klubo organizos eŭropan kongreson en Bruselo, kun la temo "Plurlingveco, ponto aŭ barilo por Eŭropo?".

Pliaj informoj ĉe la Eŭropa Klubo, poŝtkesto 3, B-1040 Bruselo .

## PRI EŬROPO, ESPERANTO KAJ ESPERANTISTOJ

### 0. Cu tra Bruselo aŭ tra Pekino?

En la landoj de okcidenta Eŭropo aliĝintaj al EEK jam jardekojn viglas debato inter esperantistoj pri la fundamenta graveco de la politika federiĝ-procedo tie okazanta rilate al la "fina venko" de la internacia lingvo.

La debato en si mem estas interesa kiel ĉia oratora ekzerco, sed ĝi estas senfrukta, almenaŭ dum ĝi restas inter esperantistoj.
La faktoj pruvos ĉu pravas tiuj, kiuj opinias ke konkerado de la eŭropaj instancoj en Bruselo estas ebla, necesa kaj nepre antaŭkondiĉa por sukcesa disvastiĝo de Esperanto ankaŭ en aliaj kontinentoj, aŭ ĉu pravas tiuj, kiuj opinias ke la ŝancoj en la nuna momento estas pli bonaj en aliaj kontinentoj.
Ambaŭ argumentantaj partioj pli bone utiligus siajn energiojn por konvinki neesperantistojn ol por konvinki esperantistojn.

### 1. Se tra Bruselo ...

Per ĉi tiu artikolo , kiu espereble aperos en revuoj de EEK-landoj, mi turnas min nur al tiuj, kiuj laŭdinde deziras disvastigi Esperanton en siaj landoj kaj igi ĝin elemento de la EEK-unuiĝo.
Premiso por ĉia agado estas kunordigo kaj dispono pri la necesaj rimedoj.

La estraro de UEA opinias ke multo estas ankoraŭ farebla de EEK-esperantistoj sur ĉi tiuj du kampoj.

Malgraŭ la ekzisto de Eŭropa Esperanto-Unio oni havas la impreson ke la kunordigado inter la Landaj Asocioj de EEK-landoj estas relative sporada kaj ĉiukaze malpli efika ol la kunordigado okazanta inter Landaj Asocioj en aliaj mondopartoj. Oni havas la impreson (temas ja pri impreso, sed por simplaj movadanoj impresoj foje gravas pli ol la realo) kvazaŭ preter la retorikaj vortlavangoj pri la beleco de la eŭropa idealo, ĉiu estraro malvolonte rezignus pri parto de sia aŭtonomeco. Montru ke mi malpravas kaj ke regule okazas komunaj kunvenoj de reprezentantoj de la estraroj de EEK-aj Landaj Asocioj, ke regule okazas komunaj samtempaj kampanjoj, ke okazas labordisdivido, ke regas interkonsento pri la vojo irota por konkeri la eŭropajn parlamentanojn.

Kiam temas pri rimedoj, oni devas konsideri ke la oficejo en Bruselo nomata Eŭropa Esperanto-Centro (Montoyerstr. 37, b24, B-1040 Bruselo), kiu funkcias kiel sekretariejo de la Eŭropa Esperanto-Unio kaj kiel informejo por la EEK-instancoj, estis ĝis nun vivtenita ĉefe de privataj donacoj kaj de konsiderindaj subvencioj de UEA, rekte aŭ pere de kunligitaj instancoj.

Estu tute klare: tio ne estas plu akceptebla. EEK-aj esperantistoj zorgu pri via brusela oficejo. Faru el ĝi la centron de viaj prieŭropaj agadoj, kunvenu en ĝi, vivigu ĝin, financu ĝin (se vi opinias ke informado pri Esperanto en EEK-medioj estas necesa). Samtempe interesiĝu pri ĝia agado kaj direktu ĝin, por ke la homoj kiuj laboras en Bruselo estu viaj reprezentantoj kaj ne reprezentantoj de si mem.

## 2. UEA kaj EEK

Pro la situo de UEA en Eŭropo kaj pro la multeco de membroj de UEA en Eŭropo, oni ofte emas miksi agadnivelojn kaj agadrespondecojn. UEA estas tutmonda organizaĵo, por kiu ĉiu kontinento estas same grava. Ĝia tasko estas la ekilibra disvastiĝo de la lingvo en ĉiu mondoparto kaj la helpo al esperantistoj en ĉiu mondoparto. El ĉi tiu perspektivo Bruselo estas same malproksima je Roterdamo kiel Pekino aŭ Antananarivo aŭ Braziljo.

La tasko disvastigi Esperanton en EEK-landoj kaj en EEK-instancoj apartenas unuavice al la lokaj esperantistoj.
Se, krome, oni konsideras ke la movado en tiuj landoj estas forta kaj kun malnovaj tradicioj kaj sen transpago-problemoj, oni certe konsentas ke ekzistas tre pli helpobezonaj situacioj al kiu UEA dediĉu sian atenton kaj subvenciojn.
Tio ne signifas ke UEA seninteresiĝas pri EEK kaj pri la eblecoj por Esperanto en tiu mondoparto. Tio nur signifas ke UEA ĝojus se EEK-esperantistoj pli konkrete interesiĝus pri sia Eŭropa Esperanto-Unio kaj pri sia brusela oficejo.

Trovu mem la manieron por relanĉi vian kunlaboron. La membro de la komisiono pri landa kaj regiona agado, kiu zorgas pri okcidenteŭropaj landoj, Jean-Louis Texier (prezidanto de la franca Landa Asocio) estas ĉiukaze je via dispono por funkcii kiel katalizilo.

Renato Corsetti.



50 a DATREVENO DE LA APEROJ DE LA VIRGULINO DE LA MALRIĈULOJ,

REĜINO DE LA NACIOJ **EN BANNEUX** :

7a INTERNACIA ESPERANTISTA PILGRIMADO: **IIan de SEPTEMBRO 1983**

\- - - - - - - - - - - - -

09.00 (belga horo) Akcepto kaj Interkonatiĝo, en la belega "INSTITUTO MATER DEI", Banneux-Louveigné, apud Liège, Belgujo

10.00 Mallonga prelego de pastroj MULLER kaj BOURDON; Kaj interkomunikado pri la Temo: "Ĉu ni kapablas plibonigi la Mondon, kun la Virgulino, per esperanto ?"

I2.00 : Tagmanĝo + Libera tempo

I4.30 : Kuncelebrata Diservo en Esperanto

I5.30 : Aktiva esperantista partopreno en la ĝeneralaj Preĝoj de la Pilgrimado: Publikaj preĝoj por la Malsalunoj; preĝo ĉe la "por ĉiuj nacioj Fonto"; Rozario, marŝante tra la Maria Bieno.

I6.30 / I7.30 : Konkludoj kaj decidoj; Kafo; Foto; Adiaŭoj.

**N O T O J :**

I) Ebleco tagmanĝi, je modera prezo, en liberserva Restoracio

2) Ebleco alveni la antaŭan tagon kaj loĝi en la Instituto (rekte la Direktorinon de la Instituto informi)

3) Partopreno al la lupreno de la salonoj kaj al la ĝenerala organizo de la pilgrimado: I50 BF aŭ 20 FF, pagontaj ĉe-loke

4) Certe, okaze de la 50a datreveno de la aperoj, multnombraj gesamideanoj venos al Banneux, kun familianoj kaj amikoj. Ni ĉiuj plej konfide preĝos **per nia INTER-NACIA lingvo la Reĝinon de la NACIOJ** : Ŝi nin komprenos kaj elaŭdos !

5) Info: Patro Louis BOURDON, o.p., 7, Avenue Salomon, 59800 LILLE, Francio

Patro Louis MULLER, 207, rue Fr.-Lefebvre, B- 4420 LIEGE-ROCOURT

041/63 89 02

## ESPERANTO KIEL PONTA LINGVO

La 21-an kaj 22-an de majo, Welkenraedt (belga urbeto proksime de la germana landlimo) okazigis festojn kun 52 anoj de urbeto Nove (norde en Italio) pro ilia ĝemeliĝ-datreveno. Kelkaj esperantistoj el la du urbetoj partoprenis ĉiujn erojn de la programo kaj estis oficiale akceptitaj de la du urbestroj kiel aliaj grupoj.
Sporta grupo el Welkenraedt petis de la esperantistoj roli kiel tradukantoj por organizi venontan sportan ludbatalon.
La libro-ekspozicio sur la centra placo estis tre bone vizitita de interesuloj kaj de esperantistoj el apudaj kluboj.
Ni ankoraŭ tre dankas ĉiujn esperantistojn el la mondo kiuj sendis al ni kuraĝvortojn.

Marie Grela.

## FIRMIGITA GAZETARA SERVO

La nederlandlingva priesperanta gazetara servo en Belgio nun havas firme unuiĝitajn gerespondeculojn: la simpatiaj gesamideanoj Annie kaj Herman geedziĝis la 28-an de majo 1983. La Belga Esperanto-Federacio prezentas al ili siajn bondezirojn por ilia feliĉo: ... kaj ili multe plezuriĝu (ankaŭ) per la kuna legado de la gazetoj!
Nuna adreso: H. kaj A. Deceuninck-Bollaert, Lusthuizenlaan 1 b4, 1500 Halle.

A.MG.

## LA MONDO KIUN NI ELEKTAS - Eŭropa Festivalo '83

De la 27-a ĝis la 29-a de majo 1983 okazis en la Granda Palaco de la Parko de Ekspozicioj en Bruselo, Eŭropa Festivalo "Le Monde que nous choisissons - De wereld die wij kiezen". Kelkdcent organizoj partoprenis la Salonon pri la Vivada Kvalito kaj la Homaj Valoroj.
La Belga Esperanto-Federacio kaj la Brusela Esperanto-Grupo aranĝis interesan standon. Aktivuloj el pluraj asocioj el la lando kunlaboris al la tenado de tiu sukcesa stando.
En aliaj paĝoj de "Esperanto en Belgio", troveblas interesaĵoj pri tiu evento: klariga artikolo de LEO DE BRUYNE kaj konciza raporto de MARC DEMONTY.

### Postfestivala Renkonto

La asocio "L'Arc - De Boog" kiu organizis la Festivalon, rendevuis la ekspoziciintojn, je sabato la 11-a de junio, sur la insuleto Robinson, en la "Kambra" Arbaro, por vespermanĝeti kaj komenti la rezultojn de la evento.
En tiu kunsido, troviĝis multaj delegitoj de homamaj, pacemaj kaj idealistaj asocioj: tamen, ĉiu persono parolis nur sian lingvon, kaj unu el la komitatanoj devis resume traduki. A.MG. reprezentanto de BEF uzis tiun bonan okazon por alparoli en tri lingvoj, i.a. Esperanto, la kelkcent interesiĝajn organizestrojn .... kiuj lin kore aplaŭdis!

A.MG.

## PROVINCA KUNVENO

En Loveno okazis, la 4-an de junio 1983, kunveno de brabantaj esperantistoj kun la estraro de la Flandra Esperanto-Ligo. Ceestis membroj de Esperanto 2000 kaj de la Brusela Esperanto-Grupo, ankaŭ estraranoj de la Belga Esperanto-Federacio.

A.MG.



# Esperanto-Kongreso pri Internacia Komunikado

**LEUVEN 1983**

## La Kongreso

La jaro 1982 estis la jaro de la grandaj Esperanto-kongresoj en Belgio: UK-67 kaj IJK-38. La jaro 1983 estas la Jaro de Komunikado. Pro ambaŭ kialoj 1983 ankaŭ estu la jaro de la ĝenerala Esperanto-Kongreso pri Internacia Komunikado en Belgio, al kiu ni kore invitas Vin. La praktikan organizadon prizorgas la asocio «Esperanto 2000» en Leuven, en kunlaboro kun FEL.

Jen renovigo de malnova bona kutimo, unua el serio de veraj kaj regulaj Esperanto-kongresoj en Belgio.

## La Temo

Tre aktuala en Esperanto-medioj estas la temo, kiun Unuiĝintaj Nacioj elektis kiel temon de la jaro 1983. Same aktuala estas tiu temo en la Eŭropa Komunumo, kies tradukservo konsumas daŭre kreskantan parton de la buĝeto.

Ĉi tiu kongreso, dediĉita al internacia komunikado, kompreneble ne solvos la koncernajn problemojn. Ĝi tamen klopodos sentivigi pri ili. Samtempe ĝi praktikos la plej taŭgan solvon al tiaj problemoj: la internacian lingvon, kiel trian lingvonivelon apud loka dialekto kaj nacia lingvo. Tial ni petas vin sur la aliĝilon indiki tiujn ĉi lastajn en via persona kazo.

## La Programo

Dum la festsolenaĵo kelkaj spertuloj kompetente enkondukos la temon pri kiu la partoprenantoj diskutos dum la kongreso. Okazos ankaŭ ĝenerala kunsido de FEL.

Kompreneble, krom al la oficiala programo, ni invitas vin al distraĵoj kiel balo, kabaredo, belga vespero, promenado, ludado ktp. Ni jam povas malkaŝi al vi ke la kermeso kaj la tipa „procesio de la viroj de la jaroj" en Leuven, estos celoj de posttagmeza ekskurso. Kiel novaĵon ni senpage vartos viajn eventualajn etulojn. Pliajn informojn pri la programo legu en la dua informilo, kiun post via aliĝo vi ricevos.

**La Kongresejo**

Ĉu ni devas klarigi kiel vi atingu Leuven? Prenu ĉiun ajn mapon pri Belgio, rigardu apud la aŭtovojo E5 inter Bruselo kaj Lieĝo kaj jen vi estas. Ni kongresos, same kiel dum la IJK '82, en la verdeca restadejo «Arenberg», kie la dormejojn, manĝejon kaj kunvenejojn/trinkejojn apartigas nura distanco de 250 metroj.

Ĉiuj ĉambroj estas varmaj kaj lumaj kaj ili enhavas ŝrankon, tablon kaj seĝon, kaj la necesajn littukojn. Plie vi disponos pri individua ŝlosilo. Principe la ĉambroj estas unupersonaj, krom se vi sur la aliĝilo speciale petas dupersonan. En ĉiu etaĝo troviĝas 11 ĉambroj, necesejoj kaj duŝo.

**La Urbo**

Al Leuven la naturo ne donacis nerezisteblajn pejzaĝojn. Leuven kontraŭe estas arturbo kaj universitata centro, kie enloĝanto ĝuas propran vivon, kie vizitanto tuj sin sentas hejme, kie kongresano vidas siajn plej altajn esperojn plenumitaj, kaj fremdulo povas esprimi nur sian admiron.

Dum la ĉi-landa libertempo, kiu ankoraŭ regos okaze de la kongreso, vi trovos urbon kvietan, iom dormetantan, en ripozo post vigla akademia jaro. Ankaŭ dum tiu libertempo, tamen, en Leuven parados por vi la pli ol multnombraj vidindaĵoj, atestantaj pri glora pasinteco. Leuven ja estas monument-urbo.

Ĝi ankaŭ estas universitata urbo. Atestas tion la universitataj sekretariejo kaj biblioteko, same kiel la kongresa restadejo.

Kaj Leuven estas fest-urbo. Tion vi spertos dum la jam nomitaj kermeso kaj procesio, folkloraj esprimoj de la festama koro de la enloĝantaro.



La loĝejo

**Alta protektanto:**
*A. Vansina,*
*urbestro de Leuven.*

Vizitu la kongreson
kaj juĝu mem!

| **NE SKRIBU ĈI TIE** | | |
|---|---|---|
| PD 1983 ........../......... | NR ................. | |
| 25 1983 ........../......... | UEA ............/.... | |
| PAGITA | | |
| PAGENDA | | |
| **POR ADMINISTRA UZO** | | |

ESPERANTO-KONGRESO '83
9-11.9.1983
LEUVEN-BELGIO

# ALIĜILO

**Kongresa sekretariejo**: Esperanto-Kongreso 1983, Duisburgsestraat 12, B-3030 Leuven-Heverlee, Belgio. ☎ (Belgio) (016) 20.14.53

**Por pagoj**:

- *nur* el Belgio – Pagu la sumon en belgaj frankoj al la bankkonto 734-3332874-60 de Esperanto-Kongreso 1983, Leuven. Klare menciu "Kotizo EKIK-V" kaj vian nomon.
- *nur* el eksterlando – Pagu la sumon en guldenoj al la poŝtkonto 37-89-64 de UEA Rotterdam aŭ, se necese, bankkonto ĉe Bank Mees & Hope, Coolsingel 93, NL–3012 AE Rotterdam, n-ro 25.52.89.804, same je nomo de UEA. Klare menciu "Kotizo EKIK-V" kaj vian nomon. — Pagante per banko, nepre aldonu la bankkostojn (5,5 guldenoj).

**Grava rimarko**: Sendu la aliĝilon al la kongresa sekretariejo en Leuven.

*Mi aliĝas al la Esperanto-kongreso 1983 en Leuven laŭ kondiĉoj ĉi-subaj kaj prezoj sur dorsa flanko.*

(*) : forstreku nevalida(j)n mencio(j)n

**Viro / Virino** (*)

**Kompleta nomo (preslitere):** ..........................................

**Familia nomo (preslitere):** ..........................................

**Kompleta poŝta adreso, nacilingve kaj per latinaj literoj, kun poŝtkodo ĝuste lokita:**

..........................................

..........................................

**Lando (en Esperanto):** .......................... **Vegetarano:**(*) jes / ne

**Naskiĝdato:** .......................... **Profesio aŭ fako:** ..........................

**Lingvo hejma (dialekto):** .......................... **Lingvo nacia:** ..........................

**Dato de aliĝo:** ..........................

**Dato de pago:** ..........................

**Pagmaniero:** ..........................

*SUBSKRIBO*

**KONGRESKOTIZOJ :** *Nur* belgoj pagu per belgaj frankoj;
*nur* eksterlandanoj pagu per guldenoj.

| Dato de alveno de la pago | BF | GLD |
|---|---|---|
| ĝis 31-07-1983 | 1620 | 90 |
| ekde 01-08-1983 | 1800 | 100 |

Tiu kotizo inkluzivas loĝadon (2 noktoj en luksa unu- aŭ dupersona ĉambro), littukojn, manĝojn (de vendredo vespere ĝis dimanĉo tagmeze) kaj partoprenon en ĉiuj kongresaj aranĝoj.

☐ *Mi deziras loĝi en dupersona ĉambro kun:* ..............................................................

☐ *Mi deziras loĝi en unupersona ĉambro.* BF / gld

**Plena kotizo laŭ kotiztabelo:** ..................

☐ *Mi ne loĝos en la kongresejo:* (– 500 BF / 28 gld) — ..................

**Sumo:** (*) ..................

*Mi rajtas je rabato de:* (ĉiam je la sumo *)

☐ 20 % *(ekde dua persono el mia familio)* — ..................

☐ 30 % *(ĉar mi estas malpli ol 26-jara)* — ..................

☐ 40 % *(ekde tria persono el mia familio)* — ..................

***Mia kotizo tiel estas :*** ..................

*Mi petas* ................ *ekzemplerojn de la memorlibro pri la IJK 1982 en Leuven por antaŭĝui la kongreson. Mi pagas jam 150 BF / 8,5 gld por ĉiu ekzemplero (alsendo senpaga).* BF / gld

*Entute:* ..................

*Mi petas vin sendi subtenkartojn al (nomo kaj adreso sube), kaj pagas 200 BF / 12 gld por ĉiu karto, jene:*

Kiom: .......... Kiu: ______________________ ..................

Kiom: .......... Kiu: ______________________ ..................

Kiom: .......... Kiu: ______________________ ..................

Kiom: .......... Kiu: ______________________ ..................

***Mi do pagas sume:*** ..................

Konsiderante:
- la grandajn rabatojn por familianoj kaj gejunuloj;
- la luksajn dormejojn (unupersona ĉambro, littukoj, ŝranko kaj skribotablo) sen krompago;
- la programon kaj la ĝeneralan organizadon;

la kotizoj estas sufiĉe malaltaj. Tial ni al vi donas la eblecon per tiu ĉi aliĝilo peti subtenkartojn por revendi al viaj gefamilianoj kaj gekonatuloj (ankaŭ ne-esperantistaj), ĉar la vendado de tiuj kartoj forte subtenos nian kongreson.

La organizantoj.

**KONDIĈOJ** — La kongreskotizo rajtigas al loĝado (krom se alie menciite), manĝajoj kaj partopreno en ĉiuj kongresaj aranĝoj. — Kiel limdato de la aliĝo validas la dato de *RICEVO* de la pago. — Kongreskotizo estas repagebla nur se pri tio alvenas *skriba* peto en la kongresa sekretariejo antaŭ la 1-8-1983. — Ĉiuokaze 20 % de la kotizo estas nenial repagebla. — La aliĝilon nepre sendu nur al la kongresa sekretariejo. — Sole la kompleta kotizpago plene legitimas la aliĝon. — Pagante por alia persono, indiku klare la celon de la pago kaj skribu detale la nomon kaj adreson de tiu persono. — Parttempaj partoprenantoj ne ĝuas rabaton.

# KADROKURSO PRI TURISMO

SABATO 17 septembro :

09h-10h:Enkonduko fare de la Prezidanto de la Belga Esperanto Federacio:S-ro Demonty Marc.

Interkonatiĝo

ESPERANTO-TURISMO: fare de S-ro Grzebowski Prezidanto de Monda Turismo,magistro pri historio en Pollando

10h-11h:TURISMA LINGVISTIKO fare de S-ro Demonty M. instruisto pri nederlanda kaj germana lingvoj en Bruselo

11h-12h:TURISMO KAJ FINANCOJ fare de S-ro Mertens A. vicdirektoro ĉe la Generala Sparkaso en Bruselo kaj sekretario de la BEF

12h-13h:Komuna(kunportita)lunĉo-kafo aŭ teo senpage havebla surloke-turisma kantaro

13h-14h: TURISMO NATURHISTORIA fare de S-ro Geysels A instruisto pri natursciencoj kaj fakdelegito pri turismo de UEA

14h-15h:TURISMA PLANADO: fare de S-ro De Bruyne L. eksstaciestro kaj turisma kunlaboranto ĉe la Belgaj Fervojoj kaj vicprezidanto de Monda Turismo

15h-16h:TURISMAJ GRUPOJ - ĈICERONADO : far Sro Grzebowski(PL)

DIMANĈO 18 septembro: TUTTAGA EKSKURSO

Praktikado de la ESPERANTO-TURISMO
Senpage por la laŭreatoj - 500 Bfr por interesuloj
Veturplano:Bruselo-Antverpeno-Roterdamo(vizito de la respektivaj E.Centro)-Reveturo tra la deltaregionoj kunpontegoj,pramoj kaj beletaj Zelandaj urbetoj.

PREMIADO:Krom premioj de ambasadoj kaj turismaj servoj OK vojaĝoj al la IX-a INTERNACIA FOIRO DE LA ESPERANTO TURISMO okazonta je 21-30 oktobro en Pollando(3 tute senpage 5 je 50%)


INFORMOJ :S-ro M.Demonty Av.des Missionnaires 39b5 (TF:02.5201944) B 1080 Bruselo



**La Esperanto-Turismo ofertas**

- unikajn homajn interrilat-eblecojn
- 4000 delegitojn en pli ol cent landoj
- 500 adresojn en 50 landoj, kie eblas senpage esti gastigata
- 500 internaciajn renkontiĝojn en 40 landoj listigitajn en la TURISMA KALENDARO
- Ĝian fakorganon = plej fruktodona ideobanko
- Informkoverton: "Turismo nia bonŝanco" kontraŭ 2 IRK aŭ sendeviza egalvaloro.

INFO: MONDA TURISMO
Montoyerstr. 37b24
B.1040 BRUSELO




# ESPERANTO-"VAPOR"-KURSO

Paralele kun la kadrokurso pri turismo-samloke-okazos intensigita enkonduka kurso al Esperanto rezervita al personoj kiuj havas bonan bazon de eŭropa plurlingveco-divido en lingvogrupoj

KOSTPREZO : 500 Bfr por kursmaterialo kaj nedevige sed konsilinde 500 bfr por la partopreno al la ekskurso Bruselo/Zelando kiel ĉi supre.

TRANOKTEBLECOJ je 17/18 senpage ĉe gesamideanoj(ev.ankaŭ 18/19)

LOKO:por ambaŭ kursoj en Bruselo Gretrystr.26(3-a + 4-a etaĝo)

ENSKRIBOJ:al ambaŭ kursoj,telefone aŭ per simpla poŝtkarto
Nur tiel ni povos garantii la kursmaterialon kaj buslokojn
Pagoj povos esti farataj surloke.

## EŬROPA ESPERANTO-UNIO

En Strasburgo, la 30-an de aprilo, okazis kunveno de reprezentantoj de la Eŭropa Esperanto-Unio por priparoli la informan agadon ĉe Eŭropaj Instancoj; ĝi estis prezidata de Brian Moon, kaj Manjo Austin protokolis. La kunveno estis tre fruktodona: espereble venos de tie vera reorganizado de la homa kaj mona kunlaboro de la diversaj pritraktitaj organizoj.
Pro praktikaj kaj politikaj kialoj la sidejo de la Eŭropa Parlamenta Esperanto-Grupo estu ĉe la Eŭropa Esperanto-Centro en Bruselo kiel kupola organizo. Anne Tilmont havos la oficon de "kunordiganto", kaj Brian Barker faros la saman laboron ĉe la Internacia Parlamenta Esperanto-Grupo en Londono.

A. MG.

## EŬROPA PARLAMENTO

La Eŭropa Esperanto-Centro organizis la 4-an de majo, en la brusela sidejo mem de la Eŭropa Parlamento, neformalan informkunvenon.
Malgraŭ la neĉeesto de kelkaj grupoj de eŭropaj parlamentanoj en Bruselo je tiu momento, la kunveno fariĝis plena sukceso: venis pli ol sesdek parlamentanoj kaj oficistoj de Eŭropaj Instancoj.
Por faciligi postajn kontaktojn, EEC listigis nomojn de kelkaj ĉeestintaj kaj de la aliĝintaj parlamentanoj. Por respondi ĉiujn demandojn, ĉeestis ankaŭ esperantistoj, i.a.: John Catling, Brian Moon, Angelos Tsirimokos, Eliza Kenlet, Kiki Tytgat, Stefan Mac Gill, Wim De Smet, kompreneble Anne Tilmont (EEC), kaj ankaŭ Marc kaj Anne Demonty (BEF).
Per tiu kunveno Esperanto gajnis multan simpation en tiuj eŭropaj rondoj!

A. MG.

## TRILANDA RENKONTIĜO EN VERVIERS


Okaze de la 75-a datreveno de la fondiĝo de la Esperantista Grupo de Verviers, je la 24-a de aprilo 1983, ĝia estraro organizis la printempan renkontiĝon de esperantistoj el la tri landoj: Germanio, Nederlando, Belgio.
Cirkaŭ cento da partoprenantoj kunvenis frue matene je la 9-a horo en salono de la Galerio de la du Placoj, en la centro de la bela urbo. Tiu kunsido estis samtempe agrabla okazo de rekontaktiĝo inter amikoj el la tri landoj kiel inter samlandanoj de diversaj regionoj, kaj ankaŭ de interesa interŝanĝo de ideoj por la strategio de la movado en la trilanda regiono. Je la 11-a horo, multnombra delegitaro partoprenis oficialan akcepton en la Urbodomo far la urbestro de Verviers, kiu gratulis la jubilean Grupon ,ĝian ageman estraron kaj la simpatian prezidanton, José Jacob. Posttagmeze, post komuna tagmanĝo en apuda restoracio, la partoprenintoj aplaŭdis la faman magiiston kun la blua ŝtono, Trixini, el Paderborn, kaj la ĉarmajn dancistinojn de "Ballets Irène K." el Eŭpen. La renkontiĝo finiĝis post esperantlingva diservo en la Jesuita Kapelo.
Tiun memorindan tagon partoprenis pluraj reprezentantoj de la estraro de la Belga Esperanto-Federacio, kaj ankaŭ de APE kaj FEL.
La ĵurnalo "Le Jour" dediĉis pli ol duonan paĝon al la historio de Esperanto en Verviers kaj al la granda evento de tiu tago.

A. MG.





CENTJARDATREVEN
PALACOJ
BRUSELO
27-29.V.83



# LA MONDO.......
# KIUN NI ELEKTAS

Nia Movado ĉeestis kun sukceso kaj efikeco el ĉiuj vidpunktoj,al ĝi tiu evento.

- En 260 standoj la proksimume 15 000 aktivitaj vizitintoj povis trovi :
- superrigardon de la prosperanta kreativeco kaj de ĝia neatendita amplekso
- spacon kie la diversaj fortoj povis renkontiĝi kaj malkovri sian komplementecon kaj paralelecon
- eblecon de renkonto inter la "oficialaj" kaj la "alternativaj"fontoj"
- akcenti la valoron de la kreativaĵoj kiujn nia nuna societo ne rekonas je ĝia ĝusta valoro
- kontribuan al plivastigo de larĝa mondkonceso rilate:

1:la ekeston de nova valorskalo
2:prioritatojn kaj kondutojn,kolektivajn kaj individuajn kiuj rezultiĝos el ĝi.

Ne eblas mencii ĉiujn standojn de la diversaj organizoj kiel la nia,kiuj kunlaboris al la festivalo.
Ni nur specifu ke ili estis interdividitaj laŭla sektoroj:

-<u>EKOLOGIA KONSCIO</u>
vivmedio-respekto d.l.naturo,alternativa teknologio,ktp
-<u>PERSONA PERFEKTIĜO</u>
homa potenco-novaj psikologioj-interhomaj rilatoj,ktp
-<u>SENPERFORTECO</u>
Pacmovadoj,malarmado,homaj rajtoj,aternativoj diversaj...
-<u>KOMUNUMAJ DIMENSIOJ</u>
interkomunikado,komunumoj,volontuleco,tria+kvara mondo...
-<u>SINREGADO</u>
Ekoentreprenoj,ekonomiaj alternativoj,emancipado,ktp,ktp.

Regis granda entuziasmo tiel ĉe la organizantoj,kunlaborantaj organizoj kiel ĉe la vizitintoj pro la ofertitaj okazo kaj sukceso.Ĉeestintoj kiuj kolektis la senpage disdonitajn literaturaĵojn povis kunmeti veran enciklopedion pri alternativaj homaj valoroj.Al interesuloj,kiuj ne povis ĉeesti ni konsilas aĉeti por nur 40 Bfr la interesan trilingvan(GB+F+NL)86 paĝan katalogon ĉe "LA ARKO" Ch.de Charleroi 71,B.1060 Bruselo:tel:02.5382252 Konto:001.127 9880.41.Ili trovos en ĝi altvalorajn informojn kaj adresojn rilate al la festivalo kaj la kunlaborintaj asocioj.
Ni povis sperti la humanistan rigardon al la nuna homa alternativa vivo alportita el diversaj direktoj.Miloj da homoj kaj centoj da organizoj el la tuta mondo atestis pri tio.Estas pro tiu impulsio ke ni ĝojas,ja fieras pro nia ĉeesto.
Jam de pluraj jaroj ni organizas esperanto-standon en diversaj okazoj,sed neniam antaŭe ni estis superŝutitaj per tiom da informpetoj kaj interesiĝoj.Ankaŭ la Reĝo inkognito ĉeestis,sed lia alveno forrabis interesulojn de nia informkonferenco.
Gratuloj al ĉiuj gekunlaborintoj kaj ĝis post du jaroj.

(LDB)

## Konciza raporto pri FESTIVALO 83 ( Bruselo, 27,28, 29/05/83 )

Al ( laŭ ordo sensignifa ) : H.Deceuninck, L.De Bruyne, Y.Steyaert, A.Tilmont, K.Tytgat, A.Mertens-Goossens, R.Brabant, Ges. Debogneet, R.Larue, A.Demonty-Seghers, E.Van Damme.

Koran dankon al ĉiuj kunlaborintoj, pro la laboro farita antaŭ, dum kaj post la Festivalo !

1) Ĝenerala kunordigado
Pro diversaj fuŝetoj ( eventuala perdo de dokumentoj kaj de kartoj ) evidentiĝ[a] ke por tiaj okazaĵoj, estas oportune dekomence elekti iun respondeculon, ĉe kiu alvenus ĉiuj korespondaĵoj .

2) Publiko
Laŭ la organizantoj, la Festivalo temis pri " novaj " aŭ " alternativaj " ideoj, por konstrui " la mondon kiun ni elektas ". Estis do bunta miksaĵo de diversaj asocioj, sektoj, partioj, ktp kiuj celas kreskon de la persono aŭ pliboniĝon de homaj kontaktoj ; ankaŭ ne mankis kelkaj entreprenoj kun klara komerca celo. Entute la publiko montriĝis sufiĉe malfermita je esperanto, konsiderita kiel pozitiva ideo. Plej neatendita estis la komento de iu vizitanto, kiu asertis, ke nia stando estis la sola serioza en la tuto . Miriga estis la nombro de homoj el eŭropaj medioj, el kiuj pluraj ja sciis pri la seminario en Aŭstrio, kaj krom unu estis sufiĉe favoraj . Laŭlingve pli multnombraj estis sinsekve franc-, nederland- kaj anglalingvanoj.

3) Materialo
Propagandiloj kaj faldfolioj estis larĝe disdonitaj al interesuloj. Libroj bone vendiĝis, speciale bildstrioj, kaj la franclingva libreto " Une approche de la L.I. ", eldonita de U.F.E., tre taŭga por duoninteresitoj, ĉar ne kosta, kaj tamen relative kompleta ( kurso, leksiko, argumentoj kaj kontaktadresaro).

4) Prelego
Ni pozitive respondis al peto pri prelego dum la festivalo. Malgraŭ tio, ke ĝi okazis je sufiĉe taŭga momento ( sabate , je la II.30 ), la prelego nur " arigis " 2 homojn, i.a. ĉar dum tiu periodo la Reĝo vizitis la ekspozicion, kaj pro tio oni ne volis fari anoncon per mikro. Aliflanke notindas ke prelegoj kun filmo aŭ videoprogramo certe estas pli allogaj. Projekcio aŭ televidilo en la stando mem ankaŭ altiras homojn, sed ne ĉiam faciligas diskutadon, kiu ĉe nia stando ne mankis.

5) Katalogo
La katalogo, eldonita de la organizinta ASPC la Arko, estas trilingva ( franca, nederlanda, angla ) kaj entenas tri menciojn pri nia agado :
- duobla mencio de la stando sub la rubrikoj de BEF kaj Brusela Grupo ; feliĉe tamen ni sukcesis havi la du standojn apude, kaj la spaco ne estis tro granda.
- mencio de la prelego ( fine eble pli utila ol la fakto mem ke ĝi okazis ...)
- mencio de G.Maertens en la listo de la ĉefaj partoprenantoj .

KONKLUDO
Kompare ekzemple kun la ĉiujara lingvoborso en Bruselo, tiu-ĉi festivalo postulas pli da laboro, sed ne pli da elspezoj . Ŝajnas do utile daŭrigi nian partoprenon en tiaj okazajoj .
Aliaj komentoj aŭ sugestoj ( tiam preferekun konkreta propono pri realigo ) estas bonvenaj .

Marc Demonty .



LABOR OMNIA VINCIT IMPROBUS

# VIAJES ITALICA, S. A.

GAMAZO, 16 - 18
TELEFONO 22 43 49
SEVILLA - 1

Seviljo, 22-a de marto 1983

Estimata(j) S-ro(j),

Per tiu ĉi akribaĵo ni deziras prezenti al vi VIAJES ITALICA, S.A.-n kaj oferti al vi la servojn de la ununura esperantista vojaĝagentejo en Seviljo - kaj eble la unua en la tutlando hispana.

Seviljo, ĉefurbo de Andaluzio, estas senĉesa turisme furora centro mondkonata; pro tio, la privata iniciatemo provizis ĝin per multaj kaj bonegaj vojaĝoficejoj. Certe, jam ekzistas sufiĉaj tie ĉi, eble troaj, sed, evidente, ĉiam estas io por fari. Ĝenerale, oni vendas pogrande; kontraŭe, ni preferas servi kvalite sed ne kiome. Oni parolas anglan aŭ francan linvojn; ni ankaŭ konas - tiujn lingvojn, krom italan, germanan aŭ portugalan lingvojn, sed ni vere kredas je la komunikado inter la malsamlingvaj popoloj pere de la uzado de helpa komuna lingvo neŭtrala.

Nu, el tiuj konstatoj naskiĝis la ideo kaj estis precize tiu motivo ĉi, - kiu igis nin krei Viajes Itálica-n, kiu, kiel vojaĝentrepreno, havas, esence,- nur unu ĉefan mision, kiu lasas sin resumi en tio, ke per aktiva laboro kaj cel konscia agado ĝi kontribuu al pli granda disvastigo en la mondo de la mirinda-riĉeco homa, folklora, arta kaj pejzaĝa de Andaluzio, plialtigu la kvaliton de la multflanka vojaĝagentagado kaj aŭspiciu la faciligon de la turismo per la - aplikado de internacia lingvo. Unuvorte, ni pretendas transpreni loke la rolon de la kampanjo "Esperanto en Turismo", lanĉita en 1973 dum ĝenerala kunveno en Beograd, SFR Jugoslavio, por mobilizi ĉiujn esperantistojn agadi por ke Esperanto fariĝu unu el ĉefaj lingvoj en la internacia turismo. Do, plifortigi la turisman prestiĝon de Seviljo kaj Andaluzio sur internacia, landa aŭ faka terenoj, plialtigi la vojaĝagentojn mem, kaj kontribui laŭeble al la Esperanto-uzado kiel solvo de la lingvo-problemoj en turismaj medioj, ĉio ĉi restas niaj ĉefaj principoj kaj la precipaj gvidlinioj de nia Entrepreno.

Viajes Itálica, S.A., partoprenos la Esperanto-movadon iniciante, aŭspiciante kaj klopodonte oferti al ĝiaj klientoj kiel eble plej varian programon de vojaĝoj, ekskursoj, simpozioj, kongresoj, fakaj seminarioj kaj aliaj Esperanto-aktivaĵoj por plaĉi al plej diversaj gustoj, kiu estos eventaj potencigantoj de ĝia profesia agado. Ni scias, ke tiu ĉi tasko estas tre malfacila, - ke nia projekto estas ambicia, sed ni ankaŭ scias, ke ĝi estas vere reala kaj ebla; pro tio, nia entreprenlemo estas "labor omnia vincit improbus", t.e., - "tuton venkas trolaciga laboro". Ni povas venki, ĉar voli estas povi. Ni ankaŭ scias, ke Viajes Itálica ne estas loke ĉefa organizaĵo, nek eble ĝi estos unu el unuaj seviljaj vojaĝagentejoj, sed ĝi certe estos okuponta la unuan lokon - inter ĉiuj turismaj entreprenoj laŭ ĝiaj tri esencaj celoj. Se tiuj totalaj celoj sukcesos, atingas rezultojn, verdire Viajes Itálica ne estos fiaskinta. Ni komprenas, ke la kunlaboro estas necesega kaj nepra kondiĉo por sukceso en kiu ajn laboro. Ni estas bezonintaj helpon kaj estas trovintaj ĝin. Pro tiu fakto, jen nia dankemo por tiuj kiuj estas helpintaj nin tiom per sia ideokontribuo,- kiom per sia efika kunlaboro persona. Specialan mencion meritas Sevilja Esperanto Asocio, dank'al kies grava kunlaborado nia esperantista vojaĝagentejo - jam estas efektiviĝinta. Apenaŭ estas necese emfazi la grandan valoron de tia kunlaboro, kiu ne nur estas kontribuinta al la realigo mem de la Entrepreno, -



AGENCIA DE VIAJES · G. A. T. 910 · ...

sed estas inspirinta, inspiras kaj estos inspironta la laborprogramojn de Viajes Itálica, S.A. ĝenerale, kaj vekas nian entuziasmon pri la ĉiutaga agado.

Se vi opinias ke vojaĝante oni lernas, ke la vojaĝoj larĝigas la menson,- kaj plie vi scipovas la Internacian Lingvon kaj apogas intereson pri Esperanto kaj ĝia turisma uzado, ne dubu vi, ni eble estas viaj vojaĝagentoj.

Se vi loĝas en Seviljo, telefonu nin aŭ vizitu vi nian oficejon. Se vi ne estas seviljano kaj deziras malkovri tiun ĉi faman monumenturbon, skribu por - peti specialajn broŝurojn kun utilaj kaj helpaj informoj, kaj kiam vi vizitos-Seviljon nepre telefonu aŭ skribu al:

VIAJES ITALICA, S.A.

Adreso: Gamazo, 16-18. SEVILJO-1 (Andaluzio)
Telefono: (954) 22.43.49

Atendante vian baldaŭan helpan kunlaboron, ni profitas tiun ĉi okazon por sincere saluti vin.

Respekte viaj.


INSTITUT FÜR KYBERNETIK
Forschungsstelle bei der Universität Paderborn (FB 2)
DIREKTOR: ORD. PROF. DR. HELMAR FRANK
Stellvertr. Direktor: Dipl.-Psych. Dr. Siegfried Lehrl

CYBERNETICS INSTITUTE
Research Unit at the University of Paderborn (fac. 2)
INSTITUT DE CYBERNÉTIQUE
Centre de recherche près de l'université de Paderborn (fac. 2)

INSTITUTO PRI KIBERNETIKO
Esplorejo ĉe la Universitato de Paderborn (fak. 2)
DIREKTORO: ORD. PROF. D-RO HELMAR FRANK
Vicdirektoro: diplomita psikologo d-ro Siegfried Lehrl


Kiel fino de la unusemajna X-a Internacia Kongreso de Kibernetiko okazos 1983-08-27 en Namur (B) la jarĉefkunveno de la Internacia Kibernetika Asocio. Estos elektata nova estraro kaj decidota, kie okazos la venontaj kongresoj, kaj ĉu la Internacia Lingvo estu daŭre laborlingvo de tiuj kongresoj (krom la franca kaj la angla). Rajtos persone voĉdoni aŭ transdoni la voĉdonrajton al ĉeestonta membro (ekz. al prof.d-ro Pennacchietti, aŭ al prof.d-ro Sangiorgi aŭ al prof.d-ro Frank) ĉiu, kiu jam estas membro de la Internacia Kibernetika Asocio aŭ aliĝas almenaŭ por 1983 (jarkotizo: 1000,- BF). - Urĝe serĉataj estas scienculoj el ajna fako, kiuj konas la Internacian Lingvon, scipovas almenaŭ legi la francan kaj la anglan, kaj pretas kandidatiĝi por la nova estraro. (Al la ĝisnuna estraro apartenas 9 sciencistoj - po unu el la franca, la angla kaj la „tria" lingvo-mondo!) Proponojn (ankaŭ pri estontaj kongres-urboj) oni sendu al prof.d-ro Helmar G.Frank, Instituto pri Kibernetiko, KleinenbergerWeg 16B, D-4790 Paderborn.

# ESPERANTO EN BELGIO.

Jarkolekto 3 Julio-Aŭgusto 1983.

Monata bulteno (Bulletin mensuel - Maandelijks blad)

de la BELGA ESPERANTO-FEDERACIO

Montoyerstrato 37 b.24
B-1040 BRUSELO
Tel. (02)5135995

Postĉekkonto 000/0163434.86

Respondecas (Editeur responsable - Verantwoordelijke uitgever) :
La ĝenerala sekretario : André MERTENS GOOSSENS
Priorijstr. 4 B-1720 DILBEEK

Redakcio :
La estraro de B.E.F. prizorgu la materialon por la bulteno.
Krome, ĝi atendas kunlaboraĵojn el la tuta lando.
La artikoloj estu prefere esperantlingvaj kaj klare tajpitaj!

Informiloj povas tute aŭ parte reprodukti la tekstojn de ĉi tiu bulteno (escepte se precize malpermesas la aŭtoro).

BEF - ESTRARO

Prezidanto : Marc DEMONTY (Bruselo)

Vicprezidantoj : Lambertine DREZE (Lieĝo)
: Edward SYMOENS (Kalmthout)

Sekretarioj : André MERTENS GOOSSENS (Bruselo)
Jan BOVENDEERD (Mortsel)
Clément THOLET (Lieĝo)

Kasisto : Jules VERSTRAETEN (Antverpeno)

## MORTO de nia HONORA VIC-PREZIDANTO, Charles POUPEYE

Kun granda bedaŭro ni ekscias pri la morto (10-6-83) de nia fidela amiko Charles Poupeye, Honora Vic-prezidanto de Belga Esperanto-Federacio. Li estis 82-jaraĝa.

Kiel studento - 18-jara - li kontaktis kun Esperanto kaj la ideo kiun ĝi enhavas ( interkomprenigo inter la popoloj por alveni al paco kaj reciproka respekto) tiom impresis lin ke li tuj komencis studi la lingvon kaj aliĝi al la Bruĝa Esperanto-grupo en tiu tempo gvidata de prezidanto A.Witteryck.

Kiam F-ino Y.Thooris transprenis la prezidantecon de la grupo post la morto de Witteryck, S-ro Ch.Poupeye iĝis sekretario ( en 1929) kaj iom poste ankaŭ vic-prezidanto. Li sin dediĉis al tiuj funkcioj kun fajra fervoro. La grupo vivis, evoluis kaj kreskis.

Dum la milito la germanaj okupantoj konfiskis ĉiujn esperantaĵojn de la grupo. Tamen, tuj post la milito, post la liberigo de Belgio,la Bruĝa grupo ree aktivis kaj baldaŭ akiris la antaŭmilitan nivelon, grandparte dank' al la nelacigebla aktiveco de Ch. Poupeye kune kun liaj kunlaborantoj.

Do, kiu pli bone ol li rajtis transpreni la prezidantecon (En 1946) de la grupo post kiam F-ino Y.Thooris eksiĝis ? Ĝis sia morto - antaŭ kelkaj semajnoj - li plenumis tiun funkcion kun fervoro kaj amo. Ĝis sia lasta spiro li pensis kaj eĉ laboris por Esperanto.

Sennombraj estis la kursoj kiujn li gvidis; eĉ perkorespondaj kursoj kiuj -ĝenerale - havis bonan sukceson. Multaj de liaj gekursanoj iĝis membro de la bruĝa grupo. Sendube pro la simpatio kiun li vekis inter ili ĉar li estis bonhumora, gajkora homo kiu ŝatas la plezuron kaj ĝuis la bonajn flankojn de la vivo. Organizi balon, iniciati bankedon, krei kongresan etoson estis por li eventoj plej ŝatataj ĉar ĉio tio kreis aktivecojn en kiuj homoj ludas rolon, per kiuj li havis firmajn kontaktojn.

Li estis belgo - unitaristo - kiu honeste defendis siajn starpunktojn, ĉar li - pacemulo - vere, el la profundo de sia koro, opiniis ke nur en belga sfero la flandra kaj valona popoloj povus ĝui pacan kunvivadon, nur povus prosperi, progresi kaj feliĉiĝi. Tial tiom ĉagrenigis al li vidi la disiĝon - pli kaj pli - de ambaŭ popoloj dum la lastaj jaroj. Li estis honesta homo kiu fidis la homan saĝecon kaj neŝanceleble kredis en finfina plej bona solvo.

Dum la enteriga ceremonio ( 15-6-83) J.Verstraeten, kasisto de BEF, faris la funebran paroladon nome de Gregoir Maertens, prezidanto de UEA; nome de Marc Demonty, prezidanto de Belga Esperanto-Federacio; nome de Edward Symoens, prezidanto de Flandra Esperanto-Ligo; nome de Lambertine Drèze, prezidantino de Asocio por Esperanto kaj nome de ĉiuj Belgaj Esperanto-grupoj.

Inter pluraj floraĵoj estis belaj florkronoj de BEF kaj de FEL.

Multaj esperantistoj ĉeestis dum la funebra meso en la preĝejo kaj kondolencis la familion.

Ke Charles Poupeye trovu la eternan pacon kaj ripozon.

J. V.



RADIO VATICANA
PROGRAMMI ETNICO-LINGUISTICI
ESPERANTO-REDAKCIO

## Horoj kaj Frekvencoj de la Esperanto-Programoj

DIMANĈE h. 20,00 UTC - sur 1530 KHz (196 mt) - 6190 KHz (48,87 mt) -
(somere: h. 19) 6250 KHz (48,00 mt) - 7250 KHz (41,38 mt) -
9625 KHz (31,17 mt) - 9645 KHz (31,10 mt) -
11700 KHz (25,64 mt) - 15120 KHz (19,84 mt) -
525 KHz - 93,00/96,5 MHz FM (por Romo)
tempodaŭro: 9 minutoj

---

ĴAŬDE h. 06.00 UTC - sur 1611 KHz (186 mt) - 6250 KHz (48,00 mt) -
(somere: h. 5 ) 9625 KHz (31,17 mt) - 11715 KHz (25,61 mt) -
11740 KHz (25,55 mt) - 15120 KHz (19,84 mt) -
tempodaŭro: 14 minutoj

---

KONSTANTAJ PROGRAMEROJ :

DIMANĈE
1. Religia penso.
2. Katolikaj, ekumenaj kaj humanaj informoj el la tuta mondo. Foje la informojn anstataŭas aparta temo aŭ intervjuo.
3. Ĉiun monatfinan dimanĉon: leteroj de aŭskultantoj.

ĴAŬDE
1. Atestoj pri la kristana vivo.
2. Informoj. Foje aparta temo.

---

LETEROJ DE AŬSKULTANTOJ VALORAS ! Por la progreso de niaj Esperantlingvaj programoj tre gravas leteroj (plej diversaj laŭ aŭtoro kaj enhavo!) kun aŭskultraportoj, kritikoj, sugestoj, interesaj informoj. Laŭpete ni respondas kaj sendas (senpage) programbultenon, raportilojn, glu-insignojn, ktp.

Bonvolu do skribi al :

RADIO VATIKANA
ESPERANTO-REDAKCIO
Piazza Pia. 3
I-00193 ROMA
( Italio )

## MONDA TURISMO

Post la buskaravano al Budapeŝto, Monda Turismo aranĝos ankaŭ karuselvojaĝojn al Pollando, kaj internaciajn renkontojn en Antverpeno, Roterdamo, Luksemburgo kaj Ipswitch (pron. Ipsuiĉ). Informoj ĉe Monda Turismo, sama adreso kiel la Belga E-Federacio.

A. MO.

## DEZIRAS KORESPONDI

La Belga Esperanto-Federacio, ĝia sekretario kaj ĉefredaktoro de la bulteno, regule ricevas leterojn el la tuta mondo. Inter ili, kelkaj devenas de Esperanto-lernantoj (plej ofte progresantaj), kiuj serĉas korespondantojn en Belgio. Ni transdonis ĝis nun, iom okaze, la dezirojn al aktivuloj aŭ lokaj grupoj. Nun ankaŭ tiuj-ĉi sendas al ni anoncetojn por nia bulteno. Eble ili pravas: ĉar "Esperanto en Belgio" enmaniĝas al ĉiuj belgaj aktivaj Esperantistoj - kaj al kelkaj aliaj! -, ĝiaj sciigoj estus utile reproduktataj per informiloj de la grandaj asocioj kaj de lokaj grupoj.
La nunaj monatoj estas tiuj de la ferioj en nia mondoparto, kaj poste revenos la periodo de nova serio de kunvenoj kaj de kursoj; ĉu ne estas la okazo komenci korespondadon kun novaj amikoj en la mondo? Ankaŭ tiu demando decidigis la redaktoron aperigi longan liston de personoj kaj kluboj, kiuj deziras korespondi!

A.MG.

Studento pri kemio interesiĝas pri sporto, kaj krome pri moderna literaturo, historio, religioj, Belgio... Bv. skribi al Krzystof Juszczak, Mtynow 19, PL57-300 Klodzko (Pollando).

Vjetnama instruisto pri angla lingvo, 22-jara, ŝatus havi gekorespondantojn; jen la adreso: Huynh Van Theai, 118, Lô V - Chung cu Ngô Gia tu - Phuong 3, Quan 10 - Ho Chi Minh Urbo - Vjetnamio.

Filatelisto kiu jam ricevis dekses medalojn (unu en la Tutmonda Filatela Ekspozicio) interesiĝas pri ĉiuj E-filatelaĵoj, i.a. eldonitaj okaze de Universalaj Kongresoj (ekz. Antverpeno ...). Interŝanĝe li donus polajn E-poŝtstampojn, novajn kaj malnovajn. Janusz Mikulski, Skrytka pocztowa 30, 10-001, Olsztyn 1, Pollando.

Junulo 21-jara, ĉinadevena, Kamboĝa nacieco, rifuĝinta per boato el Kamboĝo kaj Vjetnamio , nun en Tajlando, sola sen familio en kampadejo, rakontus la historion de boatpopolo k. de rifuĝintoj... Ly Suy Ngy, B.2 £ R2 V.N.R.C. Sikew, P.O. Box 30340. Thailand.

Lernanto 15-jara, serĉas leter-geamikojn. Wöginger Helmut, Wilhelmgösserg. 13, 8047 Graz, Aŭstrujo.

Brazila ŝtatoficisto, instr. de E-o en mezgr. lernejoj, deziras h. gekorespondantojn pri Belgio kaj diversaj temoj, ankaŭ pri la vivo de Zamenhof. Raimundo Francisco de Oliveira, Rua 08, Casa 2 Metropolitana, 71.700 Núcleo Bandeirante, Brasilia - DF - Brazilo.

Meksikiano 29-jara, literaturisto, ŝatus korespondi kun virinoj 22-30-jaraj el Belgio pri poezio, hundoj kaj ĵurnalismo. Ricardo Ruiz C. Apartado postal M.7450, Mexico I.D.F., 06000.

Novfondita E-Klubo d. kor. kun Belgoj pri ĉiuj temoj. Resp. gar. "Malnovkastelo" H.G. Kaiser, 7400 Altenburg, Wenzelstr. 12. GDR.

Amikeco! Andrea Praveczki, Recsk Köbánya. T.11. 3245 Hungario.



Geknaboj 12-jaraj el Hungario volas kor. kun infanoj:
- -Illès Scilvia. H.-8471 Kàptalanfa. Ròcza. u.14.
- -Nagy Livia. H.-8471 Kàptalanfa. Petöfi. u.14.
- -Baàn Andrea. H.-8471 Kàptalanfa. Kossuth. u.108.
- -Németh Gàbor. H.-8471 Kàptalanfa. Dòzza. u.43.
- -Lenner Akos. H.-8471 Nemeshany. Petöfi. u.42.
- -Szakonyi Tünde H.-8471 Kàptalanfa. Tànczics. u.2.
- -Zoller Màtyàs H.-8473 Gyepükajàn. Szabadsàg. u.8.

Lernantino 17-jara volas korespondi: Csilla Lois, Tatabanya II.K. Erdèsz u.13. IV/12. 2800 Hungario.

Deziras kontakti gvidantojn de la Belga Movado: Irena Miodyńska, 44-100 Gliwice, Koŝsciuszki 32/5, Polska.

Gimnazianino 15-jara pri kio ajn korespondus kun Belga E-isto. Dèri Agnes, Kaznicbarcika, Lenin ùt 5. 11/5, 3700, Hungario.

Geknaboj 10-jaraj, klaso 4/b, d. kor. kun sim. grupo: bildk. let. Adr.: Gyenge Judit, Szövetkezet utca 21, Pàpa, Hungario - 8500.

Profesoro pri lingvo kaj geografio, 27-jara, d. havi amik(in)ojn en Belgio, skribi kaj paroli E-e, fotografi, vojaĝi, muziki, ktp. Patrice de La Condamine, Boisbriou, Pigny, 18110 Saint-Martin d'Auxigny, France.

Knabo 21-jara lab. en komputilejo, inter. sporto, skikurado, naturo, fremdaj pejzaĝoj, popoloj kaj kutimoj: **Màthè Csaba, Vàroskuti ùt 3/B, 1125 Budapest, Hungario.**



Janina (Vd. foton) estas 36-jara vidvino, konstruteknistino, katolikino, interesas: literaturo, muziko, filmo, sporto, modo, turistiko, ktp., kolektas bildkartojn, modoĵurnalojn kaj monerojn. Janina Jarecka, Poznań, Rynek Lazarski 9/15, Pollando.

Halina estas 37-jara ekonomistino, katolikino, interesas: filmo, muziko, sporto, modo, turistiko, k.a., kolektas modoĵurnalojn kaj bildkartojn. Halina Wagner, ul. Krośnieńska 26, 60-162 Poznań, Pollando

**Profesorino de geografio** 58-jara d. kor. kun esperantistinoj pri artoj, muziko, turismo, naturo, kol. bildkartojn, poŝtmarkojn. Tòth Erzsèbet, Nagytarcsa, Mùzeumkert 19, H-2142, Hungario.

Grupo, profesioj div., de studentoj ĝis kuracistoj kaj inĝenieroj serĉas gekorespondatojn en Belgio. Adr.Krystyna Spysz-Picchocka, ul. Krucza 23/31 m.62, 00-525 Varsovio - Pollando

Gimnaziano 18-jara d. kor. kun belga esperantist(in)o. Adreso: Gàbor Medveczki, Debrecen, Ibolya u.9. 4027. Hungario.

Pensiulo deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn: M. Blondeel, 22 rue Cl. Debussy, F.59130 Lambersart.

skolta esperanto-ligo

organo «la skolta mondo» fondita en 1918

Postbus 433, 1500 EK Zaandam

Belga Esperanto Fed.
BRUŜELO

Estimataj geamikoj,

Mi esperas ke vi trovos kelkajn liberajn minutojn por legi ĉi tiun leteron pri nia Ligo, kaj por poste - se eble - doni al ni vian helpon.

La Skolta Movado, en kiu ni laboras, kaj en kiu ni trovas niajn gemembrojn, baziĝas sur internacia, komuna Statuto. Sed tamen inter la diversaj naciaj skoltaj asocioj estas grandaj diferencoj.

Pro tio, nia Ligo celas havi naciajn sekciojn, kiuj estas iom sendependaj, kaj kiuj povas sin adapti al la loka situacio.

Alia grava kialo estas ke la naciaj sekcioj malgrandigas la distancon inter la geskoltoj kaj nia Ligo. La plej granda amaso de la geskoltoj ja estas la junuloj, infanoj ec !

Skoltado ekzistas en ĉ. 120 landoj kaj teritorioj, dum nia Ligo nur aktivas en ĉ 50 el ili.

En multaj landoj ni havas Reprezentanton - li havas aktivan postenon, varbas, kaj alie disvastigas la konon pri Esperanto inter la geskoltoj.
En aliaj landoj ni havas Peranton - tio estas iom pli pasiva tasko : peranto nur aktivas por respondi informpetojn, kaj laŭ peto de la Centra Komitato de SEL.
En landoj sen oficiala Skolta Movado nia Ligo povas havi Kontaktulon, kies helpon ni uzas laŭbezone.

Ĉi tiu reto de kunlaborantoj unuflanke estas kialo por fieri - aliflanke ĝi estas la malforta flanko de nia Ligo. Regule la listo malloniĝas pro morto, malsano aŭ eksiĝo. Tiel ankaŭ en via lando !

Tial nia peto : ĉu estus eble trovi por ni kunlaboranton aŭ konatigi nin kun interesulo ?
Se helpo ne tuj eblas, ĉu eventuale ia alvoko en la nacia Esperanto-bulteno povus doni helpon ?

Ni tre ŝatus, kiam via lando aperus en la listo, kiun ni intencas baldaŭ eldoni.
Kun danko pro via atento ĝis nun,

J.K.Hammer, ĝen.sekr. K. Hammer



SAARLÄNDISCHER ESPERANTO-BUND E.V.
Sarlanda Esperanto-Ligo r.a.

SEL

Abs.: SEL, Schulstraße 30, D-6601 Scheidt

DRUCKSACHE

Belga Esperanto- Federacio
Hendrykstr. 576. 24
B-1040 Bruxelles

Al:
- esperantistoj en Belgujo
- Esperanto-bibliotekoj
- kolektantoj

| Ihr Zeichen / Via signo | Ihre Nachricht vom / Via skribo de | Meine Nachricht vom / Mia skribo de | Mein Zeichen / Mia signo |
|---|---|---|---|
| | | | SEL/LS |

Betreff/Temo
Belga Esperantisto

Estimataj.

Ni klopodas kompletigi nian kolekton de BELGA ESPERANTISTO kaj ĉi-sube komunikas al vi kiuj numeroj mankas en nia arkivo. Tiujn numerojn ni volonte akiros, ĉu per aĉeto, ĉu per interŝanĝo, ĉu per donaco. Bonvolu sendi al ni vian ev. oferton. Por ev. interŝanĝo ni aldonas nian aktualan libro-katalogon

Jen la listo:

BELGA ESPERANTISTO (mankantaj numeroj)

2 (19o9/1o): 5.7.11.12.
3 (191o/11): 2.3.5.6.8.1o.11.12.
4 (1911/12): 2.3.4.5.6.7.8.9.
6 (1913/14): 3.5.9.1o.11.12.
7 (1921): 1.2.3.4.5.6.7.8.11.12.
8 (1922): 1.2.3.4.8.9.1o.11.12.
9 (1923): 1.2.5.6.7.8.9.1o.
1o (1924): 1.2.3.4.5.6.7.8.9.1o.
11 (1925): 2.
15 (1929): 1.2.3.
18 (1932): 4.5.6.
19 (1933): 1.3.4.5.6.7.8.9.1o.11.12.
2o (1934): 1.9.1o.11.12.
21 (1935): 1.2.4.5.6.8.11.
22 (1936): 1o.12.
23 (1937): 1.5.
24 (1938): 3.1o.12.
25 (1939): 2.5.6.
26 (194o): 4.5.6.7.8.9.1o.11.12.

45 (1953): 3.
47 (1955): 2.4.9.
48 (1956): 4.8.9.
49 (1957): 1.2.5.7.

Kun sinceraj salutoj

LIBROSERVO DE SEL

Ĉe: Belgia Esperanto-Federacio
Montoyerstr 37b.24, B-1040
Bruselo. Belgio.

Havanurbo. 1-a de Majo de 1983.

Kamarado:

Antaŭ ĉio ricevu saluton nome de la Scienca Teknika Sekcio de Kuba Esperanto-Asocio, kiu komplezigas interŝanĝi amikecan kaj teknikan korespondon kun vi.

Ni deziras informi al vi la fondaĵon de la "Centro de Esplorado kaj Dokumentado pri la Kansukero" en la monato Julio de la venonta jaro; tiu ĉi ideo ekaperis post la fino de la 28-a Kongreso de la "Internacia Societo de Teknologiistoj pri Sukerkano" en nia lando la pasintan monaton Februaro kie kunvenis la delegitoj de la diversaj landoj, kiuj konsistigas la "Sukeran Mondon".

Nia intereso troviĝas en atingi de vi, iom da informo kiun vi havas, skribitan en Esperanto (kompreneble), ni referus pri artikoloj, revuoj aŭ libroj (originala aŭ fotokopia) rilate al la sukera industrio, pri la temoj: industria, agrikultura kaj/aŭ finaj produktaĵoj (kruda sukero, rafinita sukero, melaso, alkoholo, ktp.) same kiel tekniklaboraĵoj en Laboratorio pri Kontrolado kaj/aŭ pri Esplorado.

Ni sugestas al vi fari kontaktojn kun sukeraj specialistoj, kiuj konas la lingvon kaj se vi posedas ian sukeran terminaron, bonvolu, sendi al ni iun modelon. Pro tio ke nia lando estas la plej granda eksportisto de kansukero en la mondo, jen la kaŭzo ke ni estas interesataj alporti ĉiom pri tiu ĉi temoj esperanten.

Pardonu ke tiu ĉi letero estas multobligita, sed ni sendas ĝin -la saman tekston- al 10 adresoj, kaj tial maleblus ĉiu letero skribita en originalo

Esperante ke vi scios atenti nian intereson.

Samideane.

Roberto Torres Alvarez.

Prezidanto de la
Sciens-Teknika Sekcio.



# 43.ª HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

## 75.ª DATREVENO DE "FRATECO"

De la 21ª ĝis la 25ª Julio 1983

SAN VICENTE DE PAUL, 1 ZARAGOZA-1

Estimata samidean-(in)o:

Okaze de la 43ª HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO kaj 75ª datreveno de la fondo de nia Societo "FRATECO", la Zaragoza Urbestraro akceptis nian peton eldoni broŝuron en Esperanta lingvo, kiu klarigas viziton al la artohistoriaj monumentoj de nia urbo, vizito kiun mi efektivigos dum nia Kongreso kiel invititoj de la citita Urbestraro en proksima monato Julio.

Ni promesis al tiuj urbaj aŭtoritatoj disvastigi ĝin, ne nur nacie sed ankaŭ internacie, estas ja pro tiu motivo, que ni petas al ĉiu samidean-(in)o kiuj deziru posedi ĝin, bonvolu mendi senpagan ekzempleron al ĉi suba adreso, kaj danki al tiu Artohistoria Delegacio, ne nur pro tiu bela eldono sed ankaŭ pro ties malavara gesto de komplezemo al nia afero.

Akceptu, kara samidean-(in)o, kun nia rekomendo niajn plej korajn salutojn.

LA ORGANIZA KONGRESA KOMITATO

Adreso:
Excmo. Ayuntamiento
Delegación del Patrimonio
Histórico-Artístico
ZARAGOZA
Hispanio

**2 salonoj:** dinamika moderna muziko
klasikaj dancoj, valso kaj tango

5 novembro 1983, 20.30 h

| NOVEMBER | | | | | | 1983 |
|---|---|---|---|---|---|---|
| Z | M | D | W | D | V | Z |
| | | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 |
| 6 | 7 | 8 | 9 | 10 | 11 | 12 |
| 13 | 14 | 15 | 16 | 17 | 18 | 19 |
| 20 | 21 | 22 | 23 | 24 | 25 | 26 |
| 27 | 28 | 29 | 30 | | | |

# esperantobalo

salono «alpheusdal»

f. williotstraat 22, berchem

atingebla per aŭtobuslinio n° 9 kaj la tramoj 7 kaj 15

antaŭvenditaj enirkartoj: 200 BF (150 BF por junuloj ĝis 25-jaraj)

haveblaj en la esperanto-centro antverpeno kaj diversaj esperantokluboj

- ni prizorgos privatan loĝadon en antverpeno kontraŭ minimuma pago (bv. rezervi ĝustatempe);
- festetosa, geamika manĝo antaŭ la balo (kandellumo), anonciĝu sufiĉe frue!

Ĉiuj informoj, rezervadoj kaj enskribiĝoj en la Esperanto-Centro Antverpeno, Frankrijklei 140, tel. (03) 234.34 00

Ĵus aperis!

# MANLIBRO
# por
# ESPERANTO-AKTIVULOJ

en bela plasta kovrilo kun centoj da paĝoj pri ĉio, kion la aktivuloj kaj grupoj de la Esperanto-movado devas nepre scii.
La libro respondos inter alie tuj la jenajn demandojn:

- Kie oni povas akiri informilojn pri Esperanto?
- Kie mi povas akiri librojn en Esperanto?
- Ĉu mia grupo povas ricevi subvenciojn?
- Ĉu mia grupo devas pagi impostojn se ĝi organzias balon?
- Kiel funkcias tiu Esperanto-Centro en Antverpeno?
- Kiel mi povas organizi ekspozicion pri Esperanto?
- Kia estas la strukturo de FEL?
- Kie mi trovos bonan preleganton por nia Zamenhof-vespero?

Tion ĉi, kaj multon alian, vi trovos en la „Manlibro por Esperanto-Aktivuloj".
Tiu ĉi libro konsistas el apartaj folioj en praktika bindilo. La eldonantoj daŭre liveros novajn paĝojn, tiel ke la tuta verko restas ĉiam ĝisdata. Se, ekzemple, hodiaŭ aperas en la Belga Ŝtatgazeto nova leĝo kiu koncernas la Esperanto-grupojn, certe post kelkaj semajnoj vi povos legi la detalojn pri ĝi en la novaj folioj de via manlibro.
Mendu la manlibron jam nun. La unua baza verko, tio estas plasta ringodosiero kun minimume 100 folioj, kostas 695 fr. (inkl. sendokostojn kaj AVI). Mendu ĝin pagante 695 fr. al konto 402-5510531-55 de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno, kun mencio „Manlibro por Esperanto-Aktivuloj".

# KADROKURSO PRI TURISMO

SABATO 17 septembro :

09h-10h:Enkonduko fare de la Prezidanto de la Belga Esperanto Federacio:S-ro Demonty Marc.

Interkonatiĝo

ESPERANTO-TURISMO: fare de S-ro Grzebowski Prezidanto de Monda Turismo,magistro pri historio en Pollando

10h-11h:TURISMA LINGVISTIKO fare de S-ro Demonty M. instruisto pri nederlanda kaj germana lingvoj en Bruselo

11h-12h:TURISMO KAJ FINANCOJ fare de S-ro Mertens A. vicdirektoro ĉe la Generala Sparkaso en Bruselo kaj sekretario de la BEF

12h-13h:Komuna(kunportita)lunĉo-kafo aŭ teo senpage havebla surloke-turisma kantaro

13h-14h: TURISMO NATURHISTORE fare de S-ro Geysels A instruisto pri natursciencoj kaj fakdelegito pri turismo de UEA

14h-15h:TURISMA PLANADO: fare de S-ro De Bruyne L. eksstaciestro kaj turisma kunlaboranto ĉe la Belgaj Fervojoj kaj vicprezidanto de Monda Turismo

15h-16h:TURISMAJ GRUPOJ - CICERONADO : far Sro Grzebowski(PL)

DIMANĈO 18 septembro: TUTTAGA EKSKURSO

Praktikado de la ESPERANTO-TURISMO
Senpage por la laŭreatoj - 500 Bfr por interesuloj
Veturplano:Bruselo-Antverpeno-Roterdamo(vizito de la respektivaj E.Centro)-Reveturo tra la deltaregionoj kunpontegoj,pramoj kaj beletaj Zelandaj urbetoj.

PREMIADO:Krom premioj de ambasadoj kaj turismaj servoj OK vojaĝoj al la IX-a INTERNACIA FOIRO DE LA ESPERANTO TURISMO okazonta je 21-30 oktobro en Pollando(3 tute senpage 5 je 50%)

INFORMOJ :S-ro M.Demonty Av.des Missionnaires 39b5 (TF:02.5201944) B 1080 Bruselo



**La Esperanto-Turismo ofertas**

- unikajn homajn interrilateblecojn
- 4000 delegitojn en pli ol cent landoj
- 500 adresojn en 50 landoj, kie eblas senpage esti gastigata
- 500 internaciajn renkontiĝojn en 40 landoj istigitajn en la TURISMA KALENDARO
- Ĝian fakorganon = plej fruktodona ideobanko
- Informkoverton: "Turismo nia bonŝanco" kontraŭ 2 IRK aŭ sendeviza egalvaloro.

INFO: MONDA TURISMO
Montoyerstr. 37b24
B 1040 BRUSELO

Monda Turismo ESPERANTO

# ESPERANTO-"VAPOR"-KURSO

Paralele kun la kadrokurso pri turismo-samloke-okazos intensigita enkonduka kurso al Esperanto rezervita al personoj kiuj havas bonan bazon de eŭropa plurlingveco-divido en lingvogrupoj

KOSTPREZO : 500 Bfr por kursmaterialo kaj nedevige sed konsilinde 500 bfr por la partopreno al la ekskurso Bruselo/Zelando kiel ĉi supre.

TRANOKTEBLECOJ je 17/18 senpage ĉe gesamideanoj(ev.ankaŭ 18/19)

LOKO:por ambaŭ kursoj en Bruselo Gretrystr.26(3-a + 4-a etaĝo)

ENSKRIBOJ:al ambaŭ kursoj,telefone aŭ per simpla poŝtkarto
Nur tiel ni povos garantii la kursmaterialon kaj buslokojn
Pagoj povos esti farataj surloke.

# ESPERANTO EN BELGIO.

Jarkolekto 3 Septembro-oktobro 1983.

Monata bulteno (Bulletin mensuel - Maandelijks blad)

de la BELGA ESPERANTO-FEDERACIO

Montoyerstrato 37 b.24
B-1040 BRUSELO
Tel.(02)5135995

Poŝtĉekkonto 000/0163434.86

Respondecas (Editeur responsable - Verantwoordelijke uitgever) :
La ĝenerala sekretario : André MERTENS GOOSSENS
Priorijstr. 4 B-1720 DILBEEK

---

"Esperanto en Belgio" temas pri la Esperanto-movado en Belgio: fakte, kaj simile al iuj aliaj revuoj de landaj asocioj, ĝi ne nur kronikas la landan movadon, sed ĝi ankaŭ komunikas informojn pri gravaj agadoj kiujn al ĝi sendas alilandaj asocioj.
La estraroj de BEF, FEL kaj APE, ankaŭ de lokaj grupoj prizorgu la materialon. La artikoloj estu prefere klare tajpitaj!
La oficiale monata bulteno de BEF "praktike" aperas almenaŭ dumonate. Laŭ konsento kun la GC, la sendado okazas nun al ĉiuj abonantoj de la revuo "Esperanto" - pere de FEL, APE, BEF, aŭ rekte ĉe UEA -, kaj al kelkaj aliaj en- kaj eksterlandaj adresoj listigitaj de la sekretariato de BEF.

---

**Preparado de la Jubilea Jaro 1987**

BEF invitas siajn estraranojn, tiujn de FEL kaj APE, kaj aliajn kunlaboremulojn partopreni la landajn kunvenojn arangotajn por organizi la jubilean programon.
La prezidanto proponis la unuan kunvenon je la 19-a de novembro ekde 10 h. en trinkejo "Le Passage", av. Marnix 12b (apud la Namura Pordego), 1050 Bruselo.

---

## HEROLDO DE ESPERANTO

La jarabono por 1984 estas 520 BF.
Peranto por Belgio: Eld.-Libr. "Sonorilo", pĉk. 000-0152140-44.

## BELGA ESPERANTO-FEDERACIO

**Generala Jarkunveno.**

Kiel jam anoncis Informiloj de AFE kaj de FEL, la jarkunveno de BEF okazis je sabato la 22-a de oktobro 1983 en CHARLEROI.

Estrarkunsido okazis je 9 h. 30 en la KULDURDOMO,

Generala Kunsido okazis posttagmeze en la URBODOMO

1. Enkonduka parolado de S-ro G. Maertens, prezidanto de la Universala Esperanto-Asocio: Perspektivoj por Esperanto en Eŭropaj Instancoj.

2. Tagordo de la Generala kunsido:
- 2.1. Aprobo de la protokolo de la antaŭa generala kunveno
- 2.2. Raportoj de la belgaj Esperanto-organizoj:
- 2.2.1. Flandra Esperanto-Ligo
- 2.2.2. Asocio por Esperanto
- 2.2.3. Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj
- 2.2.4. Fondusoj Jaumotte-Loquet kaj Debrouwere-Janssen
- 2.3. Sekretaria raporto de Belga Esperanto-Federacio
- 2.4. Raporto de Eldonejo- Librejo Sonorilo
- 2.5. Financa raporto de Belga Esperanto-Federacio
- 2.6. Propono de nova UEA-delegito, anstataŭonto de Ch. Poupeye
- 2.7. Estonta agado
- 2.7.1. Kadro-kursoj
- 2.7.2. Preparo de la Jubilea Jaro
- 2.7.3. Bulteno "Esperanto en Belgio"
- 2.8. Diversaĵoj

Protokolo de la kunveno aperos en estonta bulteno'
La sekretario dankas la kolegojn de la belgaj Esperanto-organizoj kiuj sendis (kaj ankoraŭ sendos) ilian jarraporton.

**Jus aperis la MANLIBRO POR ESPERANTO-AKTIVULOJ,**

nova eldonaĵo de la FLANDRA ESPERANTO-LIGO kiu pritraktas ĉion, kion la aktivuloj kaj la grupoj de FEL devas nepre scii... La libro konsistas el apartaj folioj en praktika bindilo. La eldonantoj daŭre liveros novajn paĝojn, tiel ke la tuta verko restos ĉiam ĝisdata. Se iam necesas aŭ utilas ŝanĝoj, la aŭtoroj povos rapide korekti kaj eldoni novajn foliojn.
La informoj celas precipe la flandrajn aktivulojn kaj grupestrojn, tamen pluraj ankaŭ utilus al kolegoj el la franclingva landparto. Oni povas jam nun mendi la bazan verkon, kun minimume 100 folioj, pagante 695 BF al konto 402-5510531-55 de Flandra Esperanto-Ligo, kun mencio "Manlibro por Esperanto-Aktivuloj".

A.MG.

**DEZIRAS KORESPONDI**

17-jara knabo d. k. kun knabino pri ŝia lando kaj la popolo.
Barta Zoltàn, Hungario, Sàta, Kolozsvàri ut 10. H-3659.

SUKCESA
# KADROKURSO PRI TURISMO
EN BRUSELO

La 17-an de septembro okazis en Bruselo kadrokurso pri turismo, sub aŭspicioj de Monda Turismo kaj de Belga Esperanto Federacio. Ĉeestis kaj aktive parto-prenis entute 19 homoj, el pluraj landoj. Pro la fervojista striko, pluraj belgaj kaj unu franca aliĝintoj bedaŭrinde ne povis veni.

La temo " turismo ", kiu fariĝis aparte grava por nia movado speciale en la lastaj jaroj, estis dividita en diversaj subtitoloj :
- Ĝeneralan enkondukon pri la Esperanto-turismo donis S-ro Grzebowski .
- S-ro Demonty skizis la temon " Lingvoj kaj turismo " kaj per kvizo atentigis pri la neceso pli bone koni la fakvortaron, ekz. arkitekturan.
- S-ro Mertens-Goossens per tre praktikaj kaj ĝisdatigitaj informoj liveris nemalhaveblan kontribuaĵon pri financaj aspektoj de la turismo .

Post komuna lunĉo kaj kantado, S-ro Geysels klarigis kiel oni gvidu kaj donu informojn pri naturo kaj historio, ankaŭ substrekante tre konkretajn postulojn.
- S-ro De Bruyne klarigis la erojn de taŭga turisma planado, kiu postulas zorgan esploradon ankaŭ surloke, poste ordigon de la akiritaj informoj kaj kunmeton de definitiva programo.
- La temo " ĉiceronado ", jam flanke pritraktita de aliaj kontribuintoj, estis pli detale kaj superrigarde prezentita de S-ro Grzebowski .

Paralele kun la kadrokurso okazis rapidkurso, al kiu estis aliĝintoj 6 personoj, sed povis veni nur 2. La kurso estas gvidita de M.Demonty, surbaze de la rapidkurso de W.Auld, adaptita de Petro De Smet . Estas kuraĝiga fakto ke la du partoprenintoj nun regule sekvas la vesperajn kursojn de la brusela grupo. Indas substreki, ke tiaj kursoj jam donis mirindajn rezultojn kaj aparte taŭgas por iu parto de la publiko. Pli da aktivuloj devus fojfoje provi gvidi tian kurson, post eventuale ankoraŭ antaŭvidota enkonduko pri la necesaj instruteknikoj .

La posta tago estis dediĉita al praktikado de akiritaj konoj kaj malkovro de du Esperanto-centroj. Post frumatena foriro el Bruselo, la unua etapo estis en Antverpeno, kie la direktoro de la Grafika Centro, S-ro Peeraerts klarigis la utiligon de la diversaj ejoj kaj detaligis la facetojn de la presarto. Post ma llonga ĉelima halto, ni sufiĉe rapide estis en Roterdamo, kie S-ro Milojevic gvidis nin tra la domo de la Centra Oficejo de U.E.A. Por multaj bonvenis kafpaŭzo antaŭ lunĉo en vidalvida gastejo .
Dum la posttagmezo eblis viziti la zelandan deltaregionon kun interesaj haltoj en Zierikzee kaj Middelburg . La vespermanĝo okazis en tipe genta resto-racio, kaj la plimulto (re)gustumis la lokan " waterzooi " .
Malgraŭ senĉesa pluvado, la 2a tago, same kiel la antaŭa disvolviĝis en bonhumora etoso, kaj montriĝis lerniga kaj kontaktplena okazo por ĉiuj .



RIPETO DE LA EKSPERIMENTO
EN 1984

17 + 18 marto en G E N T O
kun speciala atento pri
- E.Turismaj spertoj en HUNGARIO
- la turisma literaturo
- la turismaj tradukservoj

13 + 14 oktobro en L I E Ĝ O
kun speciala atento pri
- E-Turismaj spertoj en BULGARIO
- la turismo en la seka afrika sezono
- blinduloj en la vojaĝgrupoj

# jarfina karuselvojaĝo!

1983-12-22 / 1984-01-06

neforgeseblaj KRISTNASKAJ TAGOJ en Pollando

grandiozaj SILVESTRAJ TAGOJ en Budapesto

SPECIALAJ ETOSO KAJ ATMOSFERO EN LA TRAVETUROTAJ URBOJ

VETURVOJO : Zebruĝo - Bruselo - Helmstedto - Berlino - Sŝubiĉo - Bidgoŝĉo

Toruno - Ĉestoĥova - Cieszino - Martino - Budapeŝto - Vieno

Salzburgo - Bruselo - Zebruĝo

EN LA PROGRAMO :

Ĉefaj programeroj estos certe la speciala neforgesebla etoso dum la kristnaskaj tagoj en Pollando kaj la grandioza budapeŝta silvestro travivaĵo.
Tamen krom tio ĝi enkludos la urbrigardadojn en festa atmosfero, surlokajn ekskursojn en Pollando, Hungario kaj Aŭstrio (tri noktoj en Vieno, unu en Alpoj)
Kulturajn renkontojn kaj programojn, amuzajn vesperojn, teatraĵojn, muzeaj vizitoj, dumvintrajn subĉielajn naĝadojn en varmfontaj lagoj-vingustumado-dialogojn

ALIĜO kaj PAGOJ : plej laste je la 1983-11-30

KOSTPREZO : 25 000 Bfr ĝirende nur al kontnumero 961.0907434.91 de
Monda Turismo Bruselo
ĝi enkludas la tuten ĉi supran programon kaj plenpesionon dum la tuta restado en Pollando, Hungario kaj Aŭstrio, ankaŭ survoje.
Ĝi ne enkludas la pagojn de la vizoj por DDR(=3x5DM), Pola(=670bfr) Hungara(=400Bfr) kaj Ĉeka(=425bfr)
Ĉiu zorgas por propra pasporto valida kaj per ĝi ni faros la demandojn de la vizoj

Organizanto : ESPERANTOTUR BRUSELO Montoyerstr.37/24 - B 1040 BRUSELO
Info: tf:02.5387165 aŭ eventuale ĉe EEC 5135995(=respondilo)

---

E S P E R A N T O - T U R I S M O
A L D O N A K A J U T I L A
A L T E R N A T I V O

La strukturo de la esperantista turismo neniam antaŭe ofertis tiom da turismaj variantoj.
De la plej amasa esperanto-turismo(2000 poloj en la UK) al la minibusa grupeto(Beneluksaj karuselvojaĝoj al Pollando)
Loĝeblecoj en la plej granda kaj plej moderna esperanto-hotelo de la Internacia Esperanto Kursejo en Pisanico(Hg) ĝis la plej karaj labortendaroj de TEJO.
La ĉiusemajnaj kaj periodikaj buslinioj aŭ karuselvojaĝoj trovigas esti aldona alternativo al la klasikaj instru - k. informmetodoj. Tiu trafikado krome permesas la translimajn kaj samtempajn transportadojn de varoj utilaj al la diversaj esperanto-centroj.



## Inter-Parlamenta Esperanto-Grupo

D-ro Hyun-uk Kim, membro de la Nacia Asembleo de Koreujo, jus anoncis ke Korea sekcio de IPEG havis oficialan programeron en la renkontiĝo okaze de la ĝenerala kunsido de Internacia Parlamenta Unuiĝo, ekde la 2-a ĝis la 13-a de oktobro 1983 en Seulo, Koreio.
La sekciestro invitis alilandajn asociojn kontakti parlamentanojn kaj trasendi al ili invitilon! ...sed BEF ricevis la leteron iom tro malfrue je la komenco de oktobro.
Interesa novaĵo: la kunsidon partoprenos 20 koreaj parlamentanoj, kaj la prezidanto de Korea Esperanto-Asocio, P-ro D-ro Gang Cungsik, rektoro de Universitato Dankuk.

A. MG.

---

69-a Universala Kongreso de Esperanto
de la 21-a ĝis la 28-a de julio 1984
en Vankuvero, Kanado.

Ni rememorigas ke
1. vi povas ricevi aliĝilon ĉe via landa peranto,
2. vi povas resendi la aliĝilon kaj fari la pagon al via landa peranto.

Por Belgio, la landa peranto estas la Belga Esperanto-Federacio, Montoyerstrato 37 b.24 B-1040 Bruselo, pĉk 000/0163434.86.
Laŭ la nuna kurzo de la Guldeno ĉe la plimultaj bankoj en Belgio (18,57 BF.), ni indikas ĉisube la kongreskotizojn en nia nacia mono:

| Kongreskotizoj ĝis la dato: | 31.12.83 | 14.05.84 |
|---|---|---|
| 1.Ne individua membro de UEA | 3250 BF | 3900 BF |
| 2.Individua membro de UEA | 2600 BF | 3250 BF |
| 3.Kunulo/junulo/handikapulo -ne individua membro de UEA | 1950 BF | 2600 BF |
| 4.Kunulo/junulo/handikapulo individua membro de UEA | 1300 BF | 1950 BF |

La kurzo ĉe ASLK/CGER estas meze pli avantaĝa...
Krome kurzoj de valutoj daŭre ŝanĝiĝas!
Do la eblaj diferencoj fariĝos gajnoj aŭ malgajnoj por la peranto (se ili ne tro altiĝos).
Tamen por malgrandigi la riskojn por la peranto, la aliĝontoj povas pagi rondan sumon aŭ aldoni donacon por la Federacio.
Anticipan dankon!

Vi trovos ankaŭ ekzempleron de aliĝilo en la bulteno.

A. MG.

**Forpasis**

je la 15-a de oktobro, en la ripozejo 's Gravensteen en Lippelo, la delegito de UEA en Gento:

Ödön Edmond LODOR

Li estis konvinkita idealisto, kaj ludis ĉefan rolon en la eldonado de la revuo "Progreso".

## KONGRESO DE JUGOSLAVIA ESPERANTO-LIGO

La Organiza Komitato informis BEF ke la 21-a Kongreso de Jugoslavia Esperanto-Ligo okazos de 25 ĝis 27 novembro 1983 en Skofja Loka (Slovenio). Ĝin partoprenos 180 delegitoj el la tuta lando, pli ol 150 observantoj kaj aliaj gastoj.
Dum la kongreso okazos ankaŭ solena kunveno okaze de la 75-jariĝo de la Esperanto-Movado en Jugoslavio.
Organiza Komitato: 21-a Kongreso de JEL, Novi trg 6/I, p.f. 401, 61000 Ljubljana, Jugoslavio.

****************************************************************

## VERDA MONTO 84

POLA STUDENTA ESPERANTA KOMITATO, POLA STUDENTA ASOCIO, STUDENTA ESPERANTA TEATRO el ZIELONA GORA invitas amatorajn teatrajn grupojn, aktorojn kaj kanzonistojn al II-a INTERNACIA RENKONTIĜO DE ESPERANTAJ TEATROJ je 13-15 IV 84 en Zielona Góra.
Informilo kaj aliĝilo haveblaj ĉe BEF ĝis fino de XII 83.

****************************************************************

KASSEL kaj la ĉefurbestro Hans Eichel,
Esperanto-Rondo Kassel kaj respondeculo de LKK, Werner Wiegand, invitas al la **62-a Germana Esperanto-Kongreso** 1984 04 06 - 08 en Kassel, Park-Hotel Hessenland.
Informilo kaj aliĝilo haveblaj ĉe BEF. Limdato: 15-a de februaro.

****************************************************************

## DEZIRAS KORESPONDI en Esperanto

31-jara fraŭlo, lic. angla lingvo, instruisto en gimnazio, finis la kurson " E-o laŭ metodo Friis", d. k. pri lingvistiko.
Fariborz Kuchekizad, n-o 2 Julla Alley, Fahalati Alley, Saadi Ave, Rasht. Iran.

Profesoro, interesas: edukado, verkado, ĝardenado, filozofio, kurantaj eventoj; studis la germanan, studas la hispanan.
Richard Swerdlin, 20100, New Texas State University, P.O.Box 13857, Denton, Texas 76203-3857.

Anonceto:
18-jara angla Esperantista studento serĉas laboron en Belgujo iam inter januaro kaj septembro 1984, aŭ helpojn por tio. Parolas Esperanton kaj la anglan, sufiĉe bone la francan (kaj iom la svedan kaj finnan). Duncan Adam, Hare Park Stud, Six Mile Bottom, Newmarket, Suffolk CB8 OUZ, Britujo.



# LABORPLANO POR LA PERIODO 1983-198?

## PRIORITATOJ

La celoj de la ĉi-sekvaj gvidlinioj estas precipe la jenaj:
altigi la nombron de la parolantoj de la Internacia Lingvo;
altigi la kvaliton de la scioj de tiuj parolantoj;
tutmondigi la Esperanto-movadon;
utiligi Esperanton por ĉiuspecaj internaciaj rilatoj;
trovi la ligojn inter Esperanto kaj la evoluo de la komunika teknologio.
Por atingi tiujn celojn necesas ankaŭ fari paŝojn por
evoluigi la lingvon
fortigi la movadon
Tiuj agadoj estas esenca parto de la laboro de UEA en kiu ĝi kunlaboru kun aliaj koncernataj instancoj.

## RIMARKO:

La ĉi-sekva laborplano prezentas kvar agad-kampojn al kiuj oni dediĉu atenton dum la periodo 1983-1987. Por ĉiu el la kvar agad-kampoj la laborplano prezentas liston de kvin prioritataj taskoj laŭ ordo de prioritato (de la plej grava al la malplej grava).
Tio ne signifas ke agadoj ne menciotaj ne estas gravaj aŭ daŭrigindaj. La laborplano simple prezentas la agadojn, kiuj estas taksataj prioritataj en la pritraktata periodo, kaj kiuj devas enesti en ĉiuj laborplanoj de Landaj Asocioj kaj aliaj poresperantaj instancoj.

## TABELO DE PRIORITATOJ

1. INFORMADO
1. Komuniki informojn pri Esperanto kaj ĝia movado al la amaskomunikiloj por ilia pluinformado al la ĝenerala publiko.
2. Informi la soci-politikajn mediojn pri Esperanto kaj ĝia movado.
3. Aliri pedagogiajn kaj edukajn instancojn kun informoj pri kontribuoj kaj ebloj de Esperanto por iliaj celoj.
4. Informi sciencajn kaj teknologiajn instancojn pri Esperanto.
5. Informi turismajn mediojn pri Esperanto.

2. EDUKADO KAJ INSTRUADO
1. Prizorgi la internan edukadon de niaj kunagantoj kaj doni al ili la informojn necesajn por pli efika agado.
2. Precizigi la konkretajn celojn de ĉiu aganta instanco, por ke ili estu klare enmeteblaj en laborplanon kaj por ke oni kapablu konstante kontroli la gradon de atingo de la fiksitaj celoj.
Eduki la aktivulojn agi laŭ fiksitaj celoj.
3. Precizigi la disponeblajn homajn rimedojn por agado kaj instruado kaj difini la relativan rolon de ĉiu laboranta instanco.
4. Difini la unuopajn informotajn cel-grupojn kaj rekonsideri la plej efikajn inform-manierojn.
5. Evoluigi novajn kaj pli efikajn instrumetodojn kaj precizigi la celojn, kiujn oni volas atingi per instruado de la Lingvo Internacia.

3. APLIKADO
1. Uzi Esperanton en profesiaj rondoj.
Evoluigi sciencan kaj fakan aplikadon de Esperanto.
2. Uzi Esperanton por fari aŭ helpi sociajn agadojn.
3. Uzi Esperanton por ebligi kulturajn interŝanĝojn internaciajn al esperantistoj kaj neesperantistoj.
4. Akceli la uzon de Esperanto en sporto kaj turismo.
5. Apliki Esperanton en aliaj kampoj, en kiuj prezentiĝas favoraj eblecoj

4. ORGANIZAJ RIMEDOJ
1. Ordigi nian laborforton per sistemo de komisionoj kaj laborgrupoj sur ĉiuj agad-niveloj, por laborigi pli da esperantistoj.
2. Pliefikigi la delegitan reton.
3. Pliigi la oferton de turismaj servoj de la movado.
4. Aktivigi la Centron de Esploro kaj Dokumentado kaj la Bibliotekon Hodler de UEA por ke ili estu servokapablaj.
5. Pliigi la komercajn enspezojn de ĉiuj organizajoj de la Esperanto-movado.

FINO DE LA POST-KONGRESA DOKUMENTARO: 830901 CO.

# Universala Kongreso de Esperanto

Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando
Telefono: (010) 36 15 39
Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM
Poŝta ĝirkonto nederlanda: 62 73 37
Bankkonto n-ro 42.69.01.444, Amsterdam-Rotterdam Bank, Rotterdam

1983 09 30

Pri: MENDO DE ANONCO EN LA DUA BULTENO KAJ KONGRESA LIBRO DE LA 69a UK

Al: Esperanto-eldonejoj kaj aliaj interesitoj

Estimataj,

La Dua Bulteno kaj la Kongresa Libro de la Universala Kongreso de Esperanto estas inter la plej gravaj porokazaj eldonaĵoj en la internacia lingvo ĉiujare. Profitu de ili por fari vian reklamadon !

<u>T A R I F O</u>

(inkluzivas nian grafikan laboron)

| | |
|---|---|
| Tutpaĝa anonco, 108 x 165 mm: | 250 gld. |
| Duonpaĝa anonco, 108 x 83 mm: | 150 gld. |
| Kvaronpaĝa anonco, 108 x 42 mm: | 100 gld. |

<u>Eldonkvanto</u>: 1800 ekzempleroj

| | | |
|---|---|---|
| <u>Limdatoj</u>: | Dua Bulteno: | 30a de novembro 1983 |
| | Kongresa Libro: | 30a de marto 1984 |
| <u>Aperdatoj</u>: | Dua Bulteno: | januaro/februaro 1984 |
| | Kongresa Libro: | junio 1984 |

La Kongresa Administracio rezervas al si la rajton rifuzi anoncon sen doni al la mendanto motivon por tio.

<u>Dumkongresaj reklamoj</u>:
Alia reklamebleco estas per enmetado de via propra reklamilo en la Kongresan dokumentaron por distribuado al ĉiuj kongresanoj. Se tio interesas vin, bonvolu sendi specimenon de la disdonota reklamilo (aŭ, se ĝi ankoraŭ ne estas produktita, la projektitan tekston), kaj ni informos vin pri la tarifo. La specimeno devos atingi nin ĝis la komenco de marto ĉar, laŭ art. 21 de la Kongresa Regularo, necesas por tia reklamado la anticipa aprobo de la Estraro de UEA.

SENDU ! MENDU ! VENDU !

<u>La Kongresa Administracio</u>

P.S. Ne-esperantista instanco pagas la duoblon de la supra tarifo!

# ESPERANTO EN BELGIO.

Jarkolekto 3 Novembro-Decembro 1983.

Monata bulteno (Bulletin mensuel - Maandelijks blad)

de la BELGA ESPERANTO-FEDERACIO Montoyerstrato 37 b24
B-1040 BRUSELO

Postĉekkonto 000/0163434.86 Tel. (02) 513 59 95

Respondecas (Editeur responsable - Verantwoordelijke uitgever) :
La ĝenerala sekretario : André MERTENS GOOSSENS
Priorijstr. 4 B-1720 DILBEEK

Redakcio :
La estraro de B.E.F. prizorgu la materialon por la bulteno.
Krome, ĝi atendas kunlaboraĵojn el la tuta lando.
La artikoloj estu prefere esperantlingvaj kaj klare tajpitaj!

Informiloj povas tute aŭ parte reprodukti la tekstojn de ĉi tiu bulteno (escepte se precize malpermesas la aŭtoro).

```
                 *
                ***
            ***********
FELICAN JARFINON !   ***BEF***   PROSPERAN NOVJARON !
               *****
              *** ***
              *     *
```

**KLUBO 100**

arangos la enlandan "Programon por la Jubileo de Esperanto"
Kontribuu kaj helpu ĝiajn agadojn! Kotizo minimuma 1000 BF
rajtigas voĉdonon en ĉiu kunveno de la klubo, kaj ankaŭ...
!!! partoprenon al lotumado de senpaga vojaĝo al Varsovio !!!
Sendu viajn pagojn al Bankkonto 034.0379435.33 de KLUBO 100

GRATULOJN AL BRUSELA ESPERANTO-GRUPO pro ĝia 75-jara jubileo !

## NACIAJ KAJ INTERNACIAJ RENKONTIĜOJ

| | |
|---|---|
| 1983/17.12 | 75-jara Jubilea Zamenhoffesto -Bruselo B |
| 22.12-06.01 | Karuselvojaĝo Belgio-Pollando-Budapeŝto PL-H |
| 27.12-07.01 | Universitataj Semajnoj - San-Marino RSM |
| 1984/21.01 | 10h Kunsido de jubilea komisiono "Klubo 100" Taverne "Le Passage", av. Marnix 12, B-1050 Bruselo |
| 24-29.01 | Esperanto-staĝo - La Chaux-de-Fonds CH |
| 28.01-04.02 | Esperanto-skisemajno - Maria Alm A |

---

## POLAJ VIZITANTOJ

De la 28a de oktobro ĝis la 6a de novembro kvar polaj studentoj de PSEK (Pola Studenta Esperanto-Komitato) vizitis Belgion en la kadro de polaj-flandraj interŝanĝoj inter esperantistaj gejunuloj. Ilia restado komenciĝis en Wavre per partopreno al la renkontiĝo de FLEJA. Poste ili vizitis plurajn gravajn urbojn en Flandrio kaj Lieĝon kaj Welkenraedt, jes aŭ ne kombinite kun vespera programo de la loka Esperanto-grupo, kie ili parolis pri sia lando kaj prezentis kanzonojn en Esperanto aŭ en la pola.

Ĉu vi interesiĝas pri simila dektaga rondvojaĝo en Pollando? Ĉu vi kapablas paroli pri Belgio kaj pri viaj aktivecoj en Esperanto? Pliaj informoj estas haveblaj ĉe FLEJA, Sint-Hathebrandstraat 8, 2510 Mortsel. Verŝajne dum la somero 1983 aŭ 1984 FLEJA planas viziton al Pollando. Anoncu vin, se vi ne volas maltrafi tiun okazon.

kiki tytgat

## ESPERANTISTA GRUPO WELKENRAEDT

Kadre de interŝanĝo kun esperantistaj studentoj, FLEJA akceptis kvar polojn dum semajno. Sur reira vojo, ili haltis en Welkenraedt la 6-an de novembro, kie ili animis vesperon por la kluboj de Eupen, Verviers kaj Welkenraedt. Krome esperantistoj, simpatiantoj multe demandis pri Pollando. La urbestro, S-ro Grosjean, honoris la feston pro sia ĉeesto kaj donacis memoraĵojn faritajn de lokaj metiistoj. Ni tutkore dankas Modest, kaj Paŭlo pro sia prelego, kaj Roman, la lerta gitar-ludisto.

Marie Grela.

---

## "GUIDE DU NOUVEAU - GIDS VAN HET NIEUWE 83-84"

Tiu dulingva gvidlibro prezentas per ampleksa priskribo aron da asocioj kaj grupoj, kiuj estas aktivaj pri la plej diversaj fakoj ( ekologio, natura kuracado, nova edukado, natura nutrado, spiritualismo, humanisma psikologio, paco, disvolviĝo, medio, respekto de la vivo, alternativaj ferioj, ktp ) kaj kiuj konscias pri la urĝa neceso de iu ŝanĝo de mentaleco.
Troviĝas ankaŭ multaj utilaj adresoj, ekz. tiuj de vegetaranaj restoracioj, de biologiaj agrikulturistoj, de mondbutikoj, ktp.
La 280-paĝa gvidlibro estas mendebla en librovendejoj aŭ rekte ĉe la eldonisto: Van Loghum Slaterus, Santvoorbeeklaan 21-23, 2100 Deurne. la prezo estas 495 BF ( + sendokostoj ).

L'Arc - De Boog.



BEF

# BELGA
# ESPERANTO-
# FEDERACIO

Organigramo de BEF ĝisdata kaj adaptita por respondi al demandoj de belgaj oficialaj instancoj (per tradukoj), de ĉiaj informiĝantoj, de Universala Esperanto-Asocio (i.a. por la jarlibro), kaj de la legantaro de "Esperanto en Belgio".

A.MG.

BELGA ESPERANTO-FEDERACIO

SINPREZENTO DE LA LANDA ASOCIO

Informoj ĝisdataj je novembro 1983

BELGA ESPERANTO-FEDERACIO, BEF;
Asocio sen profitdona celo,
Montoyerstr. 37 b24, B-1040 Bruselo.
Tel. (02) 513 59 95. Pĉk.000-0163434-86.
Aliĝinta al UEA; fondita en 1961.

**Celoj**

Disvastigi per ĉiuj taŭgaj rimedoj la internacian lingvon Esperanto;
subteni la agadon de la asocioj sen profitdona celo FLANDRA ESPERANTO-LIGO kaj ASOCIO POR ESPERANTO, de la landa(j) esperantista(j) junulara(j) asocio(j), de la landaj fakaj asocioj kaj de aliaj asocioj kiuj celas la progresigon de la internacia lingvo Esperanto;
reprezenti la Esperanto-movadon el Belgio en ĝiaj rilatoj kun Universala Esperanto-Asocio, ĝiaj delegitoj, oficejoj kaj institucioj;
reprezenti la Esperanto-movadon en ĝiaj rilatoj kun ĉiuj naciaj kaj internaciaj instancoj;
plibonigi per Esperanto la rilatojn inter belgaj regionoj, kaj inter ili kaj aliaj regionoj kaj landoj.

**Rimedoj**

Organizi kursojn;
starigi ekzamenkomisionojn;
atribui diplomojn;
eldoni informmaterialon;
eldoni librojn kaj publikaĵojn;
organizi radio- kaj televidintervjuojn aŭ elsendojn;
publikigi gazet- kaj revuartikolojn;
arangi aŭ partopreni ekspoziciojn;
organizi naciajn kaj internaciajn kunvenojn kaj kongresojn;
interveni ĉe publikaj kaj privataj instancoj...

Renkontiĝoj

Ĉiujara landa kongreso
Estrarkunvenoj
Kadrokursoj
Internaciaj kaj naciaj renkontiĝoj
Partopreno al regionaj kaj lokaj renkontiĝoj
Partopreno al neesperantistaj organizaĵoj.



**Honora prezidanto**

Pol DENOEL, kuracisto, rue Victor Raskin 20, B-4000 Liège.

**Estraro**

Prezidanto:
Marc DEMONTY, profesoro, av. des Missionnaires 39 b5, B-1080 Bruselo, tel. (02) 520 19 44.

Vicprezidantoj:
Lambertine DREZE,, rue Louvrex 105, B-4000 Liège, tel. (041) 23 17 21.

Edward SYMOENS, em. lernejestro, Putsestwg 131A, B-2180 Kalmthout, tel (03) 666 62 66.

Generala sekretario:
André MERTENS GOOSSENS, banka vicdirektoro, Priorijstr. 4, B-1720 Dilbeek, tel. (02) 465 09 46.

Sekretarioj:
Clément THOLET, oficisto, rue des Hineux 54, B-4400 Herstal, tel. (041) 64 02 71.

Jan BOVENDEERD, oficisto, Speeltuinlaan 14, B-2510 Mortsel, tel. (03) 449 50 06.

Kasisto:
Jules VERSTRAETEN, vitrokomercisto, St. Bernardsestwg 1078, B-2710 Hoboken, tel. (03) 827 66 43.

Financa konsilanto:
Grégoire MAERTENS, statoficisto, Pr. Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, tel. (050) 35 49 35.

**Ekzekucianta estraro**

Marc DEMONTY, André MERTENS GOOSSENS, Jules VERSTRAETEN.

**Ĉefdelegito**

Andrée ORSOLINI,, rue Paul Pastur 6, B-6000 Charleroi, tel. (071) 31 02 46.

**Administrantaro**

Pol Denoël, Marc Demonty, Lambertine Drèze, Edward Symoens, André Mertens Goossens, Clément Tholet, Jan Bovendeerd, Jules Verstraeten, Grégoire Maertens, Pierre Binot, Andrée Orsolini, Wim De Smet, Eliza Kehlet, Monique Vereecken, Henri Lentzen, Charles Norga, Emile Laduron, Roger De Schepper, Emile Van Damme, Kristin Tytgat.

! Membraro !

La menciitaj administrantoj kaj la reprezentantoj de la faka Esperanto-asocioj kaj de la lokaj Esperanto-grupoj el Belgio.

! Organo !

"Esperanto en Belgio", tutlanda informilo pri la E.agadoj, monata bulteno, 12-paĝa
Redakcio : André Mertens Goossens.
Adreso : Montoyerstr. 37 b24 B-1040 Bruselo, tel (02) 513 59 95.

! Servoj !

Libroservo "Sonorilo" : eldonejo, presejo, librejo.
Ko.: M. Vereecken,,Doornstraat 22, B-2610 Wilrijk,
tel. (03) 827 24 05.

Regionaj gazetaraj servoj :
-franclingva : G. Pirlot,, Kemmelbergstr.5 b3, B-8400 Oostende,
tel. (059) 827 24 05;
-nederlandlingva : H. kaj A. Deceuninck-Bollaert,, Lusthuizenlaan
1 b4, B-1500 Halle, tel. (02) 360 17 22.

Someraj Universitataj Kursoj, BP 9, B-Liège X.

Klubo 100: Plenumo de la jubilea programo.
Ko.: BEF, Montoyerstr. 37 b24, B-1040 Bruselo.

! Strukturo de la landa movado !

BEF estas kupola organizaĵo de la regionaj asocioj FEL kaj APE
La lokaj kluboj rekte kunlaboras respektive kun FEL kaj APE.

Sekcioj / Regionaj kaj fakaj asocioj
Estraranoj: P.=prezidanto, S.=sekretario, K.=kasisto.
Korespondadreso= Ko. Organo(j)= Org.

Asocio por Esperanto,, rue Montoyer 37 b24, B-1040 Bruselo,
fond. en 1978. Membr. 500.
Org.: Espéranto en Marche, Inter Clubs.
P.: L. Drèze,,rue Louvrex 105, B-4000 Liège.
S.: Cl. Tholet,,rue des Hineux 54, B-4400 Herstal.
K.: P. Binot,,Avenue Ad. Buyl 57, B-1050 Bruselo.

Flandra Esperanto-Ligo,, Frankrijklei 140, B-2000 Antverpeno,
fond. en 1978. Membr. 659.
Org.: Esperanto-Panorama, Informilo.
P.: E. Symoens,, Putsesteenweg 131, B-2180 Kalmthout.
S.: J. Bovendeerd,, Speeltuinlaan 14, B-2510 Mortsel.
K.: E. D'Hondt,, Wilgstraat 25A, B-9440 Erembodegem.

Flandra Esperantista Junulara Asocio.
Membr. 150. Org. : JEN, Koncize.
P.: K. Tytgat,, St.Hatebrandstraat 8, B-2510 Mortsel.



Flandra Asocio de Blindaj Esperantistoj.
Ko.: E. Vandekerkhove,, Pakenstr.57, B-3030 Leuven.

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, Belga sekcio.
Org.: ILEI-Informilo.
Ko.: M. Demonty,, av. des Missionnaires 39 b5, B-1080 Bruselo.

Monda Turismo.
Org.: Esperanto-Turismo.
Ko.: L. De Bruyne,, Montoyerstr. 37 b24, B-1040 Bruselo.

Belga Esperanto Fervojista Asocio.
Org.: TAMEN.
Ko.: L. De Sutter,, Pijnbomenweg 4, B-1180 Bruselo.

Ligo de la Katolikaj Esperantistoj en Belgio.
Ko.: H. Audenaert,, Beekstraat 6, B-9100 Lokeren.

Laborista Esperanto-Grupo "Antaŭen".
Ko.: J. Bonte,, Ruggeveldlaan 635 b2, B-2100 Deurne.

Lokaj kluboj

A.P.E. :

Bruxelles :
Brusela Esperanto-Grupo,,s. av. Capricorne 129, B-1200 Bruselo.
Org.: Esperanto Aktuala.

Charleroi :
Groupe Espérantiste,,p. Rue P. Pastur 6, B-6000 Charleroi.
Org.: Esperanto-Klubo Charleroi.

Eupen :
Club Esperanto,,p. Rue de Verviers 101, B-4700 Eupen.
Org.: Radio Aktivität Eupen.

Liège :
Liège-Espéranto,,ko. Rue Victor Raskin 20, B-4000 Liège.
Org.: Liège-Espéranto.

Namur :
Namur-Espéranto,,ko. Route d'Eghezée 8, B-5850 La Bruyère.
Org.: La Heliko.

Verviers :
Groupe Espérantiste,,s. Place Verte 23 b3, B-4800 Verviers.
Org.: Radio Verviers.

Welkenraedt :
Groupe Espérantiste,,p. Feldweg 20, B-4701 Kettenis.

F.E.L. :

Aalst :
Esperanto Aalst,,ko. Ninovestraat 157, B-9440 Erembodegem.

Antwerpen :
La Verda Stelo,,s. Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

Beringen :
Esperantogroep,,s. Paalsesteenweg 10, B-3950 Beringen.

Blankenberge:
Esperantogroep,,s. Helmweg 7,B-8300 Knokke-Heist.

Brugge :
Paco kaj Justeco,,p. St.-Klaradreef 59, B-8000 Brugge.

Bruĝa Reĝa Societo,,p. Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge.

Brussel :
Brusela Esperanto-Grupo,,s. Steenboklaan 129, B-1200 Bruselo.
Org.: Esperanto Aktuala.

Edegem :
Esperantogroep,,ko. P. Gilsonlaan 5, B-2520 Edegem.

Gent :
E-Grupo La Progreso,,ko. Brusselsestweg 385, B-9219 Gentbrugge.

Hasselt :
Esperanto Hasselt,,p. Justus Lipsiusstraat 26, B-3500 Hasselt.

Kalmthout :
La Erikejo,,s. Rozendreef 33, B-2180 Kalmthout.

Kortrijk :
La Konkordo,,k. Oudenaardsesteenweg 158, B-8500 Kortrijk.

Leuven :
Esperanto 2000,,s. Duisburgsestraat 12, B-3030 Leuven.
Org.: Esperanto 2000.

Mechelen :
Esperantogroep,,p. Lange Zandstraat 52, B-2580 St-Katelijne-Waver.

Mortsel :
Esperanto Mortsel,,s. Speeltuinlaan 14, B-2510 Mortsel.

Sint-Niklaas :
Esperantogroep,,p. Weynstraat 1, B-2700 Sint-Niklaas.

Tessenderlo :
Esperantogroep,,p. Kerkstr. 13/1, B-3980 Tessenderlo.

Turnhout :
Kampina E-Grupo,,ko. Harmoniestraat 47, B-2300 Turnhout.

Wilrijk :
Esperantogroep,,p. Doornstraat 22, B-2610 Wilrijk.



! UEA-Membraro !

| | | |
|---|---|---|
| MJ | 189 | individuaj membroj kun Jarlibro |
| MA | 31 | individuaj membroj kun Jarlibro kaj Esperanto |
| MJK | 21 | indididuaj membroj kun Jarlibro kaj Kontakto |
| MAK | 2 | individuaj membroj kun Jarlibro, Esperanto kaj Kontakto |
| DM | 23 | dumvivaj membroj |
| | ---- | |
| | 266 | individuaj membroj |
| | 893 | asociaj membroj |
| | ---- | |
| | 1159 | membroj entute. |

! UEA-Delegitaro !

Vidu la Jarlibron...

! UEA-Komitatanoj !

A.Lambertine Drèze, Edward Symoens. B.Wim De Smet. C.Eliza Kehlet

! Institucio Hodler 68 - Estraranoj !

Jules Verstraeten, André Mertens Goossens.

! TEJO-Estrarano !

André Staes.

! UEA-Prezidanto !

Grégoire Maertens.

! Aliaj institucioj en Belgio !

Grafika Centro,, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen,
tel. (03) 234 34 00.

Eldonejo TK-Stafeto,, Miksebaan 65A, B-2130 Brasschaat.

Ateliero de Esperanto, B-4580 Aubel.

Asocio por la Enkonduko de Nova Biologia Nomenklaturo,
NBN,, Hertendreef 12, B-2180 Kalmthout.

Urba Biblioteko de Kortrijk, B-8500 Kortrijk.

Eŭropa Esperanto-Unio, S. Eŭropa Esperanto-Centro,,
Montoyerstrato 37 b24, B-1040 Bruselo; tel. (02) 513 59 95.

Eŭropa Klubo,, BP 3, B-1040 Bruselo 26.

§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§
§§ Subtenu la landan Esperanto-movadon §§
§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§

## Aliĝo al Universala Esperanto-Kongreso

Se oni pagas sian aliĝon al la Universala Kongreso pere de BEF (Belga Esperanto-Federacio), oni finance helpas la landan Esperanto-movadon, ĉar ĝi ricevas makleraĵon.
Do, bonvolu pagi al pĉk 000.0163434, Belga Esperanto-Federacio, Montoyerstrato 37 b24, 1040 Bruselo, menciante "Kotizo por UK".
Ankaŭ ĉe BEF, la aliĝiloj estas disponeblaj.

## Malpliigo de impostoj pro donacoj al BEF

Ni rememorigas al niaj legantoj pri la ebleco por malpliigi siajn impostojn pere de donacoj (minimume 1000 fr.) al BEF.
Tiu sistemo estas duflanka:
1. la donacinto ĝuas rabaton je siaj impostoj, do pagas malpli;
2. li aŭ ŝi grave helpas venki la nunajn financajn malfacilaĵojn de Belga Esperanto-Federacio !!
La pĉk de BEF estas 000.0163434, Belga Esperanto-Federacio, Montoyerstrato 37 b24, 1040 Bruselo. Nura mencio: "DONACO".

Kun anticipa danko de via kasisto J. Verstraeten !!

=========



## Kongresaj insignoj

Por reklami la 69-an Universalan Kongreson okazonta en Vankuvero, Kanado, en 1984, la LKK pretigis limigitan kvanton da oficialaj kongresaj insignopingloj. Ili estas unika kanada fabrikaĵo el arĝentizita metalo, proksimuma grandeco 22 x 17 mm, kaj montras la kongresan simbolon (indiana totemfosto) kun la vortoj "69a UK de Esperanto"; en la fono estas verdkolora kvinpinta steleto.

La pingloj jam nun estas haveblaj:

aŭ pogrande (min. kvanto 10) ĉe la LKK (53 North Boundary, Vancouver, B.C. V5K 3S4) kontraŭ po $3 kan. + sendkosto

aŭ podetale ĉe la Libroservo de K.E.A. (765 Braemar, R.R.2, Sidney, B.C. V8L 3S1)
aŭ ĉe via landa Esperanto-organizaĵo
kontraŭ $4 kan. + sendkosto.

---

## EŬROPA JUNULARO AKTIVAS

La 19an de oktobro okazis en Bruselo en la aŭditorio de la Ŝparkaso solena kunveno de la Internacia Asocio JUNULARO KAJ EŬROPO (antaŭe Eŭropa Junulara Fonduso). Kaŭzo de tiu ĉi festkunsido estis krom la premiado de la gajnintoj de emblemkonkurso, la instalo de la dek membroj de la Eŭropa Junulara Komitato. Pli ol 200 junuloj inter 12 kaj 21 jaroj kandidatiĝis por tiu ĉi posteno. Unu el la elektitaj homoj estas ILSE JACQUES, estrarano de Flandra Esperanto-Junularo. Dum ŝia elekto oni mallonge menciis antaŭ la publiko ŝiajn aktivecojn rilate al Esperanto.

Inter la ĉeestantaj moŝtoj troviĝis Leo Tindemans, belga ministro pri eksterlandaj aferoj, kiu festparoladis en kvar lingvoj kaj kiu jam antaŭe famiĝis kiel "Mister Europe".

Dum la akcepto poste la membroj de la Junulara Komitato havis la eblecon paroli kun la honoraj gastoj kaj povis demandi al la estraro de la asocio, kion precize oni atendas de ili. Tiuj junuloj estos interalie petataj aktivi en la kadro de la eŭropaj elektoj en 1984. Tiurilate Ilse povos labori por la disvastiĝo de Esperanto en eŭropaj medioj.

Ni deziras al Ilse multe da sukceso en la plenumo de ŝia nova tasko!

P.S. "Junularo kaj Eŭropo" disponigas financajn rimedojn por eŭropaj junularprojektoj.

kiki tytgat

Universala Esperanto-Asocio
en konsultaj rilatoj kun Unesko

Centra Oficejo: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando; tel. (010) 361539

Al: Elektitaj Ĉefdelegitoj, Kotizperantoj, Landaj Asocioj de UEA, Landaj Sekcioj de TEJO, Fakaj Asocioj, Lokaj kluboj, Esperanto-oficejoj, gazetaro kaj aktivuloj.
Informe: Estraranoj de UEA.

Pri: Anoncoj en Jarlibro 1984

Karaj amikoj,

En la Centra Oficejo ni nun komencas la laboron pri Jarlibro 1984.

Per ĉi tiu letero ni invitas vin mendi aŭ varbi anoncon aŭ anonceton en la nova Jarlibro. Tiu Jarlibro havos apartan temon: vojaĝrabatoj. Ĝi prezentos aldone al la kutima enhavo utilajn informojn por vojaĝantoj. Pro tio, vi povas provi varbi anoncojn de hoteloj, vojaĝagentejoj kaj fervojaj administracioj. Emfazu, ke multaj esperantistoj uzas la Jarlibron kiel helpilon dum vojaĝado. Des pli pro la aparta temo en 1984.

Kelkaj el vi jam sendas anoncojn kaj anoncetojn. La nuna sendaĵo ne rilatas al tio. Ni sendos aparte mendilojn kaj korektofoliojn por renoviĝo de ekzistantaj anoncoj. Ni nun serĉas novajn anoncojn.

Anoncetoj: Lokaj kluboj povas mendi malmultekostan anonceton por prezenti informojn pri siaj kunvenoj. Legu pri tio sur p. 397 de Jarlibro 1983. Ni petas Landajn Asociojn kaj Ĉef-delegitojn aparte atentigi lokajn klubojn pri tiu ebleco.

Anoncoj por Esperantaj entreprenoj: Tiujn ni proponas je duono de la plena tarifo! Nur 200 gld. por plena paĝo. Tiu prezo ne altiĝis en ok jaroj!

Anoncoj de ne-movadaj entreprenoj: Ni akceptas de komercaj aŭ turismaj instancoj anoncojn je la plena tarifo (400 gld. por plena paĝo). Ni pretas doni makleraĵon de 30% al la varbinto de komerctarifa anonco! Ni havas mendilojn en jenaj naciaj lingvoj: angla, franca, germana, hispana, nederlanda kaj portugala. Bonvolu diskonigi en via klubo aŭ inter viaj membroj la eblecon varbi plentarifajn anoncojn kaj ricevi makleraĵon!

Nia limdato por ricevi mendojn estas la 1-a de januaro 1984.

Ni esperas, ke multaj el vi reagos baldaŭ al nia propono, kaj ke la nova Jarlibro prezentos multajn novajn anoncojn, precipe de turismaj kaj transportaj entreprenoj.

Kore salutas,

Stefan MacGill

Stefan MacGill, dir. CO